

El Popola Ĉinio


人民中國報道



PEKINO 6 1 9 6 0

ELDONAS: ĈINA ESPERANTO - LIGO

VERDA VOJO
FRANCKI
DIREKCYJNA 2/4
WARZYSKI
KLIF





Novaj Trajtoj de la Ĉina Kamparo

Teknika renovigo kaj teknika revolucio estas ŝanĝantaj la trajtojn de la ĉina kamparo

1. Unu el la mekanigitaj por-komanĝigejoj de la bestobredejo Laborista-kamparana Alianco apud Tiangin.
2. La ĉefa irigacia kanalo en Hingiang-regiono, Henan-provinco.
3. 130 metrojn longa akvokonduka ponto projektita kaj konstruita de kamparanoj mem en Cangluo-gubernio, Fugian-provinco.
4. Tritiko estas semata per maŝinoj sur la vastaj kampoj de Hingnong-a Popol-komunumo de Bajkjuan-gubernio, Hejlonggiang-provinco.

(Daŭrigo sur la antaŭlasta paĝo)



Vivu la Granda Oktobra Socialisma Revolucio

— Parolado de Prezidanto Liu Ŝaŭki ĉe moskva aerodromo —

La Ĉina Partia kaj Registara Delegacio gvidata de k-do Liu Ŝaŭki, vicprezidanto de la Centra Komitato de la Ĉina Komunista Partio kaj prezidanto de la Ĉina Popola Respubliko, akceptinte la inviton de la Centra Komitato de la Sovetunia Komunista Partio kaj la Registaro de Sovetunio flugis aeroplane de Pekino al Moskvo je la 5-a de novembro por partopreni la celebren de la 43-a datreveno de la Oktobra

Socialisma Revolucio. Moskvon atingis kune kun Prezidanto Liu Ŝaŭki ankaŭ k-do Deng Hiaŭping, vicedestro de la Delegacio, kaj membroj de la Delegacio k-doĵ Kang Ŝeng, Jang Ŝangkun kaj Hu Kiaŭmu. La ceteraj membroj de la Delegacio atingis Moskvon en la sekvinta tago.

Ĉe moskva aerodromo Prezidanto Liu Ŝaŭki estis varme bonvenigita de L. I. Breĵnev, M. A. Suslov, N. S. Ĥruŝĉov kaj aliaj gvidantoj de la Partio kaj Registaro de Sovetunio. Prezidanto Liu Ŝaŭki faris paroladon en la aerodromo. Sube estas la teksto de la parolado.

Kara kamarado Ĥruŝĉov,
Kara kamarado Breĵnev,
Karaj gekamaradoj,

Invitite de la Sovetunia Komunista Partio kaj la Sovetunia Registaro, ni, la Ĉina Partia kaj Registara Delegacio, venas al Moskvo kun plenkora ĝojo. Ni ĝoje festos, kune kun la granda popolo de Sovetunio la 43-an datrevenon de la granda Oktobra Revolucio. En la nomo de la ĉina popolo, la Ĉina Komunista Partio kaj la Ĉina Registaro, ni esprimas al vi, kaj pere de vi al la tuta granda popolo de Sovetunio, al la Sovetunia Komunista Partio kaj la Sovetunia Registaro, varmegan kaj elkoran gratulon. (**Entuziasma aplaŭdado.**)

La Oktobra Socialisma Revolucio kondukita de la popolo de Sovetunio sub la gvidado de la granda Lenin kaj la Bolŝevista Partio, estas granda turnopunkto de la homa historio, kaj ĝi komencis la tutan transiran

EL POPOLA ĈINIO

Dumonata Kultura Gazeto
Eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo
Adreso: P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

Enhavo de N-ro 6 (63) 1960

Bildo sur la kovrilo — **Feliĉa Momento** (Ĉinstila pentraĵo de Li Hu)

Vivu la granda Oktobra Socialisma Revolucio
La penso de Maŭ Zedong estas triumfa standardo de la granda revolucio de la ĉina popolo

Parolado de Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj
Daŭra Antaŭensalto de la ĉina nacia ekonomio en 1960

Ĉina kamparo survoje al mekanikigo
Vizito al akvoriĉa regiono

Nova fizionomio de la ĉina pentrarto
Revolucio en medicino

Por la socialisma konstruado de la patrolando

Reflorado en zefiro kaj sunvarmo
“Tria Franjo Liu” — dancopero de Guanghi
Amiko konatiginta sur Elbo-rivero

Bildo sur la dorsa kovrilo — **Angulo de Hiaŭlongkiu** (Ĉinstila pentraĵo de Pan Tiansou)

La Penso de Maŭ Zedong Estas Triumfa Standardo de la Granda Revolucio de la Ĉina Popolo

Jene estas traduko de la ĉefartikolo de "Ĵenmin Ĵibaŭ" publikita la 30-an de septembro, 1960, en celebrado de la eldonado de la 4-a volumo de la "Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong" — Red.

ESTAS eldonita la 4-a volumo de la "Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong". En tiu ĉi volumo estas kolektitaj la gravaj verkoj de kamarado Maŭ Zedong verkitaj dum la periodo de la kapitulaco de Japanio en 1945 ĝis la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko en 1949, kiun ni kutime nomas la periodo

de la Tria Enlanda Revolucia Milito aŭ la periodo de la Liberiga Milito de la Ĉina Popolo. En tiu ĉi nova periodo de la granda revolucio de la ĉina popolo, sub la gvidado de la Ĉina Komunista Partio kun Kamarado Maŭ Zedong ĉe la kapo, la ĉina popolo finfine renversis ĝisfunde la reakcian regadon de im-

epokon de kapitalismo al socialismo. La vojo de la Oktobra Revolucio spegulis la universon leĝon de aparta historia stadio en la longa evolua vojo de la homa socio, disvolvis kaj briligis la grandan instruon de marksismo-leninismo pri proletara revolucio kaj proletara diktaturo, kaj fariĝis la komuna vojo al socialismo kaj komunismo por ĉiuj subpremataj nacioj kaj ĉiuj subpremataj popoloj tra la tuta mondo.

Sovetunio, la grandioza rezultato de la Oktobra Revolucio, akiris brilajn sukcesojn en la socialisma kaj komunisma konstruado dum la 43 jaroj. Nun, Sovetunio jam fariĝis socialisma, unuaranga potenco kun moderna industrio, moderna agrikulturo kaj modernaj scienco kaj kulturo. En la gravaj branĉoj de scienco kaj tekniko, Sovetunio jam malproksime postlasis Usonon. Sub la gvidado de la Centra Komitato de la Sovetunia Komunista Partio kun kamarado Ĥruŝĉov ĉe la kapo, la popolo de Sovetunio estas sukcese efektiviganta la grandiozan Sepjaran Planon por ĉiuflanka disvolvo de komunisma konstruado.

Grandajn kontribuojn Sovetunio faris ĉu en la batalo kontraŭ imperiisma agresado por la defendo de la mondpaco, ĉu en la subtenado al la liberigaj bataloj de la subpremataj nacioj kaj la revoluciaj bataloj de la subpremataj popoloj, ĉu en la plifortigado de la potenco de la socialisma tendaro. Same kiel la aliaj popoloj de la tuta mondo, la ĉina popolo sentas senliman ĝojon kaj kuraĝigon pro la grandaj sukcesoj de la frata popolo de Sovetunio.

Nun, ni estas vizaĝanta al bonega situacio de la kontraŭimperiisma batalo de la tutmonda popolo. Same kiel Sovetunio, ankaŭ Ĉinio kaj la aliaj socialismaj landoj akiris grandajn sukcesojn en la socialisma konstruado, kaj la tuta socialisma tendaro estas prosperiĝanta kun ĉiu tago. La movado de nacia, demokratia revolucio en Azio, Afriko kaj Latinameriko estas vivplene disvolviĝanta. La revolucia batalo de la popoloj en la kapitalismaj landoj kaj la tutmonda pacdefenda movado ambaŭ ricevis vastan disvolviĝon. Nun, la forto de la socialisma tendaro jam superis

periismo, feŭdismo kaj burokrata kapitalismo, fondis respublikon de popol-demokratia diktaturo gvidata de la proletaro kaj baziĝanta sur la alianco de la laboristaro kaj kamparanaro, kaj tiel plenumis la aferon de nacia kaj demokratia revolucio de la ĉina popolo dum pli ol cent jaroj. Dum tiu ĉi periodo, kamarado Maŭ Zedong plue kombinis la universalan veron de marksismo-leninismo kun la konkreta praktiko de la ĉina revolucio, kaj daŭre pliriĉigis kaj disvolvis la teoriojn kaj taktikojn de la ĉina revolucio. La venko gajnita de la ĉina popolo sub la gvidado de kamarado Maŭ Zedong estas alia grandioza venko en la homa historio, post la grandaj venkoj de la Oktobra Revolucio kaj kontraŭfaŝisma milito. Tiu ĉi venko kreis novan eraon en la ĉina historio, malfermis grandan breĉon sur la orienta fronto de imperiismo, ege plifortigis la socialisman tendaron kun Sovetunio ĉe la kapo kaj ankoraŭfoje ŝanĝis la fizionomion de la mondo. La venko de marksismo-leninismo en tia granda lando en la oriento, pruvis per nedisputebla

fakto, ke marksismo-leninismo estas universala vero ĉiam triumfa kaj ĉie aplikebla tra la tuta mondo.

Post la finiĝo de la Kontraŭjapana Rezistmilito, la ĉina reganta kliko de la grandaj bienuloj kaj grandaj burĝoj reprezentataj de Ĉiang Kajŝek, intencis uzurpi la fruktojn de venko en la Kontraŭjapana Rezistmilito. La japana imperiismo estis forpelita de la ĉina popolo, sed entrudiĝis la usona. La reganta Ĉiang-Kajŝek-kliko ja volis, ke sub la dispono de la usona imperiismo Ĉinio fariĝu denove duonkolonia kaj duonfeŭda lando sub la diktaturo de la grandaj bienuloj kaj grandaj burĝoj. Tio estas vojo reakcia, kontraŭrevolucia. La Ĉina Komunista Partio kaj la ĉina popolo firme oponis la reakcian, kontraŭrevolucion vojon de Ĉiang Kajŝek, firme oponis, ke Ĉiang Kajŝek denove forvendu Ĉinion al la usona imperiismo, volis defendi la fruktojn de venko de la ĉina popolo kaj postulis la starigon de nova Ĉinio de la popolamasoj sub la gvidado de la proletaro. Tio



tiun de la imperiisma tendaro, la forto de la popolo jam superis tiun de la reakciuloj kaj la forto de paco jam superis tiun de milito. Se nur la popoloj de la tuta mondo ankoraŭ pluan paŝon unuiĝos, kune formos plej vastan internacian unuecan fronton kontraŭ la imperiisma agresa potenco kun Usono ĉe la kapo kaj batalos persisteme kaj senlace, certe estos eble preventi lanĉadon de nova mondmilito fare de la imperiismo, efektiviĝi pacan kunekzistadon de landoj kun malsamaj socisistemoj kaj konservi la mondpacon.

La ĉina popolo kore dankas al Sovetunio pro la grandaj helpoj al la revolucio kaj konstruado de Ĉinio. En sia komuna batalado kontraŭ la malamikoj, eternaj kaj nerompeblaj amikeco kaj unuiĝo formiĝis inter la ĉina kaj sovetunia popoloj. Tiu ĉi unuiĝo jam trapasis sukcese historiajn provojn kaj ĝi ankaŭ sukcese trapasos historiajn provojn en la estonteco. Oni vidos, ke la 860 milionoj da popolanoj de Ĉinio kaj Sovetunio ĉiam

staros kune en ĉia ajn situacio, ĉu okazos grandaj uraganoj aŭ malfaciloj en la mondo. **(Entuziasma aplaŭdado.)** La plifortigo de la unuiĝo inter Ĉinio kaj Sovetunio, la plifortigo de la socialisma tendaro kun Sovetunio ĉe la kapo, estas la plej sekura garantio por la aferoj de la tutmonda popolo por paco, demokratio, naciliberigo kaj socialismo. La Ĉina Komunista Partio kaj la ĉina popolo ĉiam defendas kaj plifortigas tiun ĉi unuiĝon, kaj ili kredas, ke tiu ĉi unuiĝo nepre pliapaŝe firmiĝos kaj disvolviĝos surbaze de marksismo-leninismo. **(Aplaŭdado.)**

Vivu la granda Oktobra Socialisma Revolucio!

Vivu la granda Sovetunio!

Vivu la socialisma tendaro kun Sovetunio ĉe la kapo!

Vivu la eterna kaj nerompebla amikeco inter la popoloj de Ĉinio kaj Sovetunio!

Vivu la mondpaco! **(Entuziasma aplaŭdado.)**



Triumfo Marsu Antaŭen sub la Gvido de la Brila Penso de Maŭ Zedong!

Kolektiva lignogravuraĵo de Ĝegiang-a Belarta Instituto

ĉi estas revolucia vojo de popola liberigo. La batalo por la fina decido de venko aŭ malvenko inter la du sortoj kaj du perspektivoj antaŭ Ĉinio estis la historia fono de la 4-a volumo de la "Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong".

La ĉina popolo travivis jardekojn da interna milito kaj poste aliajn ok jarojn da Kontraŭjapana Rezistmilito. Tial, post la finiĝo de la Kontraŭjapana Rezistmilito, la ĉina popolo deziris pacon en sia lando, kaj oponis ke Ĉiang Kajŝek denove lanĉu kontraŭrevolucion enlandan militon. La Ĉina Komunista Partio travidis la intrigon de Ĉiang Kajŝek en preparo de kontraŭrevolucia interna milito, sed ankoraŭ klopodis kun grandaj peno kaj pacienco serĉi vojon por eviti internan militon kaj realigi pacon. Por tiu celo, kamarado Maŭ Zedong persone vizitis Ĉongking kaj traktis kun Ĉiang Kajŝek dum pli ol unu monato. La Ĉina Komunista Partio elmetis projekton por realigi enlandan pacon, kaj post la malakcepto de la unua, elmetis la duan, post la malakcepto de la dua, la trian, la kvaran, multfoje ripetis tian klopodon, kaj faris eblajn cedejn sub la promiso ne damaĝi la bazajn interesojn de la popolo. Tiu ekstreme pacienca kaj grandanima sinteno de la Ĉina Komunista Partio gajnis la simpatian de la tuta popolo. Kaj sub la premo de la popolo, Ĉiang Kajŝek estis devigita subskribi la interkonsenton kun la Ĉina Komunista Partio pri "Paca Konstruado de la Lando". Sed li

ĉiam obstine rifuzis rekoni la leĝan pozicion de la popola armeo kaj la demokratia regpotenco en la liberigitaj regionoj kaj ne volis atingi interkonsenton kun la Ĉina Komunista Partio pri la problemoj de la popola armeo kaj la liberigitaj regionoj. Poste, la Ĉina Komunista Partio kaj aliaj partioj okazigis ankaŭ la Politikan Interkonsiligan Konferencon kun Kuomintango kaj estis akceptitaj la "Programo de Paca Konstruado de la Lando" kaj kvin principoj por la reorganizado de la nacia registaro. Ĉiuj ĉi tiuj

interkonsentoj estis fruktoj de la energia klopodado de la Ĉina Komunista Partio kaj la tuta popolo.

"La jam atingitaj interkonsentoj," elmontris kamarado Maŭ Zedong, "restas ankoraŭ nur surpaperaĵoj. La surpaperaĵoj ja ne egalas al realaĵoj. Faktoj montras, ke por ilin ŝanĝi en realaĵojn ankoraŭ necesas tre granda penado." Tial, malgraŭ la ekzisto de pacaj interkonsentoj, altintensa gardemo devis esti tenata kontraŭ la intrigoj de Kuomintango por subfosi pacon.

Unuvorte, dum intertraktado pri paco, ni devas unuflanke fari ĉion eblan por akiri pacon, kaj aliflanke senĉese malkaŝi la trompaĵojn de la "paco" — ludado de la malamiko, por ke la vastaj popolamasoj klare vidu la veran vizaĝon de la malamiko; ni devas unuflanke insisti pri la principoj kaj defendi la bazajn interesojn de la popolo, kaj aliflanke permesi certajn necesajn cedejn sub la principo ne damaĝi la bazajn interesojn de la popolo; ni devas esti nek kredemaj al la promesoj de la malamiko, nek timemaj antaŭ iliaj minacoj; ni devas firme tenadi la interkonsentojn jam atingitajn en la intertraktado, kaj samtempe antaŭzorgi pri tio ke la malamikoj subite atakas disŝirante la interkonsentojn, kaj decide rebati la malamikojn kiam ili faras atakon.

La reakciularo malplej volas pacon. En julio de 1949, disŝirante ĉiujn interkonsentojn atingitajn en la intertraktado de Kuomintango kaj la Ĉina Komunista Partio kaj en la Politika Interkonsiliga

Konferenco, Ĉiang Kajšek lanĉis ĉiuf flankan atakon al la liberigitaj regionoj. Tiamaniere, Ĉiang Kajšek plene malkaŝis sian ekstreme kruelan kaj ekstreme intrigeman vizaĝon kaj metis sin en pozicion plene izolitan de la tuta popolo. Dume ĉe la revolucia flanko, formiĝis plej vasta popoldemokratia unuigita fronto gvidata de la proletaro kaj ĝia politika partio, surbaze de la alianco inter laboristaro kaj kamparano, politike okupante senprecedence favoran pozicion kaj posedante absolutan superecon. Tiu ĉi ŝanĝiĝo de politika situacio plene konfirmis la konkludon de la konkreta klasa analizo kiun faris kamarado Maŭ Zedong pri la tiama ĉina socio aplikante marksismo-leninismen. Tia konkludo de kamarado Maŭ Zedong armis en spirito la tutan popolon kaj multege altigis la fidon de la tuta popolo en la batalakiro de la venko de la revolucio. Dum la unua jaro de la Liberiga Milito (de julio de 1946 ĝis junio de 1947), sub la grandskala helpado de usona imperiismo, Ĉiang Kajšek estis provizore en pozicio de strategia ofensivo, dume la Popola Liberiga Armeo en tiu de strategia defensivo. En tiu stadio, la centra tasko de nia Partio estis plene frakasi la armitan ofensivon de Ĉiang Kajšek per sindefenda milito. En multaj gravaj dokumentoj, kiujn li verkis dum tiu ĉi periodo, kamarado Maŭ Zedong klare elmontris la vojon al la venko de la revolucia milito, kritikis la penson de dekstrema oportunismo kaj la teorion ke "ĉion decidu armiloj", kiuj tro alte taksis la forton de la malamikoj kaj ne kuraĝis ilin kontraŭbatali, kaj elmetis operaciajn principojn de la Popola Liberiga Armeo kaj la principon fari la liberigan militon vasta popola milito. Kamarado Maŭ Zedong profunde analizis la enlandan kaj internacian situacion, kaj elmetis la faman tezon ke "ĉiuj reakciuloj estas papertigroj". Kamarado Maŭ Zedong opiniis, ke konsiderante laŭ la esenco, laŭ la tendenco de la historia evoluo kaj laŭ la situacio de la lukto en ĝia tuto, oni devas rigardi senescepte ĉiujn ŝajne fortajn reakciulojn papertigroj, kaj ke la revolucia popolo havas plenan kaŭzon por ilin malestimi kaj devas laŭ tio starigi sian strategian penson. Dum malestimante la malamikojn strategie, kamarado Maŭ Zedong elmontris, oni tamen devas ilin plene taksi taktike. La operacia metodo "koncentri superan militforton por ekstermi la malamikojn popece aparte" kiun li elmetis, enkorpiĝas en militaj aferoj la principon "plene taksi la malamikon taktike". En la situacio ke la malamika armeo estis forta kaj la nia malforta kaj la malamika armeo estis granda kaj la nia malgranda, la aplikado de tiu ĉi operacia metodo en la Liberiga Milito transformis la strategian superecon de la malamika armeo super

la nia en la superecon de nia armeo super la malamika en kampanjoj aŭ bataloj, efektivigis la celon senĉese ekstermi la efektivajn fortojn de la malamikoj kaj fine rezultigis ke la Popola Liberiga Armeo transpasis de defensivo al ofensivo, dume la malamikoj de ofensivo al defensivo.

En decembro de 1947, kamarado Maŭ Zedong elmontris en la artikolo *La Nuna Situacio Kaj Nia Tasko*: "La Ĉina Popola Liberiga Armeo jam sur la ĉina tero turnis la kontraŭrevolucion radon de la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj, la bandita kliko de Ĉiang Kajšek, sur la vojon al perejo, kaj antaŭenpuŝis sian revolucion radon sur la vojon al venko. Tio ĉi estas turnopunkto historia." En la situacio de la granda disvolviĝo de la revolucio, kamarado Maŭ Zedong elmontris plue: "Nun la malamikoj jam estas tute izolitaj. Sed la izoliĝo de la malamikoj ne signifas nian venkon. Se ni faros eraron en politiko, ni ankoraŭ ne povos gajni la venkon." Por akiri la venkon de la revolucio, estas necese meti ĉiujn politikojn de la partio sur la ĝustajn relojn. Kaj samtempe, por garantii korektan plenumadon de la partiaj politikoj, la disciplinemo de la partio kaj la revoluciaj vicoj devas esti ankoraŭ pli fortikigita, kaj certaj manifestoj de sendisciplineco kaj senorganiziteco devas esti venkitaj. La enhavo de multaj el la verkoj de kamarado Maŭ Zedong dum tiu stadio temis pri la politikoj de la partio en diversaj kampoj kaj ĝiaj organizaj linioj, inkluzive, inter aliaj, la dek gravajn militajn principojn, la tri-punktan gravan ekonomian programon, la ĝeneralan linion kaj ĝeneralan politikon de agrara reformo, la revolucion unuigan fronton, la popolan regpotencon, la konstruadon de la partio kaj labormetodojn k.t.p. La tuta serio da politikoj kaj principoj elmetitaj de kamarado Maŭ Zedong garantiis la landskalan venkon de la revolucio.

Post la venka finiĝo de la tri plej grandaj decidigaj kampanjoj ĉe la regionoj Liaŭ-Ŝen, Huaĵ-Haj kaj Ping-Gin, la popola liberiga milito de Ĉinio enpaŝis la stadion de fina venko, kaj la venko de la ĉina revolucio jam estis findecidita. Por sin savi de perejo, la reakcia kliko de Ĉiang Kajšek tiutempe ludis novan paco-intrigon, intencante konservi la postrestintajn fortojn de la Kuomintang-a Registaro, gajni tempon por ekspiro kaj poste releviĝi por estingi la revolucion. Malgraŭ tio, la Ĉina Komunista Partio kun kamarado Maŭ Zedong ĉe la kapo, ankoraŭ konsentis intertrakti kun ĝi sub kondiĉoj vere favoraj al la popolo por rapide fini la militon, efektivigi veran pacon kaj malpliigi la suferojn de la popolamasoj. Samtempe kamarado Maŭ Zedong ĝustatempe malkaŝis la trompon de la reakciularo kun marksisto-

leninista neŝancebleco kaj radikaleco en revolucio, kaj kritikis la iluzion de paca kompromiso kaj la proponon de la t. n. "tria vojo" disvastigatajn de la burĝaj dekstruloj. Kamarado Maŭ Zedong elmetis la grandan alvokon "konduki la revolucion ĝis la fino". Li elmontris, ke la demando antaŭ la ĉina popolo estas: "Ĉu konduki la revolucion ĝis la fino aŭ ĝin forlasi duonvoje? Se oni volas konduki la revolucion ĝis la fino, oni devas do per revoluciaj metodoj, senŝancele, ĝisfunde, senrezerve kaj komplete ekstermi ĉiujn reakciajn fortojn, kaj fondi en landa skalo respublikon de popoldemokratia diktaturo sub la gvidado de la proletaro kun la alianco de laboristaro kaj kamparanaro kiel la ĉefa korpo". Konduki la revolucion ĝis la fino signifas plene detruigi la regadon de imperiismo, feŭdismo kaj burokrata kapitalismo en Ĉinio kaj samtempe sin pretigi por transformi la burĝan demokratian revolucion de Ĉinio en socialisman revolucion. Kaj ĝuste en tiu tempo, kamarado Maŭ Zedong kreive elmetis serion da principoj kaj politikoj koncerne al la problemo de la transformiĝo de la ĉina revolucio. En sia raporto al la Dua Plena Sesio de la Sepa Centra Komitato de la Ĉina Komunista Partio kaj en la artikolo *Pri la Popol-domokratia Diktaturo*, kamarado Maŭ Zedong teorie eksplikis detale la principojn kaj politikojn koncerne al la problemo de transformiĝo de la revolucio kaj metis tiun taskon antaŭ la tutan partion kaj tutan popolon. Kaj la ĉina revolucio antaŭen marŝis ĝuste laŭ la direkto montrita de kamarado Maŭ Zedong.

La novdemokratia revolucio de Ĉinio estas tipa ekzemplo de burĝa demokratia revolucio sub la gvidado de la proletaro. En sia verko *Du Taktikoj de la Socialdemokratio en Demokratia Revolucio*, Lenin elmontris jenajn fundamentajn taktikajn principojn de la partio en la novtipa burĝa demokratia revolucio: la proletaro povas kaj devas fariĝi la gvidanto de la burĝa demokratia revolucio; en la momento, kiam maturiĝis revolucio, armita revolucio de la popolo estas la plej grava rimedo por renversi despotismon kaj batalakiri sistemon de demokratia respubliko; la proletara partio devas plene sinpretigi por ektransformi burĝan demokratian revolucion en la socialisman. Ĉiuj ĉi tiuj principoj de marksismo-leninismo estas kreive aplikitaj kaj disvolvitaj en la revolucia movado de Ĉinio gvidata de la Ĉina Komunista Partio. La verkoj de kamarado Maŭ Zedong, precipe la ĵus eldonita 4-a volumo de la "Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong" koncentre esprimas tian kreivan aplikon kaj disvolvon. La ĉina revolucio sub la gvidado de la proletaro kaj ĝia partio estas vera granda revolucio de la popolo. Dum la

Tria Enlanda Revolucia Milito de Ĉinio, la Ĉina Komunista Partio firme plenumis la grandan principon elmetitan de kamarado Maŭ Zedong "kuraĝe mobilizi la amasojn, ekspansiigi la popolajn fortojn, kaj, sub la gvidado de nia partio, venki la invadantojn kaj konstrui novan Ĉinion", kaj mobilizis plej vaste la popolamasojn, ĉefe la laboristojn kaj kamparanojn kiuj formas la plejparton de la loĝantaro, kaj samtempe mobilizis ankaŭ la revoluciajn progresemajn intelektulojn, altirante ilin en la revoluciajn batalojn. Kaj tio kaŭzis ke la profundeco kaj vasteco de la ĉina revolucio ambaŭ atingis senprecedence altan gradon.

En la artikolo *Forĵetu Iluziojn, Sin Preparu por Batalo*, kamarado Maŭ Zedong resumis la logikon de imperiismo kaj ĉiuj reakciuloj rilate al la popola afero kaj la logikon de la afero de popola revolucio. La antaŭa estas "intrigo, malvenko, denove intrigo, denove malvenko, kaj tiel ĝis pereco"; la lasta estas "batalo, malvenko, denove batalo, denove malvenko, denove batalo, kaj tiel ĝis venko". La historio de la batalo de la ĉina popolo kontraŭ imperiismo kaj ĝiaj lakeoj dum pli ol cent jaroj, la historio de la novdemokratia revolucio sub la gvidado de la Ĉina Komunista Partio dum la pasintaj 28 jaroj kaj la historio de la 4-jara Liberiga Milito atestas, ke tiel ja estis la fakto. La kontraŭdiroj estas nepacigeblaj kaj nur batalado povas ilin solvi. Kiu ne konas ĉi tion, tiu falos en la marĉon de oportunismo kaj reviziismo. Diversaj estas la formoj de klasbatalo. Revolucia armita batalo ne estas laŭplaĉe lanĉebla ĉiam ajn kaj ĉie ajn laŭ subjektiva supozo. Por lanĉi revolucion armitan batalon, oni nepre devas bone pritaksi la kondiĉojn de objektivaj kaj subjektivaj eblecoj, bone pritaksi la maturecon de revolucia krizo dum la koncernata tempo kaj en la koncernata loko. Estas erare ne bone pritaksi tiujn ĉi kondiĉojn kaj ne voli fari penigan laboron por akumuli revoluciajn fortojn, laŭplaĉe lanĉi armitan batalon. Sed en tempo kiam, kaj en loko kie revolucia krizo jam estas matura, kiam la reganta klaso ekuzas forton por subpremi revolucion kaj la revolucia klaso jam estas tiel forta ke ĝi, kiel Lenin diris, "povas lanĉi fortan amasan revolucion agadon por renversi (aŭ frakasi) la malnovan registaron", kuraĝi aŭ ne kuraĝi levi armilojn por fari firman luktadon kaj renversi la reakcian regadon, ja estas demando de fundamenta principo koncernanta al la fideleco aŭ malfideleco al la intereso de la popolo, kaj persistado aŭ ne persistado sur la revolucia starpunkto. Parolante pri la Tria Enlanda Revolucia Milito en sia politika raporto al la Oka Tutlanda Kongreso de la Partio, kamarado Liu Ŝaŭki diris:

“Kontraŭe al la reakciuloj, la popolo ne estas militema. . . . Sed kiam la popolo estas devigata ekpreni armilojn, estas tute prave, ke la popolo tion faras. Kontraŭi al tia faro de la popolo kaj postuli ke la popolo submetiĝu antaŭ la atakantaj malamikoj estas linio oportunisma. Tie ĉi, ĉu sekvi revolucion linion aŭ sekvi oportunisman linion estas grava problemo koncernanta la demandon, ĉu la sescent-miliona popolo devas transpreni la regpotencon aŭ ne, kiam maturiĝis la oportuna momento.” Ĝuste pro tio, ke nia partio sub la gvido de kamarado Maŭ Zedong sekvis la revolucion linion neakordeblan kun oportunismo, kaj kuraĝis batali kaj venki, nun ni havas la hodiaŭan Ĉinan Popolan Respublikon de popoldemokratia diktaturo.

La eldoniĝo de la 4-a volumo de la “Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong” ĝuste en la tempo de la 11-a datreveno de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko aldonas plian brilon al nia festo. Ni varmege celebras la grandan feston. Ni varmege celebras la eldoniĝon de la granda marksismo-leninisma verko, en kiu kristaliĝis la venkaj spertoj de la ĉina revolucio. Ni kredas, ke sekve de la eldoniĝo de la 4-a volumo de la “Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong” formiĝos nova tajdo de lernado de marksismo-leninismo kaj de la verkoj de kamarado Maŭ Zedong. Nia tuta kadraro kaj la tuta popolo, tra tia lernado, ankoraŭ pli bone komprenos kaj mastros marksismo-leninismen, ankoraŭ pli bone komprenos kaj mastros la penson de Maŭ Zedong, kombinantan la universalan veron de marksismo-leninismo kun la konkreta realo de Ĉinio, plialtigos siajn teoriant nivelon kaj ideologian-politikan nivelon, aplikos tiun ĉi grandan pensbatalilon kaj plene disvolvos la spiriton kombini senliman energion kun scienca analizo, klopodos antaŭenpuŝi la socialisman revolucion kaj socialisman konstruadon, plifortigos la batalon kontraŭ imperiismo kaj moderna reviziismo, kaj plifortigos la pacdefendan batalon, luktante kaj klopodos por konstrui nian landon en grandan socialisman landon kun moderna industrio, moderna agrikulturo kaj modernaj scienco kaj kulturo.

Triumfe ni antaŭenmarŝu, alte tenante la standardon de la penso de Maŭ Zedong!

* La batalo de Liaŭ-Ŝen involvis la terenon de la okcidenta parto de Liaŭning-provinco kaj la urboj Ŝenjang kaj Ĉangĉun; tiu de Huaj-Haj involvis la terenon oriente de Hajĝoŭ okcidente ĝis Ŝangkiu, norde de Linĉeng (nuna Hjueĉeng) sude ĝis Huaj-rivero; tiu de Ping-Gin involvis la urbojn Bejping (nuna Pekino), Tiangin, Ĝanggiakoŭ, Tanggu, Tangŝan k. a. punktojn.



Tra la Tuta Lando Iras la Prezidanto

— Popolkanto el Hebej-provinco —

Ilustris Li Ki


*Tra la tuta lando iras la Prezidanto,
Ĝojas ĉiuj montoj, ĉiuj flurubandoj.
Man-levante Omej* jen trezor-oferas,
Vost-svingante Huangho** viglas kun ĝojkantoj.*

*Tra la tuta lando iras la Prezidanto,
Ĉiuj laboruloj viglas jubilantaj.
Gren- kaj koton-montoj — jen ĉielskrapantoj,
Fer' kaj ŝtal' torentas en rivergigantoj.*

Trad. Laŭlum

* Nomo de ĉina monto fama pro siaj alteco kaj beleco.

** Huangho=La Flava Rivero.



Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj (sur la podio) salutanta la eminentajn gastojn, kamaradojn kaj amikojn ĉe la akcepta kunveno memore de la 11-a datreveno de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko.

Foto de Lju Hoŭmin

Parolado de Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj

Ĉe la akcepta kunveno memore de la 11-a datreveno de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko

Estimataj Gastoj,

Kamaradoj kaj Amikoj,

Ni sentas grandan honoron kaj ĝojon, ke ni povas celebri en ĝoja kunveno la grandan festotagon de nia popolo, kune kun vi, preskaŭ du mil eminentaj gastoj el pli ol sepdek landoj kaj regionoj je la antaŭvespero de la 11-a datreveno de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko. Hodiaŭ ĉeestas inter ni Ĉefministro U Nu kaj Generalo Ne Ŭin de nia parence amika najbarlando, la Unio de Birmo, Ĉefministro Abbas, la gvidanto de la alĝeria popolo persistanta en batalado por sia nacia liberiĝo, Vicprezidanto de la Konsilantaro de ministroj Kellezi, sendito de la heroaj albanaj fratoj, kaj ankaŭ famekonataj personoj el sferoj de politiko, ekonomio, militafero, kulturo, scienco, fizika kulturo kaj aliaj, venintaj de Sovetio kaj aliaj socialismaj landoj kaj el landoj de Azio, Afriko, Latinameriko, Okcidenta Eŭropo, Norda Ameriko kaj Aŭstralio. Via honora

ĉeesto alportis al ni profundan amikecon de la popoloj de viaj landoj, kaj multe plibriligis nian nacian festotagon. Por la ĉinaj popolo kaj registaro, mi respektive direktas al vi, eminentaj gastoj, korajn dankojn kaj salutojn kun alta estimo.

Dum la pasinta jaro, la ĉina popolo, sub la gvido de la Ĉina Komunista Partio kaj Prezidanto Maŭ Zedong, alte levante la tri ruĝajn standardojn de la ĝenerala linio, la granda antaŭensalto kaj la popola komunumo, atingis novajn, kaj grandajn sukcesojn en ĉiuj sferoj de nia socialisma konstruado, kaj daŭre pliriĉigis nian sperton de konstruado. La granda heroo aspiro de la ĉina popolo estas konstrui la landon, en ne tro longa tempo kaj per kompare alta rapideco, en tiun kun moderna industrio, moderna agrikulturo kaj modernaj scienco kaj kulturo. Nia sperto dum la pasintaj dek unu jaroj, precipe dum la lastaj tri jaroj, pruvis ke ni povas plenumi tiun ĉi grandiozan kaj malfacilegan taskon.

慶祝國慶

Solenu la Nacian
Festotagon!

*Kolektive pentris la Po-
pola Belarta Eldonejo*



CELEBRADO

*Lignogravuraĵo
de Hiaŭ Gin*

Kompreneble, ni sobre prikalkulis ke diversaj malfacilaĵoj estos nepre renkontataj sur la vojo de disvolvado, sed la malfacilaĵoj de kiu ajn flanko venantaj, ne povos timigi la multon travivintan ĉinan popolon armitan per marksismo-leninismo, sed nur instigos ilin al ankoraŭ pli energia klopodado por venki la malfacilaĵojn kaj heroe marŝi antaŭen. Samtempe, ni ankaŭ klare scias ke en la mondo sin trovas manpleno da homoj — la imperiistoj kaj iliaj sekvantoj, kiuj neniam havas bonvolon al ni, nek ĉesigis iam la malbenadon kaj kalumniadon kontraŭ ni, kaj ĉiam deziras la fiaskon de nia afero. Sed ilia ĥimera revo neniam realiĝos. Ju pli ili atakas nin, des pli estas pruvita ke la afero de la ĉina popolo estas justa kaj ke ĝia vojo estas ĝusta. La socialisma nova Ĉinio, prospera kaj potenca, same kiel ĉiuj aliaj socialismaj landoj, nur feliĉigos la mondon kaj absolute ne alportos al iu ajn minacon. Ĝuste pro tio, nia afero gajnis la subtenon de ĉiuj popoloj kaj unue, de la popoloj de Sovetio kaj aliaj socialismaj landoj. La ĉina popolo multe dankas kaj ĉiam bezonas tian internacian subtenon. La ĉina popolo certe neniam vanigos la esperojn kaj kuraĝigojn al ni faritajn de tiuj popoloj, ni nepre kun pli granda decidemo triumfe marŝos antaŭen al la fiksita celo laŭ la difinita vojo.

La ĉinaj popolo kaj registaro ĉiam persistas pri sia paca eksterlanda politiko pledante por la paca kunekzistado inter landoj kun malsamaj socisistemoj,

por la solvado de ĉiuj internaciaj disputoj per paca intertraktado, sed ne per milita forto, kaj kune kun la tutmondaj pacamaj popoloj kaj landoj klopodadas persiste kaj senlace por kontraŭstari la imperisman agreson kaj defendi la mondpacon. La ĉinaj popolo kaj registaro ĉiam fidele gardas la solidarecon de la socialisma tendaro, ĉe kies kapo staras Sovetio, subtenas la pacajn iniciatojn faritajn de Sovetio kaj aliaj socialismaj landoj koncerne al ĝenerala malarmado, la malpermeso de nukleaj armiloj kaj la malintensigo de internacia situacio. La ĉina registaro ĉiam fidele observas la kvin principojn de paca kun-



ekzistado, neniam ŝparas penon por disvolvi amikajn kaj kunlaborajn rilatojn kun ĉiuj aliaj pacamaj landoj. En la kuranta jaro, ni kontraktis sinsekve traktatojn de amikeco kaj reciproka neagreso aŭ de paco kaj amikeco kun la registaroj de la Unio de Birmo, la Reĝlando de Nepalo, la Reĝlando de Afganio kaj la Respubliko de Gvineo respektive. Kun la registaro de la Unio de Birmo, ni fine solvis komplete kaj ĝisfunde la longtempe pendintan landliman problemon, postlasitan de la imperiismo, surbaze de la kvin principoj de paca kunekzistado kaj en la spirito de reciproka komprenemo kaj reciproka cedo, kaj morgaŭ oni oficiale subskribos la landliman traktaton inter la du landoj. Kun la registaro de Indonezio, ni jam atingis ankaŭ interkonsenton pri la praktika aplikado de la traktato de duobla nacieco; kaj ni faras kun la registaro de la Reĝlando de Nepalo, amikan kaj fruktodonan intertraktadon por radikale solvi la landliman problemon inter ambaŭ landoj. Malgraŭ ke la usona imperiismo obstine persistas en sia politiko malamika kaj agresema kontraŭ Ĉinio, tamen, la ĉina registaro ankoraŭ sin tenas je plej granda sinregemo kaj pacienco, faris por cent fojoj ambasador-nivelan interparoladon kun la usona registaro. Plie la ĉina registaro plurfoje proponis ke la landoj de Azio kaj ĉirkaŭ Pacifiko, inkluzive de Usono, kontraktu pacan pakton de reciproka reagreso, ke tiu ĉi regiono liberiĝa de nukleaj armiloj. Ĉiuj ĉi tiuj faktoj plene pruvis, kiel la ĉinaj popolo kaj registaro per sincera kaj praktika agado klopodadas reale por defendi la mondpacon. La imperiismo kaj ĝiaj sekvantoj ĉiam vane klopodas makuligi la internacian prestiĝon de Ĉinio per kalumnioj kaj mensogoj, ke Ĉinio estas "militema" kaj "agresema", por izoli ĝin en la mondo. Sed ilia intrigo neniam sukcesos. La decidemo de la ĉina popolo batali por paco povas elteni la provon de la tempo kaj neniam ŝanceliĝos.

La nuntempa ĝenerala situacio daŭre disvolviĝas en direkto favora al la paco kaj la popolo. Malgraŭ ke la imperiismaj fortoj de milito faris serion da furiozaj kontraŭatakoj, sed ili neniel povas malhelpi la disvolviĝon de la fortoj de paco kaj la fortoj de la popolo, aŭ sin eltiri el la stato de ĉiam pli kreskanta izoleco kaj pasiveco. Subtenate de la potenco, solidara tendaro socialisma, grandioza popola movado por kontraŭstari la imperiismon kaj koloniismon, por batalakiri kaj defendi mondpacon, nacian sendependecon, demokration kaj liberecon jam leviĝis mondscale, kaj fariĝas ĉiam pli strikte kunordigita. Tio ĉi ne povas ne forte timigi kaj maltrankviligi la imperiistojn kaj koloniistojn. Tamen, sennombraj faktoj diris al ni ke la im-

periismo kaj koloniismo neniam propravoле descendos de sur la historia scenejo. Ju pli ili proksimiĝas al la morto, des pli ili baraktos malespere. La imperiisma bloko kun Usono ĉe la kapo plintensigas nun sian armadon kaj militpreparadon, senĉese faras militajn provokojn kaj minacojn kontraŭ la socialismaj landoj, kaj spite al la ripetitaj proponoj de Sovetio, ĉiurimede obstaklas la vojon al interkonsento pri la problemo de ĝenerala malararmado; obstine persistante pri kontrolo kaj inspekto sen malararmado. Aparte atentinda estas tio ke la usona imperiismo nun intencas disetendi la serion da krimaj agoj, kiujn ĝi faris agresante Konglandon sub la standardo de la Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj, al la tuta Afriko kaj aliaj regionoj de la mondo. La intrigo de la usona imperiismo estas nenio alia ol unu paŝon pli utiligi kaj superregi UNO-n, por efektiviĝi sian novan koloniismon. Unuflanke ĝi intensigas sian rabadon kaj intervenon, sub la nomo de "helpo" al la landoj subevoluintaj; aliflanke, ĝi instigas azianojn batali kontraŭ azianoj, afrikanojn kontraŭ afrikanoj kaj latinamerikanojn kontraŭ latinamerikanoj, por ruinigi kaj subpremi la batalojn por nacia sendependecon kaj demokratio en Azio, Afriko kaj Latinameriko. La miellanga sed malickora parolado ĵus farita de la usona prezidanto Eisenhower ĉe la Dekkvina Sesio de la Ĝenerala Asembleo de UNO, estas ekzakte la plena malkaŝo de tiu krima plano. Ĉiuj ĉi tiuj faktoj montras ke la tutmonda popolo ankoraŭ alfrontas malfacilegan kaj kompleksan bataltaskon. La fortoj de socialismo, de nacia sendependa movado kaj de popola revolucia batalo kaj ĉiuj porpacaj fortoj de la tuta mondo devas ankoraŭ unu paŝon pliuuiĝi por organizi sin en plej vastan unuecan fronton kaj kunbataladi persiste. Nur tiel oni povas daŭre malsukcesigi la militpreparajn kaj agresajn agadojn de la imperiismoj, ĉe kies kapo staras Usono, kaj povas akiri ĉiam pli grandan venkon en la nobla afero por batalakiri longdaŭran pacon kaj progresadon de la homaro.

La ĉina popolo suferis dum longa tempo de imperiismo kaj koloniismo, kaj nun ankoraŭ suferas la agreson kaj militminacojn de usona imperiismo, pro tio, ni estinte, estante kaj estonte ĉiam staras sur la flanko de la subpremataj nacioj kaj popoloj. La ĉina popolo firme subtenas la popolojn de Japanio, Laŭso, Alĝerio, Konglando kaj Kubo en iliaj justaj bataloj. La ĉina popolo firme subtenas la popolojn de Azio, Afriko kaj Latinameriko en ilia batalo por akiri kaj defendi sian nacian sendependecon, ni firme subtenas la popolojn en Okcidenta Eŭropo, Norda Ameriko kaj Aŭstralio, en ilia batalo por demokratio, libereco kaj socia progreso, ni firme sub-

tenas diverslandajn popolojn en la batalado por ĝenerala malarmado, malpermeso de nukleaj armiloj, forigo de fremdlandaj militbazoj, retirĝo de eksterlandaj armeoj. La ĉina popolo konsideras la bataladon de diverslandaj popoloj kiel fortan subtenon al la ĉina popolo, kaj ankaŭ nemankeblan faktoron en defendo de la mondpaco. La ĉina popolo nepre ankoraŭ unu paŝon plu plifortigos la solidarecon kun la popoloj de ĉiuj socialismaj landoj, plifortigos la solidarecon kun la popoloj de ĉiuj landoj de la tuta mondo, kaj batalos ĝisfine por la venko de nia komunista afero.

Kamaradoj kaj amikoj drinku


por la prospero kaj disflorado de la socialisma tendaro.

por la venko de la nacia kaj demokratia movado en Azio, Afriko kaj Latinameriko,

por la venko de la popoloj tra la mondo batalantaj por la mondpaco kaj progreso de la homaro,

por la solidareco kaj amikeco inter ĉiuj pacamaj popoloj kaj landoj,

por la sano de vi eminentaj gastoj kaj amikoj el diversaj landoj ĉeestantaj la nunan akceptan kunvenon!



La 1-an de oktobro la popolanoj en Pekino solene celebris la 11-an nacian festotagon per grandioza manifestacio de 500,000 personoj. Tiun ĉi kolorriĉan pacan manifestacion revuis kune kun Prezidanto Maŭ Zedong kaj aliaj ŝtatgvidantoj de la Ĉina Popola Respubliko ĉ. 2000 honoraj gastoj el pli ol 70 landoj de la kvin kontinentoj. La supra bildo montras al ni parton de la prezidejo sur Tian-an-pordego. En la unua vico sin trovas (de maldekstre) Generalo Ne Ŭin, Ĉefministro Ĝou Enlaj, Ĉefministro Abbas, Prezidanto Maŭ, Ĉefministro U Nu, Prezidanto Liu Ŝaŭki kaj Vicprezidanto Kellezi.

Foto de Ĉen Ĝengking k Lu Hĵueĝi

Sceno el la manifestacio. La slogano signifas: Celebru la venkojn de la ĝenerala linio, la antaŭensaltego kaj la popola komunumo!

Foto de Li Gilu



Daŭra Antaŭensalto de la Ĉina Nacia Ekonomio en 1960

LA ĉina nacia ekonomio prilumata de la brilo de la tri ruĝaj standardoj—la ĝenerala linio por socialisma konstruado, antaŭensaltego kaj la popola komunumo — ĉi-jare akiris grandajn sukcesojn sur ĉiuj frontoj. En industrio, agrikulturo, komunikado, transporto kaj baza konstruado regas bonega situacio de daŭra antaŭensaltado.


La disvolviĝo de la ĉina nacia ekonomio en la pasintaj ok monatoj havas jenajn kvar karakterizaĵojn:

1. Efektivigis ĉiuflanca, daŭra antaŭensalto

La okulfrapa trajto, malsama ol tiuj de la antaŭaj jaroj, markanta la disvolvon de la nacia ekonomio en kuranta jaro estas la aperado de “dekomenca prospero” kaj “ĉiu-flanka prospero” ekde la unua tago de la jaro, kio rompis la “rutinon” de la pasintaj jaroj, ke la produkta nivelo de la unua trimestro estis malpli alta ol tiu de la kvara de la antaŭa

La Pezmaŝin-fabriko de Ginan jam plenumis sian jaran produktoplanon de 1960 je la 20-a de aŭgusto. Nun oni tie plenumas taskojn por 1961.

Foto de Lju Ĉaŭ




jaro. Ekzemple, el la totala produkt-valoro de la tutlanda industrio, la meza potaga produkt-valoro de la unua trimestro de la kuranta jaro pliiĝis je 14.6%, kompare kun tiu de la kvara trimestro de pasinta jaro. La totala kvanto de transportado en la tuta lando en la unua trimestro pliiĝis je 20%, kompare kun tiu de la kvara trimestro lastjara. Ankaŭ tio rompis la “rutinon” de malpliiĝo en la unua trimestro, kompare kun la kvara de la antaŭa jaro. Surbaze de la “dekomenca prospero”, “ĉiu-flanka prospero” efektivigitaj en la unua trimestro, ĉiuj branĉoj de la nacia ekonomio daŭre antaŭensaltis ekde la dua. La industria produkto de la unua duono de kuranta jaro multe pliiĝis kompare kun tiu de la sama periodo en lasta jaro. La produkta kvanto de la ĉefproduktoj, kiaj ŝtalo, fero, elektro, cemento k.c. plimultiĝis je pli ol 50% ol tiu de la sama periodo de la lasta jaro; la rapideco de la kreskado multe superis tiujn de la pasintaj jaroj. Pli rapidas ĉijare ankaŭ la plenumado de la tutjara plano ol pasinte. La totala industria produkt-valoro de la unua jar-duono jam superis la duonon de tiu de la jara plano; la produktokvantoj de la ĉefaj produktaĵoj, kiaj ŝtalo, fero, karbo, elektro, cemento, ligno, metaltranĉaj ilmaŝinoj, motoroj k.c. jam atingis pli ol 40% de la jara plano, kelkaj el ili eĉ superis 50%. Samtempe kun la altrapida kreskado de la produkta kvanto, ankaŭ plimultiĝis la specoj de la industriaj produktaĵoj, plialtiĝis la produkta kvanto kaj reduktiĝis la produktokosto. Daŭra antaŭensalto troviĝis ankaŭ sur la fronto de la baza konstruado, kaj la plenumado de ĝia tutjara plano estas okulfrape pli rapida ol en pasintaj jaroj. Laŭ statistiko la projektitaj grandaj kaj mezgrandaj konstruaĵoj, finkonstruitaj kaj parte konstruitaj kaj ekfunkciintaj por produktado ĝis la fino de junio, pliiĝis je pli ol unu oblo kompare kun tiuj de la sama periodo de la lasta jaro. Kaj samtempe kun tiuj konstruoj en la tuta lando estis konstruitaj “grupoj da indiĝenaj malgrandaj entreprenoj” kaj “grupoj da modernaj malgrandaj entreprenoj”. La nove pliiĝita produktopovo de multaj gravaj industriaj produktaĵoj multobliĝis kompare kun tiu de la sama periodo de la lasta jaro. La disvolviĝo de la komunika kaj transporta entrepreno ĝenerale kontentigis la bezonon de daŭra antaŭensalto en produktado kaj konstruado. La vartransporta kvanto de la tuta lando efektivigita de la

modernaj transportiloj pligrandiĝis je pli ol 60%, kompare kun tiu de la sama periodo de la lasta jaro, preskaŭ atingis duonon de la jara plano; ambaŭ la kreskado de transporta kvanto kaj la plenumiĝo de la plano estis pli rapida ol en pasintaj jaroj. Sur la fronto de agrikulturo, malgraŭ la grandega katastrofo okazinta en la lasta jaro, kaj la serioza pluvomanko kaj superakvego en kelkaj lokoj en kuranta jaro, granda venko ankoraŭ estas akirita en bataloj kontraŭ troŝekeco kaj de urĝa plantado sub gvido de la Partio, dank' al la organizo de la popol-komunumo, la malfacila penado de la tuta kamparanaro kaj helpoj al agrikulturo fare de ĉiuj flankoj; tial la rikolto de someraj plantaĵoj ankoraŭ ne malpliĝis, aŭ iom pliiĝis ol tiu en la lasta jaro. Ĉio ĉi tio montras ke la nacia ekonomio de la unua duono de kuranta jaro bone disvolviĝis sur ĉiuj frontoj, kun granda rapideco de daŭra antaŭensalto kaj laŭplane kaj proporcie.

2. Vaste disvolviĝis la movado de teknika renovigo kaj teknika revolucio

Ekde kuranta jaro, la amasa movado de teknika renovigo kaj teknika revolucio kun mekanikigo kaj duonmekanikigo, aŭtomatigo kaj duonaŭtomatigo kiel ĝiaj ĉefaj punktoj, jam vaste kaj profunde disvolviĝis kaj ĝi jam fariĝis granda movado konkreta, scienca kaj tutpopola. Ĝia rapida disvolviĝo ne nur liberigis la homojn de multaj pezaj korpolaroj, ege plialtigis la labor-produktivon, sed ankaŭ aperigis grandan nombron da novspecaj produktajtoj, novaj procedoj kaj novaj teknikoj; ankaŭ la kvalito de multaj produktajtoj ege plialtiĝis. En ferŝtala industrio, aro da etaj entreprenoj de moderna produkt-metodo aplikis fand-metodon de forta blovo, alta temperaturo, rafinita materialo, kaj ilia utiliga koeficiento jam superis tiun de la granda entrepreno de moderna produkt-metodo. En maŝinprodukta industrio, ne mal-multaj entreprenoj aplikis novajn projektojn de produktajtoj kaj novajn procedojn, oni tiel plialtigis la efikon de la produktajtoj, reduktis la normon de material-konsumo. Ekzemple, alprenado de "metodo de sentranĉa prilaborado" povas ĝenerale malpliigi la metal-konsumon je 20-30%. En karbo-industrio, hidraŭlika karbofosado estas paŝon post paŝo ĝeneraligata. Teknikaj renovigoj, kiaj anstataŭigi pneŭmatikajn borilojn per elektraj boriloj, anstataŭigi minejajn trabojn per

substitua kolonaro k. a. estas ankaŭ ĝeneraligataj. En komunikado kaj transporto, la apliko de novaj metodoj de ŝarĝo kaj malŝarĝo sur alta kaj malalta kajoj respektive, per deklivaj glitiloj kaj kanalet-formaj glitiloj k. a. multe altigis la efikon de transportado. En uzado de brulaĵoj, multaj lokoj malaltigis la karbo-konsumon je ĉ. 25%, dank' al gasigo. La movado de teknika renovigo kaj teknika revolucio sur la fronto de baza konstruado ankaŭ atingis grandan sukceson kaj grandnombre aperis teknikaj renovigoj kaj inventoj en geologia esplorado, konstruoprojektado, konstruado k. a. . En la kamparo la amasa movado de agrikultura teknika reformo, kun plibonigo kaj duonmekanikigo de la agrikulturaj instrumentoj



Vinĉo kun bobenego de 5-metra diametro estas produktita en la Fabriko Minejaj Maŝinoj de Luojang.

Foto de Hju Ĝenjan

"Huangho N-ro 150", ŝarĝaŭto de 8.5 tunoj estas prove produktita de Ginan-a Aŭtofabriko

Foto de Hin Hua





Por subteni la agrikulturan produkton Vuhan-a Aŭtofabriko komencis produkti po-grande agrikulturajn aŭtomobilojn. Jen la unuaj ŝarĝaŭtoj de ĝi produktitaj.

Foto de Ju Ĉengjian

kiel ĉefpunkto ankaŭ rapide disvolviĝis kaj akiris grandan sukceson. Dum la amasa movado de teknika renovigo kaj teknika revolucio estiĝis ankaŭ vasta revolucio de produkta organizo. La plej elstaraj ekzemploj tiurilataj estas "la laborsistemo de 4 okhoraj kruciĝaj deĵoradoj" en karba industrio, "koopera elektro-provizado" en elektra industrio kaj "stafeta transportado" de diversaj veturiloj. La "laborsistemo de 4 okhoraj kruciĝaj deĵoradoj" ebligas al la karba industrio altigon de labor-produktivo, je 15-20%, malaltigon de produktokosto je ĉ. 30%, kaj ebligas al la laboristoj kaj ripozon kaj laboron dum produktado, Post kiam la sistemo de "koopera elektro-provizado" estos disvastigita tra la tuta lando, laŭ takso, transformatoroj de 1,500,000 ĝis 2,000,000 da kilovolt-amperoj, kaj pli ol 10,000 km. da elektro-fadeno povos esti ŝparitaj, kaj sole en unu jaro, la elektokonsumo jam povas esti reduktita je miliardo da kilovathoroj, t.e. elektra energio egala al tiu produktita de generatoro kun kapacito de 150,000 ĝis 200,000 kilovatoj.

La rapida disvolviĝo de la movado de teknika renovigo kaj teknika revolucio kun mekanik-

igo kaj duonmekanikigo, aŭtomatigo kaj duonaŭtomatigo kiel ĉefaj punktoj tre rapide altigis la mekanikecon en la industria produktado de tuta Ĉinio, ĝis ĉ. 50% je la fino de junio de kuranta jaro, dum tiu de la lasta jaro-fino estis nur ĉ. 30%. En baza konstruado, la proporcio de la personoj kiuj laboras mekanike aŭ duonmekanike en la konstru-laboristaro grandiĝis ĝis ĉ. 60% je la fino de junio de kuranta jaro, dum tiu de lasta jaro-fino estis nur 20%. Samtempe, la labor-produktivo de la laboristoj kaj oficistoj en la industriaj entreprenoj, en entreprenoj de baza konstruado, komunikado kaj transportado multe altiĝis, kompare kun tiu de la sama periodo de la lasta jaro. La


tutpopola movado de teknika renovigo kaj teknika revolucio jam rekte kaj forte rapidigis la ĉiufankan, daŭran antaŭensalton de la nacia ekonomio; la plua disvolviĝo de tiu ĉi movado nepre akcelos pli efike la pli grandan antaŭensalton de la ĉina nacia ekonomio.

3. Agrikulturo kiel bazo, al kiu helpas ĉiuj Profesioj kaj metioj

En kuranta jaro estas pliprofunde efektivigita la direkto pri disvolviĝo de nacia ekonomio kun agrikulturo kiel bazo, elmetita de la Centra Komitato de la Partio, kaj la movado de subteno al agrikulturo fare de ĉiuj profesioj kaj metioj atingis tre grandan

Lokomotivetoj produktitaj de Ĉengdua Lokomotivo-fabriko tuj iros en la kamparon por faciligi tie la transportadon.

Foto de Joŭ Junge



rezultaton. En la unua duono de kuranta jaro la ĉefaj produktaj rimedoj de agrikulturo kiaj traktoroj, motormovataj degrajnigiloj, kemia sterko, insektomortigiloj ktp. fabrikitaj de industriaj entreprenoj multiĝis unuoble, kelkoble eĉ dekelkoble kompare kun tiuj de la sama periodo de pasinta jaro. La totala kvanto de la produktorimedoj kiujn la komercbranĉo liveris al agrikulturo pliiĝis je ĉ. 70%; la liveritaj maŝinoj por drenado kaj irigacio kun pli ol 1,400,000 ĉevalpovoj plimultiĝis je 63%. Unu el la gravaj trajtoj de la movado de subtenado al agrikulturo fare de ĉiuj profesioj kaj metioj estas la ĝenerala adopto de la formo "interligiĝo de fabriko kun popolkomunumo" por rekte helpi al la komparaj popolkomunumoj disvolvi agrikulturan produktadon. Laŭ statistiko pri 22 provincoj, urbegoj, aŭtonomaj regionoj farita je la fino de majo, estas jam 26,500 fabrikoj, minejoj, industriaj kaj sciencexploraj institutoj kaj kolegioj interligiĝis kun pli ol 12,600 kamparaj popolkomunumoj, t. e. pli ol duono de la totala nombro de la popolkomunumoj en tiuj distriktoj. Ekde la jarkomenco ĝis majo, tiuj ĉi organizaĵoj helpis al la kamparaj popolkomunumoj establi pli ol 55,900 fabrikojn kaj elektrejojn, kaj provizis ilin per pli ol 55,000,000 diversaj maŝinoj kaj instrumentoj, helpis ilin ripari pli ol 166,000 diversajn maŝinojn kaj instrumentojn, samtempe ankaŭ helpis al la komunumoj kulturi pli ol miliono da diversgradaj teknikistoj. Tio ne nur altigis la nivelon de teknika ekipo de agrikulturo, fortigis la rezistan povon kontraŭ naturaj katastrofoj, rekte akcelis la disvolviĝon de agrikultura produktado, sed ankaŭ pliapaŝe disvolvis kaj firmigis la aliancon de la laboristaro kaj la kamparanaro. Nuntempe, la movado de subtenado al agrikulturo fare de ĉiuj profesioj kaj metioj ankoraŭ pli profunden disvolviĝas, la amasa movado de pliprodukto kaj ŝparo kun laboregado super agrikulturo, super grenprodukto kiel ĝia centro, estas disvolviĝanta kun bolanta fervoro en la tuta kamparo, kio estas grava

garantio por bone plenumi ĉiaran planon de agrikultura produktado.

4. Plua firmiĝo kaj disvolviĝo de la popolkomunuma sistemo

La kampara popolkomunumo jam suriris la vojon de sana kaj firma disvolvo, pli kaj pli bone elmontrisan senkompare grandan superecon. La movado de popolkomunumigo en urboj ankaŭ firmiĝis disvolviĝas. Ĝis la fino de julio, jam fondiĝis tra la tuta lando 1,064 urbaj popolkomunumoj kun pli ol 55,500,000 membroj; multaj urboj jam estas popolkomunumigitaj. Same kiel la kampara popolkomunumo, ankaŭ la urba popolkomunumo estas kaj produkt-organizanto, kaj viv-organizanto. La disvolvo de la movado de popolkomunumigo en urboj rapide organizis la nenionfarajn laborfortojn en produktadon. Laŭ statistiko farita ĝis la fino de julio 90% el la neokupitaj laborfortoj en la urboj de la tuta lando jam estas organizitaj; industriaj laborejoj funkciigataj de urbaj komunumoj kaj stratorganizoj nombriĝas je pli ol 90,000, kaj la saman nombron atingis la diversspecaj servostacioj. Samtempe la urbaj komunumoj starigis multe da komunaj manĝejoj, infan-vartejoj, infan-ĝardenoj k.c. por la kolektiva bonstato. La praktiko plene pruvis, ke la popolkomunumo estas la plej bona organizoformo por akceli disvolvon de nia nacia ekonomio je alta rapideco.


Kiel dirite supre, oni povas vidi tre klare, ke la tuta situacio de nia nacia ekonomio estas ja tre bona. La daŭra antaŭensalto en ĉiuj flankoj kaj la laŭplana proporcia disvolvo de la nacia ekonomio en la unua duono de kuranta jaro precipe la pli profunda korpenetriĝo de la ĝenerala linio de la Partio al la popolo, la plua altiĝo de la politika kaj ideologia konscio de la tuta popolo, jam metis ege favorajn bazojn de materio-tekniko kaj politiko-ideologio por bone plenumi kaj superplenumi la tutjaran planon.

Nun la grava tasko metita antaŭ nia popolo estas: tuj disvastigu la tutpopolan kampanjon de pliprodukto

kaj ŝparado kun la greno-kaj ŝtalo-produktado kiel centra punkto sub la gvido de la ĝenerala linio por socialisma konstruado, streĉi plene la energion kaj strebi ĉiam supren por konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ŝpare kaj la serio da principoj "marŝi per ambaŭ kruroj" elmetitaj de la Partio, surbaze de la grandaj sukcesoj jam atingitaj; mobilizu ĉiun forton mobilizeblan; plene utiligu ĉiun favoran elementon; praktike, efike kaj ĉiarimede klopodu por la plenumo kaj superplenumo de ĉiara produkto-plano de greno, ŝtalo k.a. ĉefaj produktajoj.

Robotmaŝinoj produktitaj de Vuhan-a Fabriko de Pezaj Ilmaŝinoj.

Foto de Ju Ĉengjian





duktadon. Ĝis la jaro 1953, centmiloj da diversaj novtipaj agrikulturiloj estis disvastigitaj, kaj la nombro de traktoroj superis du mil (kalkulataj laŭ 15-ĉevalforta, same ĉisube) kun konforma nombro da traktortirataj instrumentoj.


En la periodo de la Unua Kvinjara Plano (1953-1957) glate efektiviĝis socialisma reformo de agrikulturo en la ĉina kamparo, kaj efektiviĝis agrikultura kooperativigo tra la tuta lando. Tiu ĉi grava ŝanĝo de produktaj rilatoj akcelis la disvolviĝon de produktaj fortoj, kaj la vasta kamparanaro urĝe bezonis instrumentojn de alta efiko. Dum tiu ĉi periodo, precipe dum la alta tajdo de agrikultura kooperativigo de la lasta duonjaro de 1955 ĝis 1956, multe kreskis la nombro de ĉinaj agrikulturaj instrumentoj kaj maŝino. La nombro de diversaj novtipaj brutotrenataj agrikulturiloj plimultiĝis ĝis pli ol 5 milionoj. La ŝtataj agrikulturaj kaj bestobredaj farmoj nombriĝis pli ol 700. Ŝtataj traktor-stacioj nombriĝis 390 kun pli ol 22,000 traktoroj, kaj la totala areo de traktore prilaborataj agroj estis ne malpli ol 40 milionoj da muoj (ĉ. 2,660,000 hektaroj). Kaj samtempe, ankaŭ la industrio de agrikulturaj maŝinoj ekposedis la primaran fundamenton kaj povis produkti enlande diversajn traktortiratajn kaj novtipajn bruttrenatajn agrikulturilojn.

ANTAŬ la Liberiĝo, la agrikulturaj instrumentoj de Ĉinio estis ne nur postiĝintaj sed ankaŭ sufiĉe malmultaj en kvanto. Ekzemple en la jaro 1948, ekzistis meznombro nur unu plugilo por 16 agrikulturaj familioj en norda Ĉinio, kaj ankaŭ en aliaj regionoj estis sufiĉe serioza la manko de agrikulturaj instrumentoj.

Post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, en la periodo de naciekonomia restarigo, la Popola Registaro donis tre grandan atenton al tiu problemo, kaj fiksas la politikon "dediĉi ĉefan forton en plimultigado de malnovtipaj agrikulturiloj kaj prove starigi agrikulturilajn staciojn en gravaj punktoj por disvastigi la novtipajn per demonstrado". Dum tiu periodo, dekoj da milionoj da malnovtipaj agrikulturaj instrumentoj estis pliigitaj en la tuta lando. En la nacimalplimultaj regionoj en sudokcidenta Ĉinio, kie oni antaŭe uzis plejparte lignajn agrikulturajn instrumentojn pli ol du milionoj da feraj agrikulturiloj estis senpage disdonitaj. Tio, ekŝanĝis la situacion de malsufiĉo de agrikulturiloj. Kun la plena venko de la agrara reformo tra la tuta Ĉinio, la vasta kamparanaro akiris teron kaj senprecedence altiĝis ilia produkta fervoro; ili ekbezonis sufiĉe da produktiloj por rapide disvolvi agrikulturan pro-

1958 estis la unua jaro de la periodo de la Dua Kvinjara Plano de Ĉinio. En tiu jaro la Centra Komitato de la Ĉina Komunista Partio kaj Prezidanto Maŭ elmetis la Ĝeneralan Linion por Socialisma Konstruado kaj serion da politikoj de "marŝo per du kruroj", mobilizis ĉiujn pozitivajn faktorojn kaj rezultigis antaŭensaltegon en ĉiuj produktaj branĉoj. En la kamparo, konforme al la bezonoj por grand-skala kaj altrapida disvolvo de produktado, aperis la popola komunumo kun pli granda skalo kaj pli alta grado de kolektiveco ol la altgrada agrikultura kooperativo. En la mallonga periodo de kelkaj mona-

Diversspecaj agrikulturaj maŝinoj estas ekspedataj el la haveno de Vuhan al la kamparo de Hubej-provinco. *Foto de Fu Ŝimin*




toj, ĝenerale efektiviĝis popolkomunumigo tra la tuta lando. La efektivigo de popolkomunumigo tutlanda, pretiĝis senlime vastan vojon por altrapida disvolvo de produktaj fortoj, kaj tiel ebligis grandskalan kaj altrapidan disvolvon de teknika renovigo kaj teknika revolucio en agrikulturo.

En 1958, senprecedence disvolviĝis la agrikultura mekanikigo. Amasa kampanjo por reformado de instrumentoj disvolviĝis tra la tuta lando, kaj pli ol ducent milionoj da reformitaj kaj duonmekanikaj agrikulturiloj estis plibonigitaj aŭ kreitaj. Tio multe altigis la laborefikon. Miloj kaj miloj da ferajistoj kaj lignajistoj en la kamparo kaj sennombraj kamparanoj kontribuis sian saĝon al tiu kampanjo, kaj en la komunumoj entreprenoj de fabrikado kaj riparado de agrikulturaj instrumentoj elkreskis kiel bambudoj post printempa pluvo.

En tiu jaro, la nombro de traktoroj plimultiĝis je pli ol unuoblo kompare kun tiu de 1957, kaj ekaferis ankaŭ enlande produktitaj traktoroj. Laŭ la postulo de la popolaj komunumoj kaj la vasta kamparano, 70% de la traktoroj kaj aliaj agrikulturaj maŝinoj de la ŝtataj traktorstacioj estis transdisponigitaj al popolaj komunumoj, kaj la maniero de la mastrumado de traktoroj, plugi laŭ komisio por popolaj komunumoj fare de la ŝtataj traktorstacioj, estis anstataŭita per la nova, ke la popolaj komunumoj mem plugas per siaj propraj maŝinoj. Rezulte de tio ke la produktiloj estas sub la rekta direktado de la produktantaj unuoj, ilia uzado pliraciĝis, kaj la utiligateco plialtiĝis per 30-40%. Kaj tio ankaŭ impulis la aktivecon de la vasta kamparano por agrikultura mekanikigo. En multaj lokoj la amasoj kolektis monon inter si por aĉeti traktorojn kun soifa sopiro al rapida efektivigo de la bela vivo kun "lumigado sen la uzo de oleo, kaj plugado sen la uzo de bovoj".

En la jaro 1959, la Centra Komitato de la Ĉina Komunista Partio kaj Prezidanto Maŭ elmetis la grandan alvokon klopodi por fundamente efektiviĝi agrikulturan mekanikigon en nia lando en ĉ. 10 jaroj. Tiu alvoko ricevis varmegan respondon de la tuta popolo kaj tuj leviĝis alta tajdo de la kampanjo de agrikultura teknika renovigo kaj teknika revolucio. Tiu ĉi kampanjo disvastiĝis ĝis ĉiuj anguloj de la lando, ĉiuj branĉoj de la nacia ekonomio senescepte kontribuas sian parton por subteni agrikulturon, kaj la vasta kamparano klopodas prepari kondiĉojn por agrikultura mekanikigo.



Studentoj de Vuhan-a Fer-ŝtala Kolegio fabrikis pli ol cent tornilojn, bormaŝinojn, pumpmaŝinojn, elektrajn motorojn k. a. por subteni la mekanikigon de la kamparo. En la bildo universala tornilo estas muntata.

Foto de Ju Ĉengjian

En la kuranta jaro, la kampanjo de instrumentoreformado rapide enpaŝis en novan stadion de disvastigo de novaj agrikulturiloj en kompletoj kaj de plena reformado en la tuta sistemo. Diversnivela


Furaĝo-prilabora produktolinio de la bestbredejo de Hajmen-a Popolkomunumo, Ĝegiang-provinco.

Foto de Ŝen Ĉubaj




sciencaj institucioj de agrikulturaj maŝinoj aktive partoprenas tiun ĉi kampanjon kune kun la vasta kamparano, klopodas eltrovi kaj inventi novajn maŝinojn konformajn al nia agrikultura tradicio de subtila kaj atentema kulturado. Dum la trijara kampanjo de instrumento-reformado en la kamparo, multaj inventaĵoj aperis, el kiuj la plej elstara estas la plantilo de rizplantidoj, maŝino tage kaj nokte prirevita de la ĉinaj agrikulturistoj. En multaj industrie bone disvolviĝintaj landoj, kiuj produktas grandkvante rizon, oni klopodis krei tian maŝinon por multaj jaroj, sed tute vane; dum en la nova Ĉinio oni sukcesis, nur post kelkaj laboroj, krei eĉ plurajn tipojn de tia maŝino. Inter la elpensitaj plantiloj sin trovas tipoj simplaj kiaj tipo de Liling N-ro 2 de Hunan-provinco k. a., kaj tipoj malpli simplaj kiaj tipo Nan 105 B, k. a. La plejparto de tiuj rizplantidaj plantiloj estas inventita de laboristoj kaj agrikulturistoj. Tiuj maŝinoj povas planti rizplantidojn simetrie en la rizkampojn, pli delikate ol spertaj manoj kaj kun rapideco pluroble, ĝis dekkelkoble, pli alta ol tiu de la permana plantado. Laŭ statistiko, ĉe la fino de junio, proksimume 2 milionoj da tiaj maŝinoj estis fabrikitaj en la tuta lando kaj ĉirkaŭ miliono el ili jam estis en uzado. Krome aperis ankaŭ aŭtomataj aŭ duonaŭtomataj kompletaj instalajoj, ekipaĵoj por porko- kaj koko-bredado, kreitaj laŭ ambaŭ modernaj kaj indiĝenaj teknikoj. Unuvorte, kun la senĉesa disvolviĝo de la kampanjo de teknika renovigo, ĉiam pli multe da novaj mirindaj maŝinoj elmergiĝas el la saĝ-oceano de la vastaj popolamasoj.

Por la jaro 1960, la ŝtato disponigis pli ol milionon da tunoj da ŝtalo al agrikulturo, t. e. ĉirkaŭ unuoblon pli multe ol en 1959. La modernaj fabrikoj de agrikulturaj maŝinoj, ekzemple la Unua Traktor-fabriko, la Fabriko de Grandtipaj Grenrikoltaj kombajnoj k. a. jam komencis pogrande produkti diversajn traktorojn kaj aliajn agrikulturajn maŝinojn. Industrion de fabrikado kaj riparado de agrikulturaj maŝinoj ekhavis provincoj, subprovincoj, gubernioj kaj eĉ popolaj komunumoj. Reto de fabrikado kaj



Nove alportitaj kombajnoj estas muntataj en Vujenkiaŭ-a Popolkomunumo, Hebej-provinco.
Foto de Ŝeng Guo



Traktoristo de Gujung-a Popolkomunumo, Henan-provinco aldonis erpilon al la plugilo kaj trovis ĝin bone efika.
Foto de Tang Maŭlin

riparado de agrikulturaj maŝinoj estas formata kaj paŝon post paŝo perfektigata. Laŭ la projekto de la Naciekonomia Plano, dum 1960, 22,000 enlande fabrikitaj traktoroj, pumpmaŝinoj kun totala potenco de 2,500,000 ĉevalfortoj, grenrikoltaj kombajnoj, ŝarĝaŭtoj, ekipaĵoj por elektro-produkto kaj granda nombro da duonmekanikaj novtipaj agrikulturiloj estos liverataj al la kamparo. Sume plimultiĝos la mekanika movforto en la kamparo je pli ol 5 milionoj da ĉevalfortoj, la areo de mekanike plugata tero kune


superos pli ol cent milionojn da muoj kaj tiu de mekaniké irigaciata tero 2 cent milionojn da muoj.

La efektivigo de agrikultura mekanikigo havas gravegan signifon por la radikala ŝanĝo de la trajtoj de la agrikulturo kaj akcelado de ĉiufanka antaŭensaltego de la nacia ekonomio de Ĉinio. Membroj de Hingnong-a Popola Komunumo en Hejlonggiang-provinco diris alegorie, ke la popol-komunumigo kaj agrikultura mekanikigo estas du flugiloj, kiuj ebligas flugrapidan antaŭen-marŝon de la produkto en la kamparo.

De dek unu jaroj la agrikultura mekanikigo de Ĉinio ja disvolviĝas laŭ la ĝusta vojo sub la gvidado de Ĉina Komunista Partio kaj Prezidanto Maŭ. Unue, serio da socialismaj reformoj de agrikulturo efektiviĝis en la kamparo, kio sekvigis la starigon de socialismaj produktaj rilatoj, forigante la obstaklojn al la disvolviĝo de produktaj fortoj kaj akcelis ilian senĉesan disvolviĝon. Nur tiamaniere oni povis transformi la malgrandskalan, individuan, manlaboran agrikulturan produktadon en grandskalan mekanikan produktadon. Due, por akceli la agrikulturan mekanikigon, oni devas mobilizi la amasojn, sekvi la amasan linion kaj plene elvolvi la homajn kaj materiajn fortojn kaj neelĉerpeblan saĝon de la amasoj. La brilaj sukcesoj, atingitaj en la kampanjo de instrumento-reformado en la kamparo, kaj la rezultoj, akiritaj dank' al transdono de grandtipaj maŝinoj sub la dispono de la popola komunumo en la pasintaj tri jaroj, estas ĝuste venkoj de la amasa linio de la Partio sur la fronto de agrikultura mekanikigo. Trie, en la kampanjo estis korekte praktikata la politiko de "marŝo per du kruroj" nome, samtempa apliko de indiĝenaj kaj modernaj, disvolvo de indiĝenaj al modernaj kaj kombino de grandaj, mezgrandaj kaj malgrandaj entreprenoj.

Hinglong-a Popolkomunumo de Baikjuan-gubernio, Hejlonggiang-provinco jam havas bone ekipitan traktor-riparejon.

Foto de Hiaŭ Ŝugang



La Kamparo antaŭ Tagiĝo

Pentris Fan Jihin

La kampanjo de instrumento-reformado estas fundamento por la agrikultura mekanikigo, kaj la plibonigitaj instrumentoj estas patrino de agrikulturaj maŝinoj. La levo de kvalito surbaze de ĝeneraligo kaj ĝeneraligo sub la direktado de levo de kvalito; samtempa apliko de indiĝenaj kaj modernaj: elkovi modernajn el indiĝenajo — jen estas objektivaj reguloj en la evoluo de la afero. La rizplanti-

daj plantiloj estas evoluintaj ĝuste el simplaj lignaj plantiloj. Ĉar la teritorio de Ĉinio estas vasta, la naturaj kondiĉoj kompleksaj, kaj ni havas tradicion de kulturado subtila kaj atentema, tial oni devas havi agrikulturajn maŝinojn de diversaj grandecoj kaj diversaj specoj por respondi al la bezonoj specialaj en Ĉinio kaj garantii konstantan, rapidan plialtigon de la produkto po areunu.

Nun, la ĉina kamparo estas marŝanta per antaŭensaltaj paŝegoj al mekanikigo sub la gvidado de la Ĉina Komunista Partio kaj Prezidanto Maŭ sub la brilo de la Ĝenerala Linio.

Ĉen Canjun:

Vizito al Akvoriĉa Regiono

EN la unuaj tagoj de junio, somera rikolto jam komenciĝis sur la suda flanko de la mal-supra parto de la Orienta Rivero en Guangdong-provinco. Profitante la mallongan libertempon post vespermanĝo, mi petis maljunan Li-n, sekretario de la parti-komitato de la Ĝongtang-a Popola Komunumo, min akompani al onklino Hua kaj ŝia nova bofilino Su Hiaŭtaŭ. La distanco inter la sidejo de la partia komitato de la popola komunumo kaj ilia vilaĝo estas proksimume kvin lioj, sekve ni povis uzi la okazon por pririgardi survoje la plantaĵojn.

Ore brilas la subiranta suno kaj milde blovas facila zefiro. Kun gaja humoro ni paŝas sur nove konstruita ŝoseo kondukanta al Kantono.

Mi trovas eksterordinare aminda tiun ĉi ŝoseon. Jam ne parolu kiom oni aspiris la konstruiĝon de ŝoseo en tia akvoriĉa regiono, kie riveroj interplektiĝas tiel dense. Ĝia nuna apero ĝuste reprezentas la novan laborstilon post la komunumigo. Apud la rekta kaj larĝa vojo estas plantitaj du vicoj da freŝverdaj eŭkaliptoj. La ŝoseon borderas kanaletoj plenplenaj je akvo, en kiuj fiŝidoj estas jam bredataj. Trans la kanaletoj troviĝas novaj digoj, sur kiuj estas kreskigitaj baŝooj*. Efektive "la tero estas plene utiligata laŭ ĝia taŭgeco, belaspekta kaj profitdona al la produktado.

Kune kun la ŝoseo aperis samtempe elektrofadenoj altensiaj en la aero. La elektra pumpstacio estos baldaŭ finkonstruita kaj post kelkaj monatoj alsendiĝos de hidroelektra centralo forta elektro-energio, do la idealo de elektrigo ne plu estas fora

espero. Altirata de tiu ĉi ordinara sed grandioza novaĵo, mi sentas senliman ĝojon kaj ekscitiĝon en la koro.

Sur la vastaj kampoj ambaŭflanke de la ŝoseo, la komunumanoj estas plezure rikoltantaj. Maro da oraj rizo-spikoj rulas ravajn ondojn, ŝvebigante en la aero intensan rizaromon. Jen vasta bildo de abunda rikolto! Ankaŭ la smeralde verdaj pizangoj, sukerkanoj, jutoj kaj arakidoj enteksitaj inter la rizondoĵoj, kvazaŭ en konkuro kun la rizospikoj, antaŭvidigas abundan rikolton.

Alian ĝojigan fenomenon prezentas la ĉieesto de diversaj alispecaj grenoj kaj legomoj, kiaj batato, maizo kaj milio. Ĉiuj intersemeblaj lokoj estas plene prisemitaj. Ĉie abundas kaj bone kreskas la plantaĵoj, ĉie montriĝas prospera stato, kiu estas, kiel maljuna Li ĝuste nomis, la nova aspekto de ĉiuflanka antaŭensalto kun greno kiel la akso.

Kiam mi ravite admiris la belegan bildon, maljuna Li diris: "En tiuj ĉi tagoj lastjare, tie ĉi estis maro de inundego!"

Pri la alŭdita situacio mi bone informiĝis. Inundego neniam spertita dum la pasintaj cent jaroj alportis tien ĉi neatenditan katastrofon. Pli ol ok dekonoj de la rizo kaj ekonomiaj plantaĵoj perdiĝis, 30% de la domoj disfalis kaj la vivtenado de pli ol 30,000 loĝantoj estis serioze minacata. En la Ĝongtang-a Popola Komunumo, kiel en multaj aliaj plagi-taj komunumoj ĉe ambaŭ flankoj de la Orienta Rivero, regis pesimisma kaj malesperega atmosfero.

En tiu kriza momento, la Centra Komitato de la Partio kaj Prezidanto Maŭ sendis al ili varmon kaj esperon, kaj neelĉerpeblajn fortojn spiritan kaj materian. Kuraĝigite de la slogano "kion la naturo forprenis de ni, ni reprenu de ĝi!" elmetita de la provinca parti-komitato, oni tuj komencis nesubigeblan lukton kontraŭ ĉiuj malfaciloj. Sub la forta gvidado de la provinca parti-komitato kaj tiuj de diversaj malsuperaj niveloj, la kriza situacio estis rapide returnita, reordiĝis produktado kaj rekonstruiĝis loĝejoj. Post tio oni akiris abundan rikolton, kiu "akiris grenon de du rikoltoj". Gajaj esperplenaj kantoj denove akompanis la daŭran antaŭensaltadon de la loĝantoj.

Nun denovan riĉan rikolton oni akiros. Rememorante kio okazis pasintjare, mi alparolis maljunan Li-n tre kortuŝite kaj ĝojege: "Via komunumo havas bravan volon, ĝi estas eltenema en uragano!"

"Jes, verŝajne la ĉielo intence embarasis nian nove starigitan komunumon dum la pasinta unu jaro," diris la malaltstatura sed akravida junulo maljuna li, fiere montrante fingre la oran kamparon, "Eĉ tiun ĉi abundan rikolton ni devis elŝiri el la manoj de la ĉielo."

Jes, mi bone konas la tutan fakton de ilia lukto dum la pasinta jaro. Post la venko super la inundego, restarigo de la loĝejoj kaj reaktiro de la abunda rikolto de la malfrua rizo, ili rapide ekriparis per sia giganta laborarmeo la grandan digon de la Orienta Rivero. La tasko de proksimume 2,000,000 kubmetroj da tero estis kuratake plenumita nur en la daŭro de unu monato. Ili konstruis la grandan digon tiel fortika ke ĝi povas retenigi la inundon de la Orienta Rivero konatan kiel “nesubigebla sovaĝeĉevalo”, kies plej alta flukvanto atingas 12,000 sekund-kubmetrojn. Post tia peniga batalo, la produktado devus esti bone garantiita. Sed kiu atendis, ke okazis sekegeco! Dum duonjaro falis neniu pluvego. La fluo de la Orienta Rivero reduktiĝis ĝis nur pli ol 30 sekund-kubmetroj. Ĉiokaze enfluis la saleca marakvo, kiu grave minacis la produktadon kaj vivadon. Sekve komenciĝis nova batalo de tertremiga kampanjo por rezisti la salecan akvon kaj bari la riveron. La batalo finiĝis per triumfokantoj de abunda rikolto sur la kampoj.

“Vere eksterordinara jaro!” mi elkore laŭdis ilian nelacigeblan lukton. Ĝi montris, ke forpasis jam unufoje por ĉiam la mizeraj tagoj kiam homoj vivis depende de la bonkoreco de la ĉielo. Sin apoginte sur la Partio kaj la organizita kolektivo de la komunumo, ili konscie streĉis plene la energion kaj iom post iom el lernis mem direkti sian propran sorton. Antaŭ la ĝojiga bildo en riĉa rikolto, mi nereteneble sentis profundan estimon al tiuj herooj, kiuj kuraĝis returni la radon de la naturo.

Kun fortaj impresoj mi paŝis ŝultron ĉe ŝultra kun maljuna Li. Marŝinte certan distancon sur la ŝoseo, mi rimarkis de fore kelkajn fenikso-arbojn² kun ruĝaj floroj pompe florantaj. Tie estas jam la vilaĝo kie onklino Hua loĝas. Ni facilpaŝe iris antaŭen.

La vilaĝo kun proksimume cent familioj estis en la pasinteco tre malriĉa, formita plejparte el kadukaj terkabanoj senorde lokitaj. Sed nun ĝi fariĝis tute nova vilaĝo kun multaj nove konstruitaj brikdomoj, bonordaj, puraj kaj helaj. Estas konstruita fiŝlageto aŭtaŭ la vilaĝo, sur kies bordo arboj estas jam plantitaj. Sub la brilo de la floroj de fenikso-arboj, la tuta vilaĝo aspektas kaj kvietaj kaj eleganta. La transformiĝo de katastrofo al bono, de malnovaj domoj al novaj estas ne plu nura aspirado en la kapo de homoj, sed reala kolorriĉa bildo antaŭ la okuloj.

Enpaŝinte la vilaĝon kies tero estas kovrita de falintaj ruĝaj floroj, mi ne trovis eĉ etan postsignon de la katastrofoj. Mi ne povis imagi al mi ĝian antaŭan fizionomion, sed nur ke la ĉielo alportis al ĝi terurajn katastrofojn, dum la Partio rejuniĝon kaj feliĉon. La historia larmoplena nomo “malriĉa

vilaĝo” estas jam frakasita de ĝiaj mastroj. Mi ĝojis senlime pro ĝia nova vivo.


Trapasinte inter fenikso-arboj malforte prilumataj de la subiranta suno kaj farinte unu turniĝon, ni renkontiĝis ĝuste kun onklino Hua. Tiu ĉi ĉiam fortika maljunulino kvindekkelkjara estas ankoraŭ pli fortika kaj pli gaja ol antaŭ unu jaro. Ŝi sidis ĉe la pordo de la porkbredejo, diligente tranĉante herbojn por la porkoj. Ekrimarkinte nin, ŝi tuj venis renkonte kvazaŭ ŝi vidus siajn karulojn, ĝoje salutante: “Ho, k-do Ĉen. Ĉu vi venas de la gubernia urbo?”

Maljuna Li rapide respondis anstataŭ mi: “Li speciale venas viziti vin por rigardi vian novan hejmon.”

“Vi devus veni pli frue. Nia tuta hejmo ŝanĝiĝis. Neniu el niaj avoj de tri generacioj loĝis en tia bona domo.” Ŝiaj vortoj elpafiĝis seninterrompe kvazaŭ ĉeno da krakfajraĵoj, ŝajne ŝi volis eldiri ĉion el sia koro unuspire. “Hiaŭtaŭ ankoraŭ jam transvenis en nian domon³. Kiel bonorde ŝi aranĝas ĉion en la hejmo. Ho, mi atendis tutan jaron ĝis ŝi finfine venis, tiu malcedema knabino!”

“Ĉu ŝia vundo jam resaniĝis?” mi demandis.

En vilaĝo de Ŝitan-a Popolkomunumo, Guangdong-provinco, nove konstruita post la inundego en 1959, abundas riz-rikotaĵo.
Foto Ĝang Giaĉang



“Jes!” ŝi ridis gajhumore, “Nu, sen la helpo de sekretario Li mi devus elpeti de la Mardio mian bofilinon.”

Ŝi aludis pri la okazintaĵo antaŭ kelkaj monatoj, kiam en la plej streĉa tempo en klopodado por kontraŭbatali sekecon kaj bari riveron, la boato de Hiaŭtaŭ renversiĝis kaj maljuna Li saltis en la riveron por ŝin elsavi, sed pro la rapideco de la fluo ili ambaŭ estis puŝitaj sub la boaton, kaj kvankam ŝi estis vundita, tamen ŝia vivo estis savita. Tion mi sciis, tial mi ŝercis ridante: “Nun la Mardio ja havas kaŭzon por malbeni sekretario Li-n.”

Ankaŭ onklino Hua ekridis kontente kaj invitis nin al sia hejmo, motivigante ke Hiaŭtaŭ prezentu al ni “teon de novedzino”.


“Sed lasu nin unue rigardi vian pork-bredejon,” mi diris.

Kun plezuro onklino Hua tuj kondukis nin en la pork-bredejon.

Ankaŭ la pork-bredejo estas tute nova, kiu similas al novtipa vilaĝeto, ĉirkaŭata de malaltaj muroj kalkitaj. Interne troviĝas vicoj post vicoj da porkejoj, kiuj estas tiel puraj kaj bone ventolataj ke malbona odoro estas apenaŭ sentebla. Apude estas furaĝejo kaj meze estas korto kun arboj, kiun onklino Hua nomas “ludejo de porkidoj”. Aro da grasaj porkidoj kune kun kokoj kaj anasoj kuradas sur ĝi tien kaj reen, kvazaŭ gaje ludantaj. La mal-luma ombro de la malnova socio ke “porkoj loĝas kun la homoj” jam plene malaperis inter la nova ĉielo kaj nova tero.

La Unua Traktor-fabriko de Luojang helpis Ŝitan-an Popolkomumon per donaco de traktoroj post la inundego.

Foto de Ĝang Ĝiaĉang



Kiam mi plezure rigardis la porkidojn, onklino Hua alportis al mi unu porkidon. Palpante ameme ĝian gluteon kvazaŭ al sia amata infano, ŝi diris al mi kontente: “Jen rigardu! Kiel karnoplena!”

Mi etendis mian manon kaj pinĉis ĝian femuron, kiun mi trovis grase mola kaj korplaĉa. “Vi estas bona porkbredistino,” mi ŝin laŭdis, “vi jam ellernis kiel bredi porkojn grasaj!”

“Mi neniam bredis porkojn antaŭe. Mi tute ne konis kio estas verda furaĝo kaj kio fermentinta.” Onklino Hua diris rapide kun viglaj lipoj kaj facil-mova lango, en tono klara kaj gaja. “Mi nur sekvis la vorton de Prezidanto Maŭ, kaj ellernis ion.”

“Vi devas klopodi por esti labormodelo de porkbredado,” kuraĝigis ŝin maljuna Li.

Onklino Hua respondis: “Ne gravas ĉu oni povas fariĝi modelo aŭ ne, tamen nia grupo ja devas ĉiuokaze strebi por esti inter la antaŭaj vicoj!”

“Bone!” mi diris, kaj turniĝinte al Li mi daŭrigis, “Antaŭe vi en akvoriĉaj regionoj ŝatis nur manĝi, sed ne bredi. Hodiaŭ tio ŝanĝiĝis kaj kompleto da spertoj estas ankaŭ akirita. Ĝi ankaŭ estas revolucio.”

“Komenca pozicio estas starigita,” kapjesis Li. “Ni povos almenaŭ en la kuranta jaro realigi la postulon de la provinca parti-komitato unu porko po persono’.”

“Mi timas . . . mi timas nur . . .” En ŝia koro sin trovas du timoj: unue la nesufiĉeco de furaĝo kaj due ankoraŭfoja inundego. Kiam ŝi senkaŝe malkovris siajn timojn, “ŝi demandis gajpante: “Kion fari tiam?”

“Estu trankvila!” ŝin konsolis maljuna Li. “Ĉie estas troveblaj furaĝoj. Koncerne la inundegon, eĉ se ĝi estus tri futojn pli alta ol la pasintajara, ni ankaŭ ne timos. La lastjaran akvegion vi vidis nur unu-foje dum via vivo. Tiun tri futojn pli altan eĉ via nepo naskiĝonta ne povus sperti.”

Onklino Hua fariĝis tre ĝoja kaj diris: “Jen maŝargiĝas mia koro. Kiel bone la Partio pri ĉio zorgas!”

Post tio ŝi ĝojoplene kondukis nin el la porkbredejo. Ŝi iris urĝeme kaj vigle kvazaŭ junulino kaj post nelonge ni jam alvenis al ŝia hejmo.

Transpaŝinte la sojlon de la fronta pordo, ni eniris en salonon mezgrandan. En la mezo pendas surmure portreto de Prezidanto Maŭ en kadro. Sur ambaŭ flankaj muroj estas

surgluitaj novjaraj bildoj, inter kiuj la du plej okulfrapaj estas “Vivu la popola komunumo!” kaj “La dika bebo”, kiuj verŝajne reprezentas la koron de onklino Hua. Ĉiuj objektoj en la salono, tabloj, benkoj, termosoj kaj aliaj staras bonorde. La tuta salono, simpla sed pura, kvietaj kaj komforta, devas esti zorge aranĝita de la lerta novedzino Su Hiaŭtaŭ.

Kun ridetanta mieno onklino Hua kondukis nin rigardi du aliajn ĉambrojn kaj unu malgrandan kuirrejon kaj demandis ĝojtone: “Ĉu vi trovas mian hejmon decforma?”

“Tre komforta!” mi respondis, kaj sidante sur benketo en la salono mi demandis al ŝi intence: “Kiel ĝi estas al vi kompare kun via malnova hejmo?”

“Ĉu necesas respondi?” diris onklino Hua, kiam ŝi alportis al mi tason da teo. “Ĉiuj en nia vilaĝo asertas, ke post la starigo de la komunumo ni ekhavas apogon, kaj eĉ malfeliĉo turniĝas en bonon. Kaj por mi al unu bono estas aldonita alia, nome, krom la bela nova domo, mi nun havas bonan bofilinon.”

“Bedaŭrinde nur elektraj lampoj estas ankoraŭ ne instalitaj,” ridis maljuna Li kviete.

“Hua Zi⁴ diris, ke tuj kiam ili finkonstruos la pumpstacion, ni havos ankaŭ elektrajn lampojn.” Onklino Hua ankaŭ alportis al maljuna Li tason da teo kaj lin demandis kun brilaj palpebrumantaj okuloj: “Ĉu vere, sekretario Li?”

“La elektraj fadenoj estas jam fiksitaj sur stangoj. Kiel tio povas esti malvera?” respondis maljuna Li.

“Ha, ankaŭ mi maljunulino ĝuos prosperajn tagojn,” laŭte ekridis onklino Hua.

“Ni atendas ankaŭ la bonan kreskadon de viaj porkidoj,” mi diris, “por ke ni ĉiuj povu sate frandi ilin.”

“Certe,” diris gravmiene onklino Hua, “se ni ne bone bredus la porkojn, ni estus sendankuloj al la Partio.”

Tiam revenis hejmen la juna, viveca Su Hiaŭtaŭ. Ĝuste kiel ŝia nomo, ŝia vizaĝo aspektis kiel bela persiko⁵. Ŝi portis sur siaj antaŭbrakoj paron da manikŝirmiloj el pajlo plektitaj. Kun pantalonuboj supren refalditaj, videbliĝis duone la dikaj kruroj kovritaj de koto. Per unu rigardo oni jam povis scii ke ŝi ĵus revenas de rizkampoj.

Ŝi rapide ensaltis kvazaŭ facila vento. Renkonte onklino Hua kriis al ŝi kun rideto: “K-do Ĉen alvenis, Hiaŭtaŭ. Li volas trinki teon de novedzino.”

“Ha!” ĝojis Hiaŭtaŭ, fikse rigardante per grandaj ridetantaj okuloj: “Nu, mi alportos al vi teon.” Forpreninte la bluetan kaptukon, ŝi iris por la termosoj.

“Ni jam trinkis,” mi diris.



Multe plantinte abunde rikoltas Vajhaja Popolkomunumo de Hinhuja-gubernio, Guangdong-provinco.

Foto de Luo King

“Ne teon de novedzino, sed nur tiun de maljunulino.” Rapide intermetis onklino Hua.

Hiaŭtaŭ enverŝis teon en la tasojn el kiuj ni ĵus trinkis, kaj ŝi verŝis tiel plene ke la teo superfluis el la tasoj sur la tablon. “Ej, vi malatenta bubino!” ekridis onklino Hua.

Hiaŭtaŭ ridegis, plengorĝe kaj gaje.

Maljuna Li ankaŭ ekridis kaj demandis: “Kiel iras la abundrikolta parcelo de via Hiang Hiuli--a grupo? Ĉu ĝi povos superpasi la limon de mil ĝinoj?”

“La rizkreskado estas tro bonaj ke ili falkliniĝas teren,” respondis Hiaŭtaŭ, forviŝante la teon de sur la tablo. “Tial, en plej bona okazo ĝi donos nur okcent.”

“Tio tamen estos venko!” mi konstatis laŭde kaj ŝin demandis zorgeme: “Kiel estas via mano vundita dum la riverbarado? Ĉu ĝi ankoraŭ doloras?”

“Estas nenio,” respondis Hiaŭtaŭ neglekte, kvazaŭ ŝi jam forgesus la okazintaĵon.

Maljuna Li diris: “Se la vundo estus ankoraŭ ne resaniĝinta, ĝis kia grado ĝi suferigus onklinon Hua!”

“Efektive! Mi malpacienca tutan plenan jaron!” Onklino Hua daŭrigis post li urĝeme kaj grumblis laŭte: “Kiom vi junuloj konas la koron de mal-

junuloj! Mi eltenis tiom da suferoplenaj jaroj ĝis Hua Zi plenkreskis, kun ununura espero ke mi havos bofilinon. Sed vi ĉiam prokrastis kaj prokrastis la okazigon de geedziĝo, ke mi tiel malpacienis senkonsile. . . .”

Hiaŭtaŭ ŝerce diris: “Vidu, kiel malpaciencema vi ankoraŭ estas havante tian aĝon!”

“Vi ankoraŭ mokas flegme!” milde riproĉis ŝin onklino Hua kun malfermitaj lipoj duone ridantaj. Poste ŝi sin turnis al mi: “K-do Ĉen, ankaŭ vi estas aĝulo. Ĉu vi opinias, ke mi ne devis malpacienigi?”

Mi balancetis la kapon. Mi komprenis la koron de tiu maljunulino. Mi rememoris, ke ĉe la fondiĝo de la popola komunumo, onklino Hua jam volis okazigi la geedziĝon dum la festaj tagoj, kaj tion Hiaŭtaŭ konsentis. Sed dume komenciĝis arda kampanjo de fergisado kaj ŝtalproduktado kaj Hiaŭtaŭ kuris al la ferŝtala fronto kiel batalĉevalo, do prokrastiĝis la geedziĝo. En la somero de 1959, kiam abunda rikolto estis antaŭvidebla, ŝi kaj Hua Zi fiksis la daton por geedziĝo post la rikolto. Sed neatendite ekfuriozis inundego. La domo disfalis. Preskaŭ detruigis kaj la hejmo kaj la familio. Kiu do ankoraŭ havis la inklinon aranĝi edziĝan solenon?

En vintro tiujara, ili havis abundegan rikolton. Krome finkonstruiĝis la nova domo. Estis oportuna tempo por festi geedziĝon. Ĝuste tiam okazis lukto por haste ripari la grandan digon de la Orienta Rivero. Forgesinte ĉiujn personajn aferojn, Su Hiaŭtaŭ tuj kondukis nokte sian Hiang Hiuli-an grupon al la digo por partopreni en la lukto. En la celebra kunveno de la triumfa finriparo de la granda digo, onklino Hua kaptis la manojn de Hiaŭtaŭ kaj insistis maltrankvile: “Ne prokrastu plu la geedziĝon tiun ĉi fojon, Hiaŭtaŭ!” Hiaŭtaŭ jese respondis. Kiam onklino Hua jam pretigis ĉion, komenciĝis alia lukto por kontraŭbatali sekecon kaj bari la riveron. En tiun urĝan lukton militsimilan, la agitita Hiaŭtaŭ heroe sinjetis, kaj poste vundiĝis.

Tio estis ĉio kion mi povis rememori. Mi diris al onklino Hua: “La pasinta estis ja neordinara jaro. En la malnova socio, nuligita estus ne nur la edziniĝo de Hiaŭtaŭ, sed ankaŭ la vivoj de sennombraj personoj.”

“Kompreneble!” diris onklino Hua. “En la malnova socio, mi eĉ ne kuraĝus revii pri stulta bofilino por ne paroli pri lerta.”

“Panjo, kion vi parolis!” Hiaŭtaŭ riproĉis ŝin kun rido. “Kiam vi estas ĝoja, vi ne scias reteni vian langon, ne hontante eĉ laŭdi min la krudan malsaĝulinon antaŭ la supera kamaradoj!”

“Mi laŭdis ne vin, sed la Komunistan Partion.” Rigardante al Hiaŭtaŭ per duonfermitaj dorlotantaj okuloj, onklino Hua intence ŝtopis ŝian buŝon dirante: “Ĉu vi ne estis malsaĝulino en via infanaĝo? Sed venis la Komunista Partio, kies instruado ja saĝigis vin.”

“Ĉu ne estas same por ĉiuj?” Hiaŭtaŭ tute ne cedis sed kontraŭparolis: “Antaŭe vi eĉ ne sciis balbuti antaŭ la bienulaj moŝtoj.”

“Vi ĉiuj ŝanĝiĝis,” mi intermetis. “Saĝaj homoj agas saĝe. Mi multe ŝatas vian interesan novan familion.”

“Do bonvolu ofte veni al ni,” invitis onklino Hua gaje. “Ĉifoje vi venis trinki la teon de novedzino. Sed la venontan fojon venu manĝi . . . manĝi . . .” Ŝi ĵetis sekretan rigardon al Hiaŭtaŭ, konfititan zingibron⁶. . . .”

Honteme Hiaŭtaŭ turnis la kapon flanken.

“Bone,” mi akceptis la inviton ridante. Stariĝante mi diris al Hiaŭtaŭ: “Ni devas foriri, ĉar ni volas pasante rigardi vian altproduktan batatkampon.”

Hiaŭtaŭ returniĝis kaj demandis: “Ĉu vi volas rigardi ankaŭ la altproduktajn kampojn de sukerkano kaj arakido?”

“Ni rigardos ĉiujn,” mi respondis ĝoje. “La flago de via Hiang Hiuli-a grupo ja flirtas tre alte. Ĉion vi strebas altprodukti.”

Hiaŭtaŭ klarigis: “Sekretario Li alvokis nin antaŭensalti en ĉiuj flankoj, kaj ni tion tuj faras laŭ lia vorto.”

Maljuna Li stariĝis post mi kaj diris al onklino Hua: “Via pork-bredejo devas ankoraŭ pli antaŭensalti.”

Onklino Hua respondis memfide: “La ruĝa flago estos nepre nia.”

“Jes, devas esti multaj ruĝaj flagoj.” Mia voĉo iel sonis ekscitita. “Vi venkis la naturajn katastrofojn, akiris abundan rikolton, efektivigas ankaŭ elektrigon, kaj kun multe da ruĝaj flagoj, vi fariĝos de ĉiuj respektata ruĝflaga popola komunumo.”

Parolinte tion, ni eliris el la komforta kaj agrabla hejmo de onklino Hua kun ĝojplenaj ridoj.

Kiam ni forlasis la novan, belan vilaĝeton, kiu rekonstruiĝis post grandaj katastrofoj, kaj surpasis la ŝoseon, la suno jam subiris. La suda vento en la krepusko karakteriza ĉe la akvoriĉaj regionoj blovis tiel eksterordinare facilmove ke la elektro-fadenoj altensiaj super la ŝoseo daŭre fajfis kaj la vastaj kamparoj ambaŭflanke de la ŝoseo rulis ondojn de ora rizo kvazaŭ maro. Antaŭ tiu ĉi freŝa bildo de riĉega rikolto, mi sentis senliman plezuron en la koro.

1. *Musa basjoo.*
2. *Poinciania regia.*
3. *Aludo pri la veno de novedzino por loĝi en la hejmo de la novedzo kun geedziĝa soleno.*
4. *La nomo de ŝia filo.*
5. *“Hiaŭtaŭ” signifas malgrandan persikon en la ĉina lingvo.*
6. *Laŭ moro en Guangdong-provinco oni manĝas ĝin por celebri naskiĝon de infano.*

Nova Fizionomio de la Ĉina Pentrarto


LA nova epoko metas antaŭ ni artistoj novan taskon. Tiun ĉi novan, grandiozan taskon prenas sur sin ankaŭ la ĉina pentrarto same kiel ĉiuj aliaj artbranĉoj. Por mobilizi ĉiujn fortojn de la arto plibone servi al la laboristoj, kamparanoj, kaj soldatoj kaj al la politiko de la proletaro, la Ĉina Komunista Partio fiksas la direkton de “samtempa disvolviĝo de cent floroj kaj evoluigo de novo el malnovo”. Ĉi tiu direkto estas la vojo por la disvolviĝo de niaj socialismaj literaturo kaj arto, kaj samtempe prezentas senlime vastan perspektivon por la disvolviĝo de la ĉina pentrarto. Dum la pasintaj dek unu jaroj, la ĉina pentrarto same kiel la aliaj branĉoj de la arto, ekzakte sekvis la direkton kaj linion pri la literaturo kaj arto de la Ĉina Komunista Partio. Tion montras unue la temoj kaj enhavoj. Ekzemple, aperas sur niaj pentraĵoj ne plu parazituloj de superaj socitavoloj sed heroaj figuroj de simplaj laboruloj, kiuj reformas la naturon kaj kreas la mondon. En niaj pentraĵoj pri pejzaĝoj, oni ne plu vidas solecan kuir-ejan fumon en dezertejo, nek iajn forlasitajn fragmentojn de montoj kaj riveroj, sed en granda kvanto novajn reformitajn aspektojn de la lando spegulantaj la batalojn de la vastaj popolamasoj kontraŭ la naturo, kaj la pitoreskajn pejzaĝojn de la lando, kiuj inspiras fervoran patriotismon al la popolo. En niaj pentraĵoj pri floroj kaj birdoj, ne plu aperas la sentimentalaj bildoj kun korvoj frostiĝintaj sub subiranta suno, aŭ velkiĝintaj folioj kaj nudigitaj branĉoj, sed prosperaj, belaj, kolorriĉaj kaj ĝojigaj belajoj. Kia giganta ŝanĝo tio estas! En ĉiuspecaj pentraĵoj ĉu pri homoj, ĉu pri pejzaĝoj, ĉu pri floroj kaj birdoj, senescepte enkorpiĝas certa-grade la spirito de la nova epoko, la pensoj kaj sentoj de la laboruloj.

La ĉina pentrarto havas longan historion kaj akumulis riĉajn spertojn. Ĉi tiu impona kultur-trezoro estas fierinda por ni. Ĉina pentrarto okupas apartan lokon en la arto de la mondo, ĉefe, dank' al la fakto ke ĝi havas okulfrapajn kaj riĉajn naciajn karakterizaĵojn. Ĝi ĉiam kontraŭas kaj naturalismon kaj formalismon. Ĝi insistas pri “integriĝo de la formo kaj la spirito”, strebante kapti la spiriton sed ne preterlasante la forman similecon. Por ekkoni kaj prezenti la objekton ĝi havas tre klaran

sciencan sistemon. Ekzemple, en pentrado de maljuna pino, la unua konsidero de la pentristo ne estas la ekstera aspekto de la arbo, sed la esenco de ĝia spirito, kaj la ĉefajn karakterizaĵojn, kiuj distingas ĝin de aliaj arboj. Tial, kiam pentristo prezentas iun maljunan pinon, li atentis ne nur la prezenton de ĝiaj malsamaj aspektoj en malsamaj cirkonstancoj kaj malsamaj sezonoj, sed ĉefe prezentas, pere

Angulo de la Konstruejo de Sanmen-gorĝa Hidro-elektrejo.

Ĉinstila pentraĵo de Dong Jifang





Himno al Humen-a Popolkomunumo.

Pentris Ĉen Dongting, Huang Anjen k Ĉen Ziji

de pentrado pri la karakterizo de la pino, ĝian spiritan esencon, kaj per tio esprimas la senton de la pentristo. Estas konate, ke la fortikeco de la pino ofte estas figurata kiel enkorpiĝo de nobla karaktero de la homo. Aliflanke, ĉina pentrarto en sia esprima metodo posedas altan kapablon de arta ĝeneraligo. Iuj demandis kie troviĝas la pejzaĝo pentrita en la bildo “Ho, tiel ĉarma estas la patria ter”. Laŭ ni, kvankam en realeco oni nenie povas vidi tiun pejzaĝon, tamen ĝi ja ekzistas. Sur la bildo estas pentritaj la vidaĵo de la nordo, kie “montvicoj dancas kiel arĝentaj serpentoj”, kaj ankaŭ la pejzaĝo de sudo de Jangzi-rivero, plena de printempa spiro. Tie troviĝas la Granda Muro, la ondanta Flava Rivero kaj ankaŭ la vasta fekunda ebena en la centra parto de la lando. Neĝflokaj ŝvebas okcidente, sed leviĝas la matena suno oriente. Oni provis per altgrada ĝeneraligo prezenti la senkompare vastan pitoreskan vidaĵon de la patrolando, kaj tiel esprimi la heroan aspiron kaj noblan celon de nia popolo, konkurantaj kun la impono de la patrolando.

Dum la pasintaj dek unu jaroj, en la praktikado de pentrarto, ni fidele sekvis la principon akcepti kritike la heredaĵon, farante reformojn kaj kreadojn sur la bazo de heredado de la tradicioj, tiel, iom post iom unuigis la novaj enhavoj kun la tradiciaj formoj en la nova arta kreado, kaj formiĝis paŝo post paŝo, novaj formoj kaj novaj stiloj kun nacia karakterizaĵo. Pro tio, la ĉina pentraĵo estas arde amata kaj favore akceptata de la vastaj popolamasoj, kaj kreiĝas nova mondo en la kreado de ĉinaj pentraĵoj en servado al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.

Antaŭe ni kutime klasifikis la ĉinajn pentraĵojn en tri kategoriojn, nome: homo, pejzaĝo kaj floro-birdo. Kvankam ĉi tiu klasifiko sinbazas sur malsameco de la temoj kaj enhavoj, sed rezulte de tiu ĉi labordivido kaj historia disvolviĝo, iom post iom, formiĝis respektive specialaj formoj kaj apartaj stiloj por ĉiu el tiuj ĉi kategorioj.

Tamen, en la kunligo de la novaj enhavoj kaj tradiciaj formoj kaj en la praktiko de kreado, ne estas tute sen malfacilaĵoj aŭ sen kontraŭdiroj. Ĉar la enhavo decidas la formon, kiu devas nepre submetiĝi al la enhavo por ke la lasta povu esti korekte esprimata. Tio konsistigas la ĝustan rilaton inter la enhavo kaj formo. Rilate al la heredo kaj disflorigo de la heredaĵoj, estas necese unue fari sciancan analizon pri ili por asimili la kvintesencon, forigante la rekrementon. Se ni ne serioze pristudus, ni ne povus fari konkretajn analizojn kaj kritikojn, bazitajn sur solida grundo. Samtempe, ni ĉiam kontraŭstaras kontraŭ kreado sur bazo de nenio, sin fortranĉinta de la tradicioj, same ankaŭ kontraŭ la kruda transpreno de fremdaj formoj anstataŭ kreado. Ni kontraŭas kaj nihilismon, kiu ignoras la nacian tradicion, kaj konservatismon, kiu konservas kaj gardas eĉ malperfektaĵojn. Ĉar ambaŭ kontraŭas la direktan de “evoluiĝi novon el malnova”. La socialisma konstruado en nia lando daŭre antaŭen saltas kun senprecedence alta rapideco. La popolo tra la tuta lando inspirate de la tri ruĝaj standardoj* kreas ĉiam pli grandajn riĉaĵojn por nia socialisma afero kaj sur ĉiuj produktaj frontoj senĉese aperas heroeaj

(Daŭrigo sur p. 257)



Fisista Vilaço

Êinstila pentraço de Lang Guohong



Printempa Festo (parto)



Înstila pentrajo de Ĉen Bajji



La Popolo Kreas Miraklojn en Ŝangado
de la Fluejo de la Flava Rivero ĉe Vejŝan

*Kolektiva verko de la Arto-
instituto de Ŝandong-provinco*

Revolucio en Medicino

Aplikado de Sinteza Rapida Terapio de Kombino de la Ĉina kaj Okcidenta Medicinoj en Pekina Hiehe-hospitalo

LA medicinaj laborantoj de Pekina Hiehe-hospitalo de Ĉina Akademio de Medicinaj Sciencoj, aktive enkondukis la sintezan rapidan terapion de kombino de la ĉina kaj okcidenta medicinoj, kaj akiris tre bonajn rezultojn en la kuracado.


En marto, 1960, la nomita hospitalo decidis renovigi la kurac-metodon de diabeto. Laŭ koncepto de okcidenta medicino, diabeto estas malsano kaŭzita de pankreaso kies funkcio malboniĝas, ne povante sekrecii sufiĉan insulinon por reguligi la metabolon de sukero en la sango, tiel ke la enteno de sukero en la sango altiĝas, kaj, kiam la sango fluas tra la renoj, la sukero ekskreciiĝas el la korpo kune kun urino. De pli ol cent jaroj la kuracrimedo de la okcidenta medicino konsistas el: limigi amelhavajn manĝaĵojn, redukti la asimiladon de sukero kaj injekti insulinon por helpi la reguligadon de la metabolo de sangosukero. Do la diabetulo devas esti ĉiutage injektata per insulino kaj manĝi laŭ dieto kun tre malgranda porcio, suferante malsaton kaj malsanon dum la tuta vivo. Sed laŭ la ĉina tradicia medicino oni povis ankaŭ resanigi iujn diabetulojn sen dieta limigo. Tio montras ke dieta limigo ne estas ĉiokaze nepre necesa. Tamen, en la speciala grupo de diabeta kuracado troviĝis diferencaj opinioj kaj disputoj pri aplikota kuracmetodo. Iuj konsentis uzi ĉinajn medikamentojn, sed hezitis pri forigo de la dieta limigo, timante la kreskon de sangosukero ĉe la paciento kaj serioziĝon de la malsano.


Poste, kiam la doktoroj, lernis la verkon de Prezidanto Maŭ Zedong *Pri Kontraŭdiro*, ligante ĝin kun la praktiko de kuracado, subite malfermiĝis vasta perspektivo al ilia pensado kaj ili enmetis multajn etiologiajn kaj terapiajn problemojn pri diabeto. Laŭ la vidpunkto de la ŝanĝiĝo kaj evoluo de la afero, kaj kontrolinte la diabetajn kazojn, en kiuj la doktoroj de ĉina medicino kaj de la okcidenta medicino sukcesis en la pasinteco, ili starigis al si la

firman kredon ke diabeto estas venkebla. Laŭ la vidpunkto de unueco inter la partoj kaj la tuto kaj konsiderante la fakton ke ĉe 33% el diabetulaj kadavroj nenia patologia difektiĝo estis rimarkita sur la pankreasoj, dume ne mankis kazoj ĉe kiuj la mortintoj kvankam kun difektita pankreaso, ne suferis diabeton, ili rimarkigis ke la kaŭzo de malsano rilatas ne ekskluzive al la pankreaso, sed ankaŭ al aliaj partoj de la organismo. Inspiritaj de la teorio de efikoj kaj interrilatoj de kaj inter la ekstera kaj interna faktoroj, ili konstatis ke limigo de dieto kaj injektado de insulino povas redukti provizore la kvanton de sangosukero dum mallonga tempo, sed ankaŭ meti la funkciadon de la pankreaso en staton malviglan aŭ anstataŭigitan. Tiel, la malsano ne povas esti plene forigita. Multaj pacientoj eĉ citis faktojn, ke kelktempe la sangosukero eĉ malpliiĝis kiam ili prenis pli da nutraĵo; tio montras ke troviĝas aliaj kaŭzoj, kiuj influas la kreskon kaj reduktiĝon de la sangosukero. Kaj oni ekrompis al si la blindan fidon al la malnova metodo de kuracado.

Aktive kunagis kontraŭ la malsano ambaŭ la medicinaj laborantoj kaj la pacientoj. Pro la forigo

Sub la gvidado de la partia sekretario la kuracista grupeto por diabeto reĝustigas la kuracprojektojn aplikante la strategiajn penson de Prezidanto Maŭ. Foto de Luo Mingjang






Kuracisto de diabeto donas lecionon al siaj pacientoj por ke ili mastru la batalilojn kontraŭ diabeto.

Foto de Vang Gin

de la dieta limigo la pacientoj nun ricevis konvenan kvanton da nutraĵo; doktoroj kaj flegistinoj gvidis la pacientojn fari *kigong** kaj *tajgikjuan***. Tiel, la organisma funkcio estis rereguligita, la pacientoj fariĝis pli fortaj, kaj dum la kuna aplikado de la ĉina kaj la okcidenta medikamentoj, la uzado de insulino estis iom post iom ĉesigita. Dank' al la sinteza terapio, rapide pliboniĝis la simptomoj ĉe multaj pacientoj. La grupo de diabeto

Kuracistoj de okcidenta kaj ĉina medicinoj kune faras diagnozon.

Foto de Luo Mingjang



kuracado provis la sintezan terapion al du grupoj da pacientoj po unu monaton. El la 65 pacientoj, ĉe 90% pliboniĝis la simptomoj, kaj ĉe 60% renormaliĝis la kvanto de sangosukero, kaj proksimiĝas plena resasniĝo. Ĝojigis tiel la laborantojn de la hospitalo kiel la pacientojn la sukceso de tiu ĉi terapio.

En la komenco de 1960, la partia komitato de la hospitalo alvokis la konkeron de la neŭrasteno. Speciala grupo estis organizita, sed al iuj grupanoj mankis sufiĉa fido. Tamen estis informite ke iuj hospitaloj en Pekino, aplikis la sintezan terapion, kaj jam akiris tujan rezulton, Junaj doktoroj multe ekscitiĝis pro tio, kaj deziris lerni la progresintajn spertojn de la aliaj hospitaloj por divastigi la sintezan terapion en la propra.

En majo junaj doktoroj, flegistinoj kaj teknikistoj de la fako de neŭrologio kaj psikiatrio de la nomita hospitalo formis grupon en kunlaboro kun la Instituto de la Ĉina Tradicia Medicino kaj la Instituto de Psikologio de la Ĉina Scienca Akademio, kiu komencis apliki la sintezan terapion al kvindek du pacientoj de neŭrasteno. Ili lernis de la spertoj de frataj hospitaloj, kaj enkondukis *kigong* kaj aliajn terapiojn, por disvolvi la subjektivan aktivecon de la malsanulo. Ili plu evoluigis la originan terapion de la kombinado de la ĉina kaj okcidenta medicinoj, aplikante la metodon de la ĉina medicino "kuraci laŭ la analizo de simptomoj", kaj doni ĉinan medikamenton por samtempe kuraci aliajn malsanojn de la neŭrasteniaj pacientoj. Post kuracado de nur 18 tagoj, el la grupo de pacientoj kun kompare serioza malsanŝtato, pli ol 96% evidente pliboniĝis kaj 82% plene aŭ preskaŭ plene resaniĝis.

Dum aplikado de la sinteza rapida terapio la junaj doktoroj kaj flegistinoj ankaŭ faris studojn por eltrovi objektivan kriterion por diagnozo, per elektroencefalografio, kaj por pruvi la ĉinan tradician medicinan teorion de klasifiko de malsan-tipoj. Tiel

* *Korpekzerco dum kiu la ekzercanto prenas difinitan korpteniĝon (staran, sidan aŭ kuŝan) kaj, malstreĉante la muskulojn, mildigante kaj plilongigante la spiradon, klopodas elimini iom post iom preskaŭ ĉian pensadon, krom malintensa direktiĝo de la konscio al iu korpoparto, ĝenerale al la loko iom sub la umbiliko interne de la ventro, nomata dantian por atingi la staton nomatan "enkvietiĝo", tiel ke la korpo kaj cerbo ĝuas plenan ripozon.*

** *Speco de kjuanŝu (ĉina luktarto).*

disvolviĝis pli profunda esplorado pri la aspekto kaj la etiologio de la malsano.

Nun, en la nomita hospitalo la sinteza rapida terapio jam aplikiĝas ankaŭ al aliaj malsanoj: alta sangopremo, ulcero de digestaj organoj, paralizo, artrito, kronika prostatito, ktp., kaj donis rapidajn kaj bonajn rezultojn. La starigo kaj apliko de la sinteza rapida terapio de kombinado de la ĉina kaj okcidenta medicinoj estas brila venko de la teknika revolucio en la fronto de medicinaj sciencoj en Ĉinio kaj ankaŭ revolucio en la ideo de kuracarto.

La sinteza rapida terapio esence diferencas de la unu sola, unuflanka kaj pasiva kuracmetodo. La ĉefa karakterizaĵo de la sinteza terapio estas la kombinado de la ĉina kaj okcidenta medicinoj, la egala atento pri aplikado de medikamenta terapio kaj korpa plifortigo de la paciento. Ĝi kunligas la subjektivan aktivecon de la paciento kun *kigong*, medikamenta, fizika kaj gimnastika terapioj, por konkeri la malsanon de ĉiuj flankoj kaj per diversaj metodoj samtempe.

La klinika efiko de la sinteza rapida terapio estas jam evidenta. Kaj estas surprizitaj multaj natursciencistoj, kiuj respektas la fakton. Iuj maljunaj profesoroj memvole partoprenas ĝian kuraclaboron kaj observas la disvolviĝon de la nova terapio. Tiuj kiuj estas kompare konservativaj en la komenco ankaŭ ŝanĝis sian apudestaran sintenadon, kaj ekvolas iel partopreni la laboron.



Suferinte pli ol 10 jarojn de diabeto kaj resaniĝinte post nur 2-semajna kuracado la pacientino ĝoje rakontas sian historion al malsanulamikoj kaj esprimas koran dankon al la kuracistoj.

Foto de Vang Gin

Nova Fizionomio de la Ĉina Pentrarto

(Daŭrigo de p. 250)

ajoj de naturreformado kaj mondkreado. Ĉiuj tiuj novaĵoj en la vivo atendas niajn pentradon kaj prikantadon. Tiu ĉi situacio postulas, ke ni devas samtempe pli multe kaj pli originale kreadi sur la bazo de la tradicioj, precipe en esprimformoj kaj esprimrimedoj, en la tempo kiam ni devas pli intense lernadi la bonajn tradiciojn. La kontraŭdiro inter enhavo kaj formo estiĝis sub la jena cirkonstanco: Sen reformo de la ĝisnunaj formoj kaj esprimrimedoj, oni ne povos plene esprimi la novan idean enhavon. Tio estas proceso de la unuigo de kontraŭdiro, kaj ankaŭ proceso de la naskiĝo de la nova nacia formo kaj nova nacia stilo. Ju pli riĉiĝas la enhavo de la ĉina pentraĵo, des pli variigigas ĝiaj esprimformoj.

Responde al la alvoko de la Ĉina Komunista Partio, la ĉinaj pentristoj, same kiel alifakaj artistoj

en la lando forlasis sian artlaborejon kaj ekvivas sur montoj kaj en vilaĝoj. Riciĝas tiel ilia kono pri batalo en la reala vivo, intimiĝas iliaj rilatoj kun la laboruloj kaj altiĝas ankaŭ iliaj pensnivele kaj artnivele en verkado. Sekve ankaŭ pli kaj pli riĉiĝas iliaj temoj kaj esprimformoj en kreado. Kaj estiĝas plej bunta senprecedence prospera stato de la ĉina pentrarto, kiu kiel aliaj fakoj de la arto ricevis senliman prizorgon kaj altan taskon de la Partio. La direkto kaj politiko pri la literaturo kaj artoj de la Ĉina Komunista Partio donas al ĝi senkomparan vivforton. Tial ĝia estonteco estas ekstreme brila kaj senliman prizorgon kaj altan takson de la Partio. Ĝiaj perspektivoj, senlime vastaj.

** T. e. la ĝenerala linio por la socialisma konstruado, la granda antaŭensalto kaj la popola komunumo.*

Por la Socialisma Konstruado de la Patrolando

— El la vivo de la ĉinaj junpioniroj —

“Mi pretas batali por la komunisma afero!” Tio estas la juro kaj ankaŭ la agadirekto de la ĉinaj junpioniroj*. Sub la gvidado kaj zorgado de la Ĉina Komunista Partio, la ĉinaj jun-pioniroj kontribuis sian parton al la socialisma konstruado de la patrolando.

* * *

EN la Ŝanhaj-a Fabriko de Medicinaj Instrumentoj aperis nova maŝino, kiun la laboristoj intime nomas “ruĝkoltuka rustforiga maŝino”. Kial oni nomas la maŝinon “ruĝkoltuka”? Simple pro tio ke ĝi estas konstruita de jun-pioniroj.

La Elementlernejo de Ĝingou-strato de Ŝanhajo starigis konstantan kontakton kun la Ŝanhaja Fabriko de Medicinaj Instrumentoj. La jun-pioniroj de la lernejo

iris regule al la fabriko por helpi la laboristojn forfroti la ruston de maŝinpecoj. La laboro estis simpla sed peniga, kaj eĉ povanta okazi ŝirvundo de la fingrohaŭto. La du pioniroj Jan Gaŭlin kaj Ĝang Julin ofte esploris kune, ĉu estas eble forfroti la ruston per maŝino anstataŭ per manoj.

Kiam Jan Gaŭlin kaj Ĝang Julin rememoris la instruon de la Partio: “Lernu la revolucian spiriton de la laborista klaso, kaj kuraĝe pensu, kuraĝe agu”, ili tuj sentis la kreskon de la forto. Ili desegnis skizon de la maŝino kaj foje kaj refoje ĝin reviziis petinte konsilojn de malnovaj laboristoj. Ĉiuj junpioniroj de la lernejo serĉis ĉie materialojn necesajn por konstrui la maŝinon. Fine, la maŝino nomata “ruĝkoltuka” estis sukcese

finkonstruita, kaj ĝi altigis la laborefikon dekkelkoble.

* * *

LA Kingtoŭ-a Elementa Lernejo en Junĉeng-gubernio, Ŝanhi-provinco, havas iun “miraklan kampon”, en kiu estas vere multaj mirakloj: Tie kreskas arbo kiu surhavas fruktojn de dekkelkaj diversaj specoj; kotonarbo kiu donas ruĝan kotonon; “du-etaĝa planto” laŭ kies folio ĝi estas brasiko, sed laŭ ĝia radiko, napa kaj “sorgeca milio” kun dika trunko kaj granda spiko. . . . Ĉiuj ĉi tiuj estas kreaĵoj de la geknaboj de la Scienca Akademio de Ruĝaj Infanoj en la vilaĝo.

En la akademio estas grupo da malgrandaj renovigistoj kiuj timas nenion. “Kion neniuj pripensis antaŭe, ni pripensos; kaj tion kio ankoraŭ ne ekzistas en la mondo, ni kreos.” Tio estas ilia alta aspiro. Ili lernas de spertaj pliaĝuloj kaj de libroj, kaj decidas devigi la naturon kontribui pli abundan produkton al la patrolando.


* * *

“VERDE vestu la patrolandon!”

Tiu ĉi sonora slogano jam transformiĝis en agadon de la ĉinaj junpioniroj. En ĉiu angulo de Ĉinio, oni povas rimarki la atingojn de tiu agado. Sur ambaŭ flankoj laŭlonge de la vojo trapasita de la Ĉina Laborista

La ‘mirakla kampo’ de la Kingtoŭ-a Elementa Lernejo en Junĉeng-gubernio, Ŝanhi-provinco.

Foto Ĝang Ĵujhua



*Infan-organizo, kiu akceptas laŭ regularo geknabojn kun aĝo de 9 ĝis 15 jaroj kaj celas eduki en kolektivo la geknabojn en aktivajn konstruantojn kaj defendantojn de la patrolando kun sana korpo kaj kreema spirito.

kaj Kamparana Ruĝarmeo dum la Longa Marŝo (1933-1934) junpioniroj kune kun plenaĝuloj kaj junuloj arbojn plantis. Apud la Gining-Erlian-a Fervojo, kiu kunligas Ĉinion, Mongolion kaj Sovetunion, verdaj arboj obstine kontraŭstaras la sabloventon. . . . Junpioniroj ankaŭ kontribuis tiesian parton.

En Puning-gubernio, Guang-dong-provinco, en la sudo de Ĉinio, troviĝas Hero-monto. Antaŭ pli ol tridek jaroj, kamarado Peng Baj, martiriĝinta revolucia gvidanto, kondukis la popolon establi tie ruĝan reĝimon. Kiam la reakciuloj atakis ĝin, la freŝa sango de la revoluciuloj ruĝigis la Hero-monton.

Post la Liberiĝo, la pioniroj de la Litang-a Elementa Lernejo ĉe la piedo de la monto decidis planti arbojn memorige al la mortintaj herooj sur la loko kie ili verŝis sian sangon kaj oferis sian vivon. En lastaj dek jaroj sur la areo de pli ol 9,600 mu-oj**, la pioniroj de Litang-a Elementa Lernejo plantis pli ol 20,000,000

Ruĝkoltuka Poŝtoŝtacio en Nanning, funkciigata de 48 junpioniroj (5-jarklasanoj) de Nanduan-a Elementa Lernejo. Foto de Gaŭ Gjun



Junpioniroj de Hinvu-a Popolkomunumo sin organizis en labortrupon kaj helpis sarkadon en rizkampoj. Foto de Tang Junhin

arbojn. Nun, la monton jam dense ombas la verdaj arboj.

* * *

LA agrikulturo de nia patrolando baldaŭ modernigos! Tiu ĉi entuziasmiga novaĵo ekscitis la korojn de ĉiuj junpioniroj. Ili ĉiuj komencis agadon.

La junpioniroj en Tangŝan-urbo, Hebej-provinco, kolektis ĉie utili-

geblajn forjetatojn kaj post du monatoj ili sukcesis aĉeti unu traktoron per la mono akirita per la kolektitaj forjetitajoj. Tiun ĉi traktoron ili dediĉis al la popola komunumo.

Jihing-gubernio, Giansu-provinco, produktas rizon. Kiom granda kvanto da akvo la rizo bezonas dum ĝia kreskado! Por helpi la popolan komunumon, la junpioniroj iniciatis kampanjon de kontribuado: ili kolektis forjetitajojn kaj herbojn . . . per la enspezo de sia laboro ili kontribuis por la komunumo "Ruĝkoltukan Elektran Irigacian Stacion", kiu povas irigacii pli ol dudek mil mu-ojn.

* * *

EN la tagoj kiam oni celebris la stariĝon de urbaj popol-komunumoj, la junpioniroj ankaŭ ne restis senfare. En tio, la junpioniroj de Jukingli en Tiangin-urbo faris ekzemplon por la tutlandaj junpioniroj. Ili organizis "ĉionpovan serv-grupeton". Kiam la komuna manĝejo estis baldaŭ

** 1 mu-o=1/15 hektaro.

funkcianta en Jukingli, ili helpis transporti brikojn kaj konstrui kuirejojn. Kiam iu vojlampo en Jukingli ne brilis, ili tuj alportis ŝtupetaron, kontrolis kaj riparigis ĝin. Ĉar la onkloj kaj onkinoj en Jukingli ĉiuj laboris ekstere, la geknaboj do helpis ilin per purigo de ĉambroj, por ke ili povu labori pli senzorge.

La modelaj agadoj de la "ĉion-pova serv-grupeto" rapide disvastiĝis en ĉiujn lokojn en la tutlando. La geknaboj ja formis aktivan forton de la urbaj popolkomunumoj.

* * *

Jam de kelkaj jaroj la ĉinaj junpioniroj kaj geknaboj vigle agadis en ĉiuj lokoj de la patrolando. Ili laŭpove partoprenis en la patrolandan konstruadon. Kaj en tiuj agadoj ili lernas labori, akiras sciojn kaj formas al si la spiriton de servado al la popolo ekde sia junaĝo.



Junpionira produkta grupo de radiaparatoj kun kristalo-detektilo en la Tria Gōudong-a Elementa Lernejo de la urbo Tangšan, Hebej-provinco.

Foto de Ŝi Panki

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ *

Senprecedenca prospero de ĉina literatura kreado

Dum la lastaj 4 jaroj la libro-forme eldonitaj literaturaj verkoj en Ĉinio sume pliiĝis proksimume duoble kompare kun tiuj dum la 6 jaroj de 1950 ĝis 1956. Ankaŭ la membroj de la verkistaj asocioj en diversaj lokoj kreskis de 945 antaŭ 4 jaroj ĝis 3719 de la kuranta jaro. Amase aperas novaj elstaraj verkoj kaj novaj eminentaj verkistoj.

El la famaj noveloj kaj romanoj temantaj revolucionan historion oni povas citi *Ŝanĝiĝo dum 60 jaroj* de Li Liuju, *Herooj sub la ruĝa flago* de Liang Bin, pri la vivo kaj batalo de ĉinaj kamparanoj, *Strateto de tri familioj* de Oŭjang Ŝan, pri la kreskado de la revolucionaj junuloj kaj klasdiferenciĝo en Kantono ĉirakaŭ 1927, *Kanto*

de juneco de Jang Mo, pri persista batalado de ĉinaj junuloj sub reĝado de Ĉiang Kajŝek, *Floro de maldolĉa legomo* de Feng Dejing, pri la batalado de la heroaj popolo kaj armeo en la postfronto de la malamikoj dum Kontraŭjapana Rezistmilito, *En densa arbaro kaj sur neĝa ebenejo* de Kju Bo, pri la malfacila batalado de la popola armeo kontraŭ la kuomintang-aj banditoj tuj post la Liberiĝo ktp. Laŭ nekompleta statistiko, la cifero de la eldonitaj literaturaj verkoj priskribantaj la revolucionan historion atingis proksimume 239.

Rilate la verkojn spegulantaj la kamparanan vivon oni povas citi el la plej bonaj *Sanlivan-vilaĝo* de Ĝaŭ Ŝuli, la unua volumo de *Historio pri fondo de entrepreno* de Liu King, *Grandega ŝanĝo en*

montvilaĝo de Ĝoŭ Libo, *Dum neĝstorma nokto* de Vang Venŝi. ktp. Tiuj ĉi verkoj formis panoramon pri klasa transformiĝo en la kamparo de Ĉinio post la Liberiĝo.

Ankoraŭ pli grandan sukceson havas la verkoj spegulantaj industriajn konstruadon ambaŭ kvante kaj kvalite. Ekzemple la verkoj *Ŝtalo el centfoja forĝado* de Aj Vu, *Tra la ondararo per favora vento* de Caŭ Ming kaj *En pacaj tagoj* de Du Pengĉeng, ĉiuj estas laŭdataj de la vastaj legantamasoj.

Precipe kuraĝiga estas la amasa apero de neprofesiaj laboristaj kaj kamparanaj verkistoj kaj multaj elstaraj verkoj koopere verkita de la amaso kaj profesiaj verkistoj. Kaj edukigas miloj da novaj fortoj literaturaj en la neprofesia verkado de la amaso.

Reflorado en zefiro kaj sunvarmo

MI estis servutulo-aktoro de la tibeta teatraĵo antaŭ la Liberiĝo, kaj nun havas la aĝon de 60 jaroj. En la malbenita socio de feŭdisma servuteco, mi travivis 59 jarojn en senfina tortureco kaj suferado. Nur de marto lastjare, mi ekĝuas novan vivon. Senkomparan feliĉon mi sentis partoprenante la Trian Tutlandan Kongreson de Literaturaj kaj Artaj Laborantoj, precipe kiam mi persone vidis Prezidanton Maŭ, la grandan gvidanton de ĉiuj nacioj de nia lando.

La tibeta teatraĵo estas unu el la multaj eminentaj teatraĵo-specoj de nia lando. Ĝi havas longan historion, okulfrapan lokan koloron kaj originalan nacian stilon. Sed sub la reakcia regado de la tri mastro-sinjoroj*, la tibeta teatraĵo ne nur ne povis disvolviĝi, sed eĉ suferis senkompatan mistraktadon. La sorto de ni aktoroj estis sama kiel tiu de miliona servutularo: senfina subpremado kaj senfina ekspluatado, ne nur sen politikaj rajtoj sed ankaŭ sen la persona libero. Nur simpla manlevo aŭ sola vorto de la grandaj sinjoroj povis decidi nian viv-morton, ne parolu jam pri la libero en la kultura kaj arta aktivado. La servutuloj kaj sklavoĵoj nenion havis ankaŭ ekonomie. Ili nur laboregis servute, senkompanse kaj senfine por la tri mastro-sinjoroj. Iliaj ŝarĝoj estis pli pezaj, kaj la suferoj, pli multaj ol tiuj de la brutoj. Jen estis ilia viva bildo.

La arto de la servutuloj kiuj ludas tibetan teatraĵon, estis ekskluzive monopoligita de la mastro-sinjoroj por ilia amuziĝo kaj distriĝo. Ĉu la aktoroj estas junaj aŭ maljunaj, ĉu ili estas sanaj aŭ malsanaj, la mastro-sinjoroj tute ne zorgis. Ili nur devigis la aktorojn kanti aŭ danci, tute egale, ĉu ili tion povis elteni aŭ ne. Ne estis permesite kanti fuŝe. Terurajn insultojn kaj batadojn ili tuj ricevis, nur se la mastro-sinjoroj sentis sin iom ofenditaj. Tian sklavivan vivon la aktoroj povis fini nur post la morto. Krom prezentado por la grandaj sinjoroj en ordinara tempo, ni, aktoroj ankaŭ devis servi aliloke per prezentadoj al la tiama registaro, grandaj temploj kaj la altaj nobeloj, ĉiujare en la aŭtuno. Tiam la grupo de aktoroj, junaj kaj maljunaj havantaj nek manĝaĵon nek monon en la poŝo devis peti almozon por sin nutri survoje al la prezentejo. Kaj kiam ili nenian almozon ricevis, ili devis rapidi al la celloko kun malplena stomako. Post la servo-prezentado, oni devis reiri senprokraste. Se reiro iomete malfruiĝis, la lakeoj de la mastro-sinjoroj tuj nin arestis kiel

“krimulojn-forkurintojn” kaj jetis nin en malliberejon. Laŭ la leĝo de la mastro-sinjoroj, la servutuloj devis ĉiujare pagi al ili kap-imposton. Sed povantaj nek sate manĝi, nek varme sin vesti, kiel ni povis pagi la imposton? Tiam ni devis pagi la imposton per mono akirita per almozpetado aŭ taglaboroj, ĉar, alie, oni denove nin punegus.

La tiama reakcia loka registaro de la regiono Tibeto ĉiam praktikis strangolan politikon al la tibeta teatraĵo. Ĝi malpermesis ĉiujn teatraĵojn instruajn por la popolo. Ĉiuj ja scias, ke “*Princino Venĉeng*” estas unu el la tradiciaj tibetaj teatraĵoj tre ŝatata de la tibeta popolo. Ĝi vivece kaj kortuŝe prikantas la intiman rilaton inter la tibeta kaj hana nacioj; “*Fraŭlino Nangsa*” estas teatraĵo prikantanta la batalon de iu servutulino nomatan Nangsa de Ĝjelci-distrikto. Ŝi batalis kontraŭ la subpre-

* T. e. la mastro-sinjoroj de la malnova tibeta registaro, la temploj kaj la nobeloj.

S. J. Zee:


Antaŭ la Popola Halo en Pekino

*Ni vivas en epoko mitokrea,
Kaj ni mem estas la mitokreanto.
Ekmarŝas jam grandpaŝe la giganto,
Defalis la kateno prometea.*

*Antaŭ ni brilas vasta perspektivo:
Maro de lumo, floro kaj muziko.
Sur kampo, en minejo kaj fabriko
Ĉie jubilas la bolanta vivo.*

*Sub saĝa gvido de la Kompartio,
Por la popolo gaja kaj sen laco
Neeblas en la mondo ja nenio.*

*Antaŭ la Pordego de Ĉiela Paco,
Jen Popolhalon de l' ĉefurbo ĉina
Elsorĉis kvazaŭ lampo aladina.*



Ĉe la Tria Tutlanda Kongreso de Literaturaj kaj Artaj Laborantoj Ĉja Ŝidonĉjub (la maldekstra) estis akceptata de Prezidanto Liu Ŝaŭki.

Foto de Hin Hua

mado de la mastro-sinjoro, kaj fine mortigis la subpremanton. Fraŭlino Nangsa fariĝis ekzemplo de ĉiuj servutuloj kaj heroino amata de la popolamasoj. Sed la mastro-sinjoroj maltrankvilaj en sia koro, timante ke iam la popolo malkovros ilian veran vizaĝon kaj leviĝos batale, do ordonis arestigon de aktoroj kaj servutuloj kiuj ludus tiun ĉi teatraĵon. La ridinde stultaj reaciaj mastro-sinjoroj povis enkarcerigi kaj enkatenigi la homojn sed neniam povis kateni ilian penson, nek ĝin malpermesi. Pli vaste disvastiĝis la "kontraŭleĝa" teatraĵo "Fraŭlino Nangsa", kiu ĉiam instigas la batalemon de la servutuloj.

La mastro-sinjoroj fermis en siajn palacojn la tibetan teatraĵon por ke ĝiaj enhavo kaj tekniko de prezentado restu katenataj de la rutinoj. Ne estis permesate al la aktoroj eĉ iomete ilin retuŝi, tiom pli verki novajn dramojn. Tio rompis la rilaton de la tibeta teatraĵo kun la popolamasoj, ke ĝi ne povis plu vivi same kiel freŝe belaj plantoj perdintaj la grundon. La pompa arta floro velkiĝis. Mistraktite de la mastro-sinjoroj, preskaŭ ĉiuj antaŭaj 12 grupoj de tibeta teatraĵo, estis sufokitaj, kaj ĝis la paca Liberiĝo en 1950, postvivis nur nia sola grupo "Kjormolung", sed tiam ĝi ankaŭ estis ĉe sia agonio. La mizera stato, kiu trafis la tibetan teatraĵon, spegulis la mallumecon, sovaĝecon kaj kruelecon de la feŭdisma servuta sistemo, kaj plene malkovris la reacion naturon de la klaso de servutulo-posedantoj.

Post la venko super la reaciaj ribeluloj tibetaj en 1959, komenciĝis la grandioza kampanjo de la demokratia reformado. La tibeta popolo, sub gvido de la Ĉina Komunista Partio, renversis la tri mastrosinjorojn kaj la feŭdisman servutan sistemon. Milionoj da servutuloj stariĝis kiel liberaj homoj! Ili estis liberigitaj politike kaj ekonomie. En la sama tempo, la tibeta teatrarto ricevis ankaŭ decan traktadon kaj senliman prizorgon de la Partio kaj la Registaro. Kaj la vivo de ni aktoroj multe suferintaj antaŭe tuj estis zorgata. Tuj post la fondiĝo, la Tibeta Teatra Grupo en Tibeto, tre rapide rekrutigis al si vicon da novaj fortoj. Mi fariĝis estro de tiu teatra grupo, kaj poste komitatano de la Politika Konsiliĝa Konferenco. Verdire, ni eĉ ne povis plu paroli pro ĝojekscitiĝo, kaj nur laŭte kriis: Vivu la Komunista Partio! Vivu Prezidanto Maŭ!"

Dum la kampanjo de la demokratia reformado ni akuzis la sangajn krimojn de la tri mastrosinjoroj, lernis diversajn politikojn de la Partio, kaj multe altigis nian klasan konscion sindediĉante al la

laboroj kun senlima revolucia entuziasmo. Ni agas laŭ la direkto de "irado per du kruroj" en la laboroj — unuflanke, ni aktive plibonigis la tradiciajn teatraĵojn, aliflanke ni verkis kaj provludis la novajn. Dank' al la helpo de la han-aj k-doĵ, ni sukcesis tre rapide surscenigi la modernan teatraĵon "Bonfaroj de la PLA-anoj" kaj la plibonigitaj tradiciaj teatraĵoj "Princino Venĉeng", "Fraŭlino Nangsa" k. a. La geaktoroj veturadis per siaj propraj aŭtoj al vilaĝoj, al armeaj trupoj, kaj en multaj lokoj faris prezentadojn, rikoltante varman akcepton de la popolamasoj. Ni sentis senkomparajn emocion kaj entuziasmon, pro tio ke nun ni servas al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj dediĉas nian forton al la afero de revolucio!

Tiuj ĉi faktoj montras ke la literaturo kaj arto povas grandpaŝe disvolvi kaj prosperi en Tibeto nur sub la gvidado de la Komunista Partio kaj Prezidanto Maŭ kaj en la granda familio de amikeco kaj kunlaboro inter ĉiuj nacioj en Ĉinio.



Kuraciro en Neĝblova Nokto

— Popolkanto de la popola armeo —

Lun-makulo
En nebulo.
Kuracist' al malsanulo
Rajdas spit' al neĝblovado vojobstrukca.
Nur funkcias la orelo, ne l' okulo.

Glaci-tavolo,
Sur rivero.
Ĝin frapegas la huffero.
La glacitavolo ne eltenas la pezegon.
Ruliĝ-falo! —
La rajdant', ĉevalo en rivero!

Rivervado,
Montgrimpado.
Jen la pord' de l' vizitato.
Malfacilas elseliĝ' — la botoj frostfiksiĝis
en la piedingoj
Kaj la vest' rigidas kiel lado!

Kurac-peno,
Pas' de l' sveno,
Post-vekiga mir-mieno.
La doktoro ekridsvingis siajn brovojn,
de kiuj
Falas glacieroj jen kun beno.



Elĉinigis Laŭlum

Ilustris Huang Ĝou

Amatora muzika aktivado de la amaso

Muziko nun jam fariĝis amasa movado en Ĉinio. Ĝi ne estas nur io aprezata de la amaso, sed ankaŭ rimedo per kiu la amaso spegulas sian vivon. La amasaj neprofesiaj muzikgrupoj nun troviĝas en urboj, minejoj, kamparoj, trupoj kaj lernejoj tra la tuta lando kiel densaj steloj en somera nokto. Ekzemple, en Ŝanhi-provinco konstante aktivis pli ol 13,000 neprofesiaj ĥoroj. En Ŝanhajo nur en la "kantkonkurso de ruĝa 'majo" partoprenis 1,500,000 personoj. 80% el la pli ol 1,600 kantoj elektitaj por la

konkursoj de kvartala kaj urba niveloj estas novaj verkoj de la amaso mem. Partoprenantoj de la kantaktivadoj troviĝas en ĉiuj profesioj kaj tavoloj: En la Popola Liberiga Armeo troviĝas "ĥoro de generaloj", en multaj urboj kaj vilaĝoj troviĝas ĥoroj de maljunulinoj aŭ maljunuloj. Verkado, komponado, prezentado kaj kantado de muzikajoj de popolamasoj mem fariĝas jam ordinara fenomeno. Tial en la amasa movado aperas multe da aktivuloj kaj spertuloj, kiuj kapablas mastri certan arton de kantado, prezentado, verkado kaj direktado de ĥoroj.

Novaj laboristaj kaj kamparanaj membroj de la Scienca akademio

Lasttempe la filioj de Ĉina Scienca Akademio en Liaŭning-, Kinghaj- kaj Gianghi-provincoj akceptis denove 280 laboristajn kaj kamparanajn membrojn kiel specialajn esplorantojn. Plejparte el ili estas labormodeloj kaj progresintaj produktantoj. Troviĝas inter ili ankaŭ inĝenieroj kaj teknikistoj devenintaj el laboristoj kaj kamparanoj.

KURANTAJ AFEROJ



DELEGA kaj kortusa, kun stilo originala, la dancopero "Tria Franjo Liu" estis prezentata de la Opertrupo de Popola Dancopero de Guanghi-a Ĝuang-nacia Aŭtonoma Regiono, en Pekino ekde la 1-a de aŭgusto, kaj gajnis unuaniman aplaŭdon de la literaturaj kaj artaj rondoj kaj spektantoj de nia ĉefurbo.

Tria Franjo Liu aperanta sur la scenejo, estas saĝa, kuraĝa, laborema kaj bela vilaĝa junulino lerta en kantado kun forta bataspirito. Plena je optimismo, ŝi laŭdas per kantado laboron kaj la naturon esprimas la volon kaj idealon de la laboranta popolo, kaj estas profunde amata de la laborantaj popolamasoj. Ŝi ankaŭ kuraĝe malkovras per kantado la ekspluatadon kaj subpremadon de la feŭdisma reganta klaso al la laboranta popolo, kaj tial estas persekutata de la feŭdisma regantaro dolore pikita de ŝia kantado, ke ŝi ne povas trovi por si rifuĝejon kaj estas devigata migradi de loko al loko. Sed malgraŭ ĉia ajn persekutado, Tria Franjo Liu neniam senkuraĝiĝis, kaj neniam cedis, ŝi ankoraŭ ĉie kantas:

*Nur konstante fluu torente la akvo,
Monton ĝi formordos jam en iu tago.*

Kaj ŝi ankoraŭ kantas kun sento de plena praveco:

*Havante bastonon mi iros ser-
pentojn mortbati sur monto,
Kun reto en mano mi povas
testudojn elkapti el akvo;
Eĉ reĝon riproĉi kuraĝas mi, se
ĉe mi estas la pravo;
Jam ne pri sinjoroj parolu, ĉi
tiuj en la mondo.*

Por la laboranta popolo, ŝiaj

*Belegaj montkantoj simile al
fluoj de fontoj,*

Murmuras ĉie en la arbaroj kaj montoj.

Kiam Tria Franjo Liu kantas montkanton,

*Kantadon komencas unu kiun tuj sekvas mil ĥore,
tiel ke la malriĉuloj ekridas plenkore,
Kaj la bienuloj timtremas angore.*

La dancopero "Tria Franjo Liu" adoptis goŝju* kaj gotaj*, ŝatataj de ĝuang-nacio, kaj de la komenco ĝis la fino ĝi ĉarmas la spektantojn per siaj belaj montkantaj arioj kaj popolkantaj versoj milfoje

Tria Franjo Liu gaje vivas ĉe sia patrinflanka avino. Jen ŝi kantas kaj dancas kun la vilaĝaninoj.

Foto de Tan Ĝikiang





Tria Franjo Liu malkaŝanta la intrigon de la bienulo Muo Haijen.

Foto de Tan Ĝikiang

poluritaj kaj ŝatataj de la popolamasoj. Spektinte tiun ĉi dancoperon multaj personoj de la literaturaj kaj artaj rondoj opinias ke ĝi donis al la spektantoj ne nur aprecon de arto kantdanca, sed ankaŭ de bela literatura lingvo. La spektintoj ĝenerale opinias, ke la libreto de tiu ĉi dancopero estas plena je vivecaj kaj figuraj esprimoj de la popolamasa lingvo, spegulas amon, malamon kaj saĝon de laboranta popolo, kaj manifestas la batalefikon de popolkanto.

“Tria Franjo Liu” estas origine bela legendo vaste cirkulata en Guanghi. En la pasinta jaro por celebri la 10-an datrevenon de la fondiĝo de nia ŝtato, la Liuĝou-a Cajdiaŭ-opertrupo** de Guanghi verkis la dancoperon “Tria Franjo Liu” surbaze de la legendo, “pren-

*Goŝju (kantfoiro) kaj Gotaj (kantkonkurso) de ĝuang-oj ambaŭ okazas dum foiro, ĉe la unua ĝejnuloj kunvenas en rondoj kaj kantas unu al aliaj por interŝanĝi amsenton, produktajn spertojn aŭ por nur ŝerci ktp., ĉe la dua partoprenas nur la plej lertaj gepopolkantistoj konkurse.

**Cajdiaŭ estas speco de popolo-pereto en Guanghi.


ante la kremon kaj forjetinte la rekrementon”, adoptante kiel bazan formon cajdiaŭ-on (populara operformo de Guanghi), kaj samtempe ankaŭ versojn kaj ariojn de popolkantoj profunde ŝatatajn de popolamasoj. Poste en la tuta aŭtonoma regiono leviĝis alta tajdo de amasa literatura-arta aktivado por surscenigi kaj prezenti “Tria Franjo Liu”. Pli ol 1.200 opertrupoj profesiaj kaj amatoraj prezentis ĝin kaj la spektantaro atingis 12.000.000 personfojojn. Dank’ al la grandskala surscenigo kaj prezentado de “Tria Franjo Liu” aperis nova situacio de grandaj prosperiĝo, divastiĝo kaj altiĝo en la literatura-arta aktivado tra la tuta regiono. En aprilo de la

kuranta jaro, laŭ la decido de la Regiona Komitato de la Komunista Partio, okazis festivalo de “Tria Franjo Liu” de diversaj operpecoj kaj libretoj. La dancopero “Tria Franjo Liu” nun prezentata en nia ĉefurbo estas rekreaĵo asimilinta la kvintesencon de diversaj samtitolaj operoj prezentitaj dum la festivalo. Kaj ankaŭ parto de la aktoroj de tiu ĉi dancopero estas elektitaj el la literatur-artaj aktivuloj de la amaso.

Tria Franjo Liu gajnis la kantokonkurson.

Foto de He Guoĝeng





La maljunulo ekjetis al mi malamikan rigardon kaj diris kun granda ekscitiĝo. “Kio? Ĉu vi volus diri, ke ankoraŭ troviĝas homo en la mondo, kiu preparas sin por milito? Ĉu vi ne vivis sur la terglobo dum la milito?”

Mi volis diri: Amiko, ni ĉinoj suferis tute ne malpli multe ol vi dum la milito, kaj scias ne malpli ol vi pri la neceso strebi al la paco Sed al homo, kia tiu maljunulo, mi sciis, ĉio ne estis klarigebla per kelkaj vortoj.

MALFERMINTE la navigacian mapon de la Norda Maro, mi tuj vidis antaŭ mi vastan areon de la maro dense markitajn per signoj de mina regiono. Tiujn min-regionojn post-lasis Usono, Britio, Francio kaj Germanio de la Dua Mondmilito. Kiom da jaroj jam pasis, sed ili restas ankoraŭ netuŝitaj. Kiam nia ŝipo navigaciis tra la mallarĝa vojo penetranta tra la min-regionoj, en mia imago refoje aperis la sceno, kiun mi vidis navigaciante ĉe Japanio: minoj flosas sur la maro, mergiĝintaj ŝipoj kuŝas plene sur la marfundo, en la aero zumadas militaj aeroplanoj de Usono. . . . Nun, kiam ni atingis la lokon ĉe la enfluejo de Elbo por atendi la piloton, kiom simila al Japanio estas la sceno sin prezentanta antaŭ ni!

Ne, mi tuj diris al mi, kiam mi vidis la germanan piloton, kiu suriris nian ŝipon. Kvankam neniom ŝanĝiĝis la agresiva politiko de la imperiismaj landoj ĝis nun, sed Japanio, sub la okupado de la usona armeo, jam komencis ŝanĝiĝi; samo okazas ankaŭ al la okcidenta Germanio, kiu estas same sub la okupado de la usona armeo. La ŝanĝiĝo komenciĝis unue ĉe la homo. Antaŭ kelkaj jaroj, kiam mi unuafoje pasis ĉi tie, mi interkonatiĝis kun la piloto de Elbo-rivero, kiu antaŭe estis ŝipestro. Li laŭte kriis, tuj kiam li surpaŝis nian ŝipon: “Jam estas paco, amikoj! Jam estas paco!” Li ektiris min al la marmapo, kaj diris, montrante iun mergiĝintan ŝipon apud la navigacia vojo: “Tiu estas la ŝipo, kiun mi estris dum la milito; kiam ĝi alfundiĝis, sukcesis fuĝi nur du personoj el la tuta ŝipanaro. Jam sufiĉis la milito, venis nun la paco! Amiko, estas pli neniu sur la mondo, kiu ankoraŭ volus militon.”

Ŝajne la maljunulo jam preskaŭ histeriigis pro sopiro al la paco. Neniu sciis, kiom da fojoj li murmuris al si la vorton paco dum la pilotado. La maljunulo jam ebriiĝis plene en sia pac-kriado. Mi ne volis lin eksciti, sed estas kulpo silenti antaŭ la aktuala kruda realaĵo. Tial mi iom lin atentigis: “Se vere neniu volus militon en la mondo, kial oni ne forigas la minojn ĉi tie? Finfine ĉi tie ja ne estas muzeo.”

Kaj, kiam ni duafoje trapasis Elbon, ni denove, tiom hazarde, renkontis tiun maljunulon. Dum tiuj pasintaj jaroj mi havis multajn ŝancojn kontaktiĝi kun okcident-eŭropanoj, pro mia ofta vojaĝado inter Eŭropo kaj Azio. Dum interparolo kun iuj okcident-eŭropanoj, ili ofte larmis tuj ĉe ekmencio pri la milito kaj, kovrante mane la vizaĝon, petis: “Ĉesu, amiko! Ne parolu plu pri la milito!” Tiaj iuj el ili estis, do, mi devis esti singardema al tiuj amikoj. Tial ĉe denova renkonto kun la piloto, mi diris nur: “Kiel estas al vi la vivo, amiko? Ĉu ia ŝanĝiĝo sur Elbo?” Tiutempe, niaj volontulaj trupoj ĝuste sukcese rebatis la usonajn agresajn trupojn en Koreio, ŝultre ĉe ŝultre kun la Korea Popola Armeo, kaj usonaj imperiistoj minacis nin per atombomboj. La maljunulo kun ĉagrenita mieno tuj kaptis mian manon suririnte nian ŝipon, kaj diris kun tono de estimo: “Amiko, ankaŭ ni en nia lando jam gustumis sufiĉe pri *janki*-oj*. Sed kion fari? Ili ja estas potencaj. Vi ĉinoj estas bravuloj kaj kuraĝas ilin kontraŭbatali. Sed, diru, ĉu eble la milito plivastiĝos? Nu, mia ĉina amiko, ĉu vi ne venigus en Koreio veran katastrofon?”

Kvankam la maljunulo havis estimon al la ĉina popolo pro nia justa agado, sed lia timemo al la usona imperiismo estis neniom konsentebla, kio incitetis min, ke mia respondo ne povis soni sen ekscitiĝo: “Amiko, por kontraŭbatali la imperiismon, ni ĉinoj luktis jam pli ol unu jarcenton. Ni havas mem travivitan sperton por trakti la imperiismon; kontraŭ ĝi nenio devas esti disigata de la batalo de la popolo.”

En ambaŭ fojoj de intervido, la konversacio kompreneble tre akordiĝis, sed mi pli profunde ekkonis la psikon de tiaj amikoj.

Kaj ĉifoje? Jam forpasis pluraj jaroj, ĝis mi ree lin vidis. Kiam la maljuna piloto surpaŝis la navigejon, mi tuj klopodis trovi ian ŝanĝiĝon ĉe li. Efektive, evidenta ŝanĝiĝo okazis al li. Li rigardis antaŭen per du malafablaj okuloj sur la navigaciajn signojn, kolekte donadis ordonojn por direktado de la ŝipo el la antaŭa linio, kaj ĝin kondukis en Elbon kun granda ĉirkaŭiro.

* *Aludo pri usonanoj.*

Kaj samtempe li kovris la magnetan kompason, dirante al la direktlisto: "Ne rigardu la kompason, sed nur direktu la ŝipon kontraŭ la signon antaŭ vi." Mi aliris kaj trovis, ke la montrilo de la kompas forte moviĝis tien reen. "Kio estas tio?" Mi urĝe demandis.

"Nova min-regiono tie instaliĝis!" La maljunulo ekblasfemis: "La maljuna sentaŭgulo satsuĉis la lakton de la *jamki*-o kaj intencas nin tiri denove al milito!"

Tio, kio kaŭzis tiom grandan ŝanceliĝon de la indikilo de la kompas, evidentigis la vastecon de la nove instalita min-regiono. Tiu ŝanĝiĝo sur Elbo ne mirigis nin speciale. En la lastaj jaroj ni trovis ĉie tiajn militpreparojn en havenoj kontrolataj de la usona imperiismo. Frontante al tiuj imperiismaj krimaj agadoj, la ĉinoj, kiuj kreskas kaj maturiĝas tra luktoj kontraŭ imperiismo, nur pli firmiĝas sian decidemon kaj fidon por kontraŭbatali imperiismon kaj defendi la longdaŭran pacon.

Survoje al Kiel-kanalo la maljuna piloto parolis dum la tuta tempo pri la kontraŭusona aktivado en la Usona Okupad-zono, en tono tute alia ol la antaŭa. Nun ni eniris en la enfluejon de la kanalo, kie estis

la Britia Okupad-zono. Tiu malnova, nun pro bato lamigita imperiismo ankaŭ aktive subtenadas la faŝistajn fortojn, strikte sekvante la usonan. Sur bordo de la kanalo la loka garnizono de la Okcidenta Germanio jam anstataŭigis la okupan trupon. Kaj la malgranda garnizono nun ĝuste ekzercis sin.

Estis jam tempo por pilot-ŝanĝo. Mi trovis ke la maljuna piloto daŭre restas apud mi, kaj en liaj okuloj mi rimarkis la saman sentimenton, kiu kreskis inter la vastaj popolamasoj eŭropaj, kaj la ŝanĝiĝon de ilia psiko. En serio da okazintaĵoj ili jam pli klare ekkonis la veran fizionomion de la usona imperiismo. Ili iom post iom komprenis, kiuj volas trudi al ili novan militon, kaj, iom post iom, ili ankaŭ komprenos, ke la paco ne estas akirebla per petado.

Kaj mi diris al li: "La espero estas ĉiam ĉe vi, amiko! Rigardu nur antaŭen. Nun jam estas tempo urĝe bezonanta agadon. Por defendi la pacon de Azio kaj la mondo, ni ĉinoj estas ĉiam ĉe via flanko!"

La maljunulo rigardis min per du fiksjaj okuloj, el kiuj estis videblaj, kiom grandajn esperon kaj amikecon li havis por la ĉina popolo.

La akvo de Elbo fluis torente antaŭen; kaj forte ekpemis sin niaj manoj.

Plendeklive Floras Feliĉego

— Popolkanto de Ŝenhi-provinco —

Ilustris Gu Juan

*Suddeklive de la Suda Monto,
Ĉie popolkantoj viglas, ĉarmas.
Kantoj — floras ĉiuj ruĝaj floroj,
Montdeklive fruktarbaroj svarmas.*

*Kantoj — kooper' ektajdas oriente,
Kantoj — arĝentflu' kreiĝas okcidente.
Murmuradas ĉiam montkanalo,
Montdeklive verdas riz-kamparo.*


*Altdeklive ĉiam verdas pinoj,
Sube buntas fruktarbaroj, floroj;
Fronte suk-persikoj, dorse piroj —
Mil deklivoj de arĝent', de oro.*

*Sur diversaj la trezor-deklivoj
Etendiĝas ŝafar-laktovojo.
Ĉe la rando ĝia vipsvingante
Paŝtisteto kantas kun korĝojo.*



*Sur-deklive buntas kampoj, floroj,
Fruktarbaroj, herboj kaj bov-grego.
Suddeklive tondras kantsonoroj,
Plen-deklive floras feliĉego.*

Trad. Laŭlum



Prezidanto Sekou Toure traveturas, akompanate de Prezidanto Liu Ŝaŭki kaj Ĉefministro Ĝou Enlaj, tra Tian-anmen-placo inter la bonvenigantaj amasoj.

Foto de Li Gilu

Nova stadio de la amikeco inter la ĉina kaj gvinea popoloj

DE la 10-a ĝis la 15-a de septembro, Prezidanto Sekou Toure de la Respubliko de Gvineo, komisiito de la gvinea popolo kune kun la de li gvidata Registara Delegacio de la Respubliko de Gvineo vizitis Ĉinion kaj ricevis entuziasman akcepton de la ĉina popolo.

En la tago, kiam venis Prezidanto Sekou Toure kaj la delegacio al Pekino, tiu ĉi ĉefurbo estis bele kaj bunte ornamita kaj dekoraciita kiel en ĝoja festo. 500,000 pekinaj urbanoj, studentoj, kadroj kaj soldatoj ovaciis dense viciĝintaj ambaŭ flanke laŭlonge de la vojo, 40 kilometrojn longa, tra kiu pasis la gastoj.


Dum lia restado en Pekino, Prezidanto Sekou Toure vizitis Prezidanton Maŭ Zedong kaj Prezidanton Liu Ŝaŭki, kaj faris kun ili intimajn interparolojn. Kaj estis publikigita komuna komuniko.

En la komuniko estas esprimita, ke pri la nuna internacia situacio, pri la situacio en la azia kaj afrika regionoj kaj pri la plua disvolviĝo de la amikaj kaj kunlaboraj rilatoj inter Ĉinio kaj Gvineo, samaj opinioj de ambaŭ flankoj estas kontentige konstatitaj. Ambaŭ flankoj opinias, ke mondpaco devas esti firmigita, landoj kun malsamaj soci-sistemoj devas pace kunekzisti, kaj paco devas esti bazita sur la kvin principoj de paca kunekzistado. Ambaŭ flankoj same opinias, ke ĉiuj minacoj kaj baroj al la nuna mondpaco devenas de imperiismo, kaj ke imperiisma agreso kaj la regado de koloniismo devas esti likviditaj. Ambaŭ flankoj esprimis senrezervan subtenon al ĉiuj agadoj favoraj por la ĝenerala malarmado kaj malpermeso de nukleaj armiloj. La registaroj kaj la popoloj de Ĉinio kaj Gvineo firme kaj senlace klopodos daŭre por defendi la pacon de Azio, Afriko kaj la tuta mondo.

Prezidanto Sekou Toure kaj Ĉefministro Ĝou Enlaj ankaŭ

Prezidanto Sekou Toure (la dekstra) manpremas kun Prezidanto Liu Ŝaŭki.

Foto de Meng Kingbiaŭ



subskribis "Amikecan Traktaton inter Ĉinio kaj Gvineo": Ambaŭ flankoj konsentis akcepti kiel gvidajn principojn por la rilatoj inter ambaŭ landoj, la kvin principojn de reciproka respekto al la suvereneco kaj teritoria integreco, reciproka neagreso, reciproka neinterveno en la internaj aferoj, egaleco kaj reciproka utilo kaj paca kunekzisto; kaj disvolvi la ekonomian kaj kulturan rilatojn inter ambaŭ landoj laŭ la spirito de egaleco, reciproka utilo kaj amika kunlaborado.

Estis subskribita inter la du registaroj ankaŭ la "Interkonsento pri ekonomia kaj teknika kunlaborado inter Ĉinio kaj Gvineo". En la interkonsento estas difinita, ke la Registaro de Ĉina Popola Respubliko donos al la Respubliko de Gvineo seninterezan monprunton kun nenia kondiĉo kaj postulo pri privilegioj, en sumo de 100,000,000 rubloj. Krome la Ĉina Registaro liveros al Gvineo helpojn de teknikistoj, kvalifikitaj laboristoj, materialoj, ekipaĵoj kaj trejnado de teknikis-

toj kaj laboristoj. Subskribita samtempe ankaŭ la "Interkonsento pri komercado kaj pagado" por akceli la disvolviĝon de la amikeco inter la du registaroj kaj popoloj kaj la komercon inter la du landoj.

Tiuj traktato kaj interkonsentoj markas, ke la amikecaj rilatoj inter Ĉinio kaj Gvineo disvolviĝis jam al nova stadio, kaj multe helpos al la plifortikigo de la solidareco de la aziaj kaj afrikaj landoj kaj al la defendo de la mondpaco.

Por la justa batalo de la konga popolo


POST la sendependiĝo de Kongo, faris al ĝi krudan agreson kaj intervenon la usona imperiismo sub la flago de UNO. La aerodromo kaj radio-stacio de konga ĉefurbo estas okupitaj kaj la laŭleĝa konga registaro estas malpermesata ilin uzi. La intervenantoj subtenas la skismisman klikon de Kongo intencante rompi la unuecon de tiu lando, kaj klopodas eĉ malarmi la kongan armeon kaj transpreni la mast-rumadon de la lando. La usona imperiismo jam anstataŭis la belgajn koloniistojn intrigante aneksi unue Kongon kaj poste la tutan Afrikon, tial la situacio en Kongo pli kaj pli serioziĝas. Tiu ĉi malkaŝa agreso de la usona imperiismo grave minacas la pacon de Afriko kaj tiun de la tuta mondo, kaj vekis jam kondamnojn de la justa publika opinio de la tuta mondo. Pro tio, Ĉina Registaro publikigis deklaron je la 14-a de lasta septembro por severe kondamni kaj forte protesti la krimon de impertinenta kaj senhonta agreso, faritan al Kongo sub la flago de UNO de la imperiismaj landoj kun Usono ĉe la kapo. Tio esprimas, ke la ĉina popolo firme subtenas la justan batalon kon-

traŭ imperiismo de la Konga Registaro kaj la konga popolo por defendi nacian sendependecon kaj integrecon, kaj alvokas la popolojn de la tuta mondo, precipe la popolojn kaj la registarojn de Azio kaj Afriko tuj ekagi por

malhelpi la kriman intervenon en la internaj aferoj de Kongo fare de la imperiisma bloko kun Usono ĉe la kapo. Ni kredas, ke kun la apogo de la popoloj tra la tuta mondo la konga popolo finfine venkos.

La 23an de julio pekinaj popolanoj de ĉiuj rondoj kunvenis en la Popola Halo por subteni la kongan popolon en ĝia batalo kontraŭ imperiisma agresado por nacia sendependeco.

Foto de Lju Hoŭmin





Frakasu la Koloniiston!

*Kolektive pentrita de Kantona
Belarta Instituto*

Diplomatia rilato inter Ĉinio kaj Kubo stariĝas

JE la 2-a de lasta septembro en la nacia amaskunveno de kuba popolo estis varme aprobita unanime la decido pri starigo de diplomatia rilato inter Kubo kaj Ĉinio kaj tuja ĉesigo de ĉiuj rilatoj kun Ĉiang-kajsek-kliko. Je la 28-a de la sama monato la registaroj de Ĉinio kaj Kubo publikigis komunan komunikon pri la starigo de diplomatia rilato inter la du landoj kaj decidis intersanĝon de ambasadoraj diplomatiaj reprezentantoj laŭeble plejfrue, por plua disvolviĝo de la amikaj kaj kunlaboraj rilatoj inter la frataj popoloj de la du landoj.

Tio estas tre ĝojinda afero de la ĉina kaj kuba popoloj. Tio estas kristaliĝo de la ĉiam pli profunda amikeco kreita en la komuna batalo de la ĉina kaj kuba popoloj kontraŭ la usona imperiismo. Por defendi la nacian sendependecon kaj ŝtatan suverenecon la heroa kuba popolo faris kaj faras bravajn kaj neŝanceleblajn batalojn kontraŭ la usona imperiismo, kiu ĉiam rigardas Kubon kiel apartenaĵon de la sinjoroj de Wall-strato, kaj faris tre valoran kontribuon al la afero de defendo de mondpaco. Tiuj bataloj intime kunligis la popolojn de niaj du landoj. La ĉina popolo ĉiam rigardas la batalojn kaj venkojn de la kuba popolo kiel siajn proprajn de la kuba popolo rebatantaj la intervenojn de la usona imperiismo, ĉar ili scias, ke ĉiuj tiuj bataloj estas subtenoj al ili kaj ili ankaŭ ricevas el tiuj bataloj kuraĝigon. Spite diversajn malakordincitojn kaj minacojn de la usona imperiismo la ĉina kaj kuba popoloj antaŭenmarŝas man-en-mane kaj venkos en la komuna batalo kontraŭ imperiismo kaj koloniismo kaj en la defendo de mondpaco.

Vivu la Venko de la Popolo de Kubo en Batalo kontraŭ la Senhonta Interveno de Usona-Imperiismo!



**欢呼古巴人民的胜利，
反对美帝无耻干涉**



Subskribo de Landlima Traktato inter Ĉinio kaj Birmo

JE la 1-a de oktobro, 1960, kiam la ĉina popolo ĝoje celebris sian 11-an datrevenon de la Nacia Festo, estis subskribita la "Landlima Traktato inter Ĉina Popola Respubliko kaj la Unio de Birmo de Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj de Ĉinio kaj Ĉefministro U Nu de Birmo.

La landlima problemo inter Ĉinio kaj Birmo estas tre kompleksa kaj longtempe nesolvita problemo postlasita de la imperiistoj siatempe invadintaj tiujn du landojn. Sed post kiam Ĉinio kaj Birmo ambaŭ forskuis la katenojn de la imperiistoj kaj fariĝis landoj sendependaj kaj reciproke amikaj, la karaktero de tiu ĉi problemo radikale ŝanĝiĝis. La kuna iniciato de la kvin principoj por paca kunekzistado fare de la ĉefministroj de Ĉinio kaj Birmo en 1954 kreis des pli favoran kondiĉon por la solvo de tiu ĉi problemo. Nun sur la bazo de egaleco kaj reciproka utilo, en spirito de reciproka komprenemo kaj reciproka cedo kaj tra amikaj interkonsiliĝoj de la registaroj de la du landoj, finfine la problemo atingis justan kaj racian solvon.

Laŭ la postulo de la respekto al teritoria integreco, egaleco kaj amikeco de ambaŭ flankoj, Birma Registaro konsentis redoni la tri lokojn Hpimaŭ, Gaŭlum kaj Kangfang invaditajn iom

post iom en la jaroj 1905-1911 de la brita imperiisma armeo, kaj nuligis la eternan luiĝon de ĉina teritorio Mengmao Triangula Areo al Brita Birmo, kiel difinitan en la "Landlima Traktato inter Ĉinio kaj Britio" en 1897; la ĉina flanko ankaŭ konsentis rezigni la rajton partopreni la ekspluatadon de karbminoj en Lufang de Birmo, difinitan en la notoj intersanĝitaj de la ĉina kaj brita registaroj en 1941. Samtempe laŭ la spirito de reciproka cedo kaj reciproka utilo alprenitaj de ambaŭ flankoj, Ĉinio konsiderante praktikan bezonon de Birmo, konsentis transdoni la ĉinan teritorion Mengmao Triangula Areo (ĉ. 220 kvadrataj kilometroj) al Birmo kiel parton de la teritorio de la Unio de Birmo; kiel reciprokajon kaj sam-

tempe konsiderante la historiajn rilatojn kaj integrecon de tie loĝantaj triboj, la birma flanko konsentis transdoni la birman teritorion Panhung- kaj Panlao-areo (ĉ. 189 kvadrataj kilometroj) al Ĉinio kiel parton de ĉina teritorio. Problemoj de ĉiuj ceteraj partoj de la landlimo inter Ĉinio kaj Birmo ricevis ankaŭ justan kaj racian solvon.

Per tiu ĉi traktato, kiel diris la du ĉefministroj de Ĉinio kaj de Birmo, komenciĝis nova ĉapitro de la historio de la rilatoj inter Ĉinio kaj Birmo. Ĝi donis bonan ekzemplon por la aziaj landoj en paca kunekzistado sur bazo de la kvin principoj, kaj starigis ankaŭ brilan modelon por ĉiuj landoj en la mondo por paca solvado de internaciaj disputoj.

Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj (la dekstra) varme manpremis kun Ĉefministro U Nu post subskribo de la landlima traktato.

Foto de Lju Hoŭmin





Esperanto-movado en Sovetunio

Esperanto-movado en Sovetunio renoviĝis en 1956 kaj kreskas kun ĉiu jaro.

Gravan rolon en la kreskado ludis la VI-a Tutmonda Festivalo de la Junularo en Moskvo.

Baldaŭ post la renoviĝo aperis junularaj esperantistaj grupoj "Aŭroro" en Leningrado kaj "Fajrero" en Moskvo. Sekvis novaj grupoj en aliaj urboj. La Esperanto-movado ĝis nun montriĝas ĉefe per multnombraj rondetoj, grupoj, sekcioj. Ĉi tie oni devas mencii la sukcesan agadon de la esperantistaj sekcioj en la Domo de Kooperado en Leningrado, ĉe la domoj de sciencistoj en Leningrado, Rostov-sur-Dono, Kiev, Ĥarkov, Odeso, Gorkij, Taŝkent k.t.p., kiuj organizis rondetojn por instruado de la lingvo kaj semajnajn kunvenojn. Bone laboras la E-sekcioj ĉe la Domo de Instruistoj en Leningrado kaj Moskvo, ĉe la Kleriga Domo en Ivanovo, ĉe multaj universitatoj, institutoj, kulturodomoj, ĉe pala-coj kaj domoj de junpioniroj, ĉe mezlernejoj k.a.

Estas organizitaj en diversaj urboj prelegoj priesperantaj. En Leningrado en printempo 1959 estis organizitaj dek lekcionoj pri Esperanto kaj mallonga kurso de Esperanto. La kursanoj povis ricevi antaŭnelonge eldonitajn lernolibrojn de Semenova kaj Teterin kaj mallongan gramatikon kaj vortaron de Andreev.

La sovetia gazetaro aperigis multajn artikolojn kaj notojn pri Esperanto. La revuo de geografia societo en USSR komencis aperigi en rusa kaj esperanta lingvoj la titolaron de la publikataj artikoloj.

La Societo por Disvastigo de Politikaj kaj Sciencaj Konoj en

Litovio organizis lekcionojn pri Esperanto kaj pri Zamenhof. Festo-vesperoj, lekcionoj kaj kunvenoj memore kaj honore al Zamenhof okazis ankaŭ en Estonio, Latvio, Armenio, Uzbekio kaj en la urboj de la Rusa Federacio. Precipe solene oni honoris la memoron de Zamenhof en Leningrado. La 16-an kaj 17-an de decembro 1959 ĉe la Domo de Sciencistoj okazis celebra sesio de la Sekcio de Esperanto, dediĉita al la 100-a datreveno de la naskiĝo de Zamenhof.

En la vasta galerio estas aranĝita Esperanto-ekspozicio. Tie tro-

viĝis diverslingvaj lernolibroj, komence de la unua lernolibro 1887, fotoj, albumoj, korespondadoj, gravaj dokumentoj, inkluzive leterojn de Zamenhof mem.

La granda Blanka Halo estas plena de esperantistoj. Ĉeestis samideanoj en Leningrado kaj el aliaj urboj. Sur la scenejo — granda portreto de Zamenhof, malsupre floroj, supre slogano kun la vortoj de Lenin.

En sia enkonduka parolado la membro-korespondanto de la Akademio de Sciencoj de USSR prof. Obruĉev, prezidanto de la Esperanto-Sekcio, rakontis pri sia persona renkontiĝo kun Zamenhof kaj lia genieco.

La instruisto kaj aŭtoro de esperanta lernolibro s-ano Teterin,

La Rolo de Esperanto

Antaŭ nelonge K-do Hujucz, prezidanto de Ĉina Esperanto-Ligo, ricevis leteron de Keio Universitato Esperanto-Klubo el Japanio demandantan lian opinion pri la rolo de Esperanto. Sube ni publikigas lian respondon:

— la Red.

Al Keio Universitato Esperanto-Klubo

Estimataj samideanoj,

Al viaj demandoj, mi volas esprimi mian personan opinion jene:

Estas utile al la popoloj en diversaj landoj utiligi la instrumenton internacia lingvo Esperanto en la interŝanĝo de opinioj por solidariĝi la pacamajn popolojn en la tuta mondo por kune defendi pacon, kontraŭi la sklavigon kaj subpremadon fare de la imperiestroj, batali por sendependiĝo, liberiĝo de ĉiuj nacioj kaj por la tuthomara progreso. Nur por la suprediritaj noblaj celoj Esperanto povas ludi pozitivan rolon. Alie, Esperanto ne estas disvastiginda.

Koncerne la rilaton de ĉina kaj japana popoloj, estas nun nepre necese, ke popoloj en niaj du landoj intime unuiĝu, inter-subtenu kaj bataladu kune kontraŭ la invada kaj sklaviga politiko de usonaj imperiestroj kaj por la brila estonteco de niaj du landoj. En la pasintaj kelkdek jaroj la ĉinaj kaj japanaj esperantistoj kontribuis siaparte per Esperanto al la interkompreno, amikiĝo kaj solidariĝo de ĉina kaj japana popoloj. Laŭ mi ankoraŭ estonte ni devos klopodi kune laŭ tiu ĉi direkto. Bazante sur tiuj ĉi kompreno kaj espero mi taksas la utilecon kaj rolon de Esperanto.

Kun samideana saluto

Sincere via

Hujucz

rakontis pri la vivo kaj lingva laboro de Zamenhof. Li montris al la ĉeestantoj la unuan esperantan lernolibron.

Fine okazis koncerto. Oni deklamis versojn de famaj rusaj kaj bulgaraj poetoj esperante. La junuloj de la grupo "Aŭrora" gviditaj de aktoro Miloĉenko ludis la scen-aranĝon de la rakonto de Ĉeĥov "La malfeliĉulo" kaj aktoro Ritijkov recitis la lastan monologon de la urbestro el la senmorta komedio de Gogol — "Revizoro".

Dum la dua tago la fama profesoro S. S. Ĉaĥotin klare pruvis, ke la multlingveco, kiu ekzistas en la nuntempa scienco, ege bremsas la kreskadon de la mondscienco.

S-anino Semenov, ankaŭ la aŭtoro de la lasta lernolibro rakontis pri la ekzistantaj metodoj en la instruado de Esperanto kaj pri la rekta metodo de Cseh. La kunveno entuziasme decidis multoblige kaj plibonigi la instruadon.

Poste estis tralegitaj la pensojn de Gorkij pri Esperanto. Gorkij opiniis, ke Esperanto nepre venkos la malsaĝecon de la homoj, kiuj ne povas antaŭvidi.

Estas ankaŭ menciinda la intereso entreprenado de la Esperanto-rondeto ĉe la Ŝtata Universitato en Riga, kiu organizis ĉijare someran tendaron por gestudentoj de Estonio, Litovio kaj Latvio. La tendaro okazis inter pinarbaro, ĉe pitoreska lago. Tiu tendaro estas nur komenco de novaj entreprenoj kaj ni esperas ke estonte multaj pli grandaj similaj tendaroj devas aperi en aliaj lokoj de Sovet-unio.

Nun en Leningrado oni projektas organizi komence de oktobro, 1960 La Esperanto-Universitaton por perfektigi la lingvajn sciojn kaj prepari bone spertajn instruistojn de Esperanto, kiuj post profunda studado de la lingvo portos siajn konojn en popolaj amasoj kiuj dum lasta tem-

Ĝojan Novjaron

ni deziras al ĉiuj niaj legantoj kaj prezentas al ĉiu abonanto por 1961 kiel novjaron donaceton unu el niaj jenaj eldonaĵoj laŭ lia elekto:

1. Mi Volis Viziti Lernejon (*bildrakonto*)

2. Floroj kaj Birdoj (*8 bildkartoĵoj*)

El Popola Ĉinio

La donaceton ni sendos nur kontraŭ alsendo de donakupono, kiun ricevos ĉiu paginta abonanto de EPC por 1961.

po pli kaj pli interesiĝas de nia lingvo de paco kaj amikeco.

Oskar Gardi el Sovetunio

*Sovetunio, Leningrado -P. 183,
Ŝkolnaja 2, kv. 18*

Junulara Esperanto-Societo en Tokio

Lastjare en Tokio fondiĝis Junulara Esperanto-Societo. Ĝi konsistas el junulaj geesperantistoj de Tokio: Laboristoj, oficistoj, kuracistoj, instruistoj, inĝenieroj, artistoj ktp. Ĝia celo estas lernado kaj uzado de la lingvo Esperanto por fortikigi reciprokajn kompreniĝojn inter la diversnaciaj gejunularoj kaj kunlabori por mondpaco; disvastigo de Esperanto inter la junularoj; diskonigo de japana gejunula vivo nuntempa; diskonigo de historio de popolaj sinceraj esploradoj en Japanio por paco, libereco kaj beleco; kunlaboro por progreso de Esperanto-movado en Azio. La societo estas kvankam juna, tamen multe aktivis en la batalo

kontraŭ la t. n. "Nova Sekureca Pakto" inter Japanio kaj Usono. Ĉar ili volas, ke Japanio estu la fonto de paco sed ne la lando de militarismo. La societo tre volas interligiĝi kun pacamaj geamikoj diversnaciaj. Adr.: Junulara Esperanto-Societo, ĉe Toho-ŝoin, 4-11 kudan Ĉijoda-ku, Tokio, Japanio.

Nova prezidanto de MEM

Laŭ informo de PACO, la interligilo de Aŭstria Pacrondo Esperantista. En la estrarkunsido de MEM okazigita je la 11-a de julio en Tarnovo (Bulgario) k-do Canko Murgin estas elektita nova prezidanto de MEM, kaj k-do Nikolaj Parvanov la prezidantostataŭanto.

Eksterlandaj Esperantistoj en Ĉinio

En lasta oktobro kamaradoj de Ĉina Esperanto-Ligo havis ĝojajn renkontiĝojn kun kvar eksterlandaj esperantistoj, nome: samideano Sigurdur Gudmunsson, la

estro de la delegacio de Island-Ĉinia Amikeca Asocio, samideano Verešaŝna Varvara Ivanovna, el Sovetunio kaj gesamideanoj Friedmann, el Germana Demokratia Respubliko. La tri lastaj vizitis nian landon turiste. Ili ĉiuj partoprenis kaj dividis kun la ĉina popolo la ĝojon kaj feliĉon festi nian nacian tagon.

Dum renkontiĝo ni varme kaj libere parolis pri multaj temoj. Niaj esperantistaj amikoj rakontis al ni siajn impresojn pri la vizititaj fabrikoj, popolkomunumoj, famaj vidindaĵoj kaj pri la grandaj atingoj de socialismo konstruado kaj rapida ŝanĝiĝo en nova Ĉinio. Ni ankaŭ interinformiĝis pri esperanto-movado en la respektivaj landoj, parolis pri la granda rolo de Esperanto en internacia komunikado, kaj esprimis nian sinceran amikecon, solidarecon kaj decidemon en la batalo por mondpaco, per interŝanĝo de donacaĵoj.

Vivu Leninismo

Ĝus aperis

Eldono: Ĉina Esperanto-Ligo

Vivu Leninismo konsistas el 3 artikoloj eksplikantaj la valorajn instruojn de V. I. Lenin tuŝantajn la plej gravajn aktualajn problemojn de la nuna mondo, kiuj interesas ĉiujn pacamajn kaj serioze pensantajn esperantistojn:

Kia estas nia epoko?

Kie kuŝas la fonto de la milito?

Ĉu nukleaj armiloj decidas la sorton de la homaro?

Kiel oni efike defendu la pacon?

Formato 20 X 14 cm., 102 p., presita sur bonkvalita papero. Prezo: 2 rb., 2 ŝil., 0.30 us\$, 100 yen, 1 gld., 1.40 Fr. fr., 1.20 Gm., 90 lir.

Korespondi Deziras

* 43 anoj de Esp-rondeto el junaj gekuracistoj kaj medicinfratinoj dez. kor. pri ĉt., interŝ.ilk. mone-rojn, insignojn, Esp-ajojn. Adr. USSR. Krivoj Rog, Redakcio "Ĉervonij Hirnik", Esp-grupo, Bolnica 5, Dro Korn Zinovij.

* **Dro Zinovij Korn**, dez. kor. pri turismo, geografio, historio, popolaj proverboj, kuracado kaj medicina observo, ministoj k.a., interŝ. ik. monerojn, Esp-ajojn. Adr. USSR. Krivoj Rog 11, Kalinigradskaja 6, kv. 27.

* **Sro Edo Taddei**, via del Paradiso 2, FIRENZE, Italio, dez. kor. kun junaj ges-anoj kaj interŝ. sportprogramojn kaj muzikdiskojn.

* **Mme LEVY Marthe**, Travaux Publics, Meknes, Maroko dez. kor. k interŝ. pm. kun maljunaj filatelistoj de Ĉinio.

* **Victor Tobing**, c/o Telegraf Office, Trandjongpandan Billiton, Indonezio dez. kor. en Esp-o, angla k indonezia lingvoj.

* Aziaj kaj afrikaj samideanoj! Helpu nin laŭpove sendante pri-skribetojn, bildojn, gazetojn mapojn, interesajn specimenojn pri viaj landoj al ni 13-14-jaraj 33 gelernantoj, al kiuj oni dum 1960-61 instruas esperantlingve la geografion de viaj kontinentoj, adresu: **La 3C-klaso, SOMERO, Finnlando**. Ni respondos al ĉiuj!

* Belarta studejo ĉe Kulturdomo de Ĉervenj aranĝos **ekspozicion de infandeseĝnajoj** el tutmondo. Bv. sendi infandeseĝnajojn al k-do Vladimir Doroguj, str. K. Libkneht 61, Ĉervenj, Minskaja obl. USSR. Rekompenco laŭ deziro.

* **Boris Ignatov**, vil. Sumata, Sevlievsko, Bulgario dez. kor. pri ĉt.

* **Gulieta Meteva**, 14-jara, dez. kor. Aprilovo, Gabrovsko, Bulgario.

* **F-ino Věra Zitkova**, Školska ul. 342, Nechanice u Hr. Kralove, Ĉeĥoslovakio.

* **Rimas Johano** (elektroteknika studento) k **Banionis Vincenzo** (medicina studento), Darians-Gireno 5-2, Kaunas, Litova SSR. USSR. dez. kor. kun orienta Azio, Ameriko kaj Novzelando.

* **Lazaro Flury**, San Jorge, F.C.G.M. Provincia Santa Fe, Argentino. dez. ric. el Ĉinio kaj Japanio folklorajn muzikojn, eble kun malgranda klarigo. Rekompenco laŭ deziro, nepre resp.

Atentu!

K-do Ludomir Sobanski, USSR. Ĥmelnicka obl. Dunajevskij r. Minkivci dez. kor. **nur** pri stenografio en diversaj lingvoj.

* **S-ano Petko Velkov Petkov** dez. kor. pri politiko kaj turismo kaj inters. pk., gazetojn kun ĉinaj, koreaj kaj japanaj k-doj; Bulgario, Vratza, ul. David Todorov 5.

* **Jean ROUVIERE**, "Vista bella" 25 Allee de la Quinguette, AUBENAS (Ardeche), Francio; dez. kor. kun ĉinaj kaj japanaj k-doj pri ĉt.

* **A. Kulpite**, dez. kor. pri arto, teatro, muziko, vivo; USSR. Latvio, Riga 39, Lenina 195-54.

* **Tigran Ĥaĉatrjan**, Gorno-metal. tehnikum, Kafan, Armenio, USSR.

Tuj aperos

PRI PRAKTIKO

verko de kamarado Maŭ Zedong unuafoje en Esperanto. Ĝi estas filozofia verko pri teorio de konado. En tiu ĉi verko, kamarado Maŭ Zedong per profunda penso kaj tre facile komprenebla stilo eksplikas kaj disvolvas la marksisman teorion de konado laŭ vidpunkto de dialektika materialismo, plene kaj konvinke klarigas la rilaton inter teorio kaj praktiko kaj la proceson de la homa konado. Ĝi estas nepre leginda por tiuj, kiuj volas akiri veran konon de la mondo.

Formato: 13 × 18.5 cm., ĉ. 20 p.

Poŝtmarkoj de la Ĉina Popola Respubliko

19 × 26.5 cm. 88 p. plus 4 p. da koloraj il. tole bindita.

Prezo: 6 rb., 4.25 gld., 1.20 us\$, 400 yen, £0-8-6, 6 Fr. fr., 5 Gm., 700 lir.

La albumo estas ilustrita katalogo de p.m. emisiitaj de la Ĉina Poŝto ekde okt. 1949 ĝis la fino de mar. 1959 kun interesa historia resumo pri la ĉina poŝto kaj unu alfiksita aŭtentika p.m. en miniatura folio.

Ĉina Antologio **jam aperis!**

Kaj pri ĝi la unuaj legantoj jam sendis al ni siajn opiniojn:

* **E. Bokarev** (*Sovetunio*): "Tiu verko estas vere tre grava kaj impona".

* **Julio CSAPO Gyula** (*Rumanio*): "Vi ne povas imagi aŭ konjekti kiel grandan ĝojon kaŭzis al mi via unuaranga *Ĉina Antologio*. Gratulon pro la belega kaj bonega verko!"

* **Joel Vilkki** (*Finnlando*): "... Ĝi estas la plej interesa antologio, kiu aperis en Esperanto... Ĝi estas la unua beletris-

tika verko el la ĉina lingvo post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, kiu atingis nin eŭropanojn en senpera traduko. ... Mi devas konfesi, ke mi ĝin tralegis kun ĉiam pli kreskanta entuziasmo. ..."

* **S. Nishi** (*Japanio*): "... Kun admiro mi entuziasme foliumis la libron, tiel grandiozan kaj belegan kaj samtempe kun popolkarakteriza aspekto. La enhavo estas freŝa kaj plena je juna energio; la traduko estas sendifekte bonstila. ..."

* **Iŝmael Gomes Braga** (*Brazilo*): "Mi jam legis vian belegan libron '*Ĉina Antologio*' kaj mi tre fieras, ke ni jam havas en Esperanto tian trezoron, certe la plej belan libron aperintan en Esperanto."

* **Algot Hamson** (*Svedio*): "Kun granda plezuro mi tralegis *Ĉinan Antologion*. Mi trovis ĝin tre bona. Kun granda forto tiu verko montras la heroan batalon, kiun la popolo de Ĉinio faris kontraŭ siaj malamikoj. ..."

* **Pál Balkányi** (*Hungario*): "... (ĝi estas) brila volumo, valora enhavo, bona teksto, laŭdinda traduko kaj interesaj desegnaĵoj, bildoj, lertaj klarigoj! Entute havas honorlokon en la esperantaj eldonaĵoj. ..."

Prezo: 12 rb., 2 us\$, 10 ŝil., 7 gld., 8 Fr. fr., 6 Gm., 1000 lir., 500 yen.

INDEKSO DE EPĈ 1960

(La titoloj kun “*” estas informoj el “Kurantaj Aferoj”)

POLITIKO:

P.L.A. bombardas Ginmen en armita kontraŭ- usona manifestacio	140
Forpelu usonan imperiismon el Azio	141
Adiaŭ, Dio de Pesto Eisenhower	145
Ŝtormo en Azio	148
Hurlo de ŝanhajaj laboristoj	150
Vivu la granda Oktobra Socialisma Revolucio	225
La penso de Maŭ Zedong estas triumfa stan- dardo de la granda revolucio de la ĉina popolo	226
Parolado de Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj ĉe la akcepta kunveno memore de la 11-a datre- veno de la fondiĝo de Ĉina Popola Res- publiko	232

EKONOMIA KONSTRUADO:

Renkonte al la nova antaŭensalto en 1960	3
Granda ĝojo de kvincent milionoj da kam- paranoj	16
Kunveno de herooj en Pekino	19
Granda kanalo surmonta	22
Natura naskiĝo post natura embriogenio	24
*Alia ŝtalponto trans Jangzi-rivero	30
La grandioza signifo de 3-jare plifrua plenum- iĝo de la Dua Kvinjara Plano	55
La popola komunumo — grnada liberiganto de produktopovo	60
Grandioza projekto efektivigata	65
La Popola Halo	68
*Langŝou-Hingiang-a Fervojo funkcias ĝis Hami	85
*Hidroelektrajo utiliganta subteran torenton	85
*Mekanikigo de porko-bredado	85
Pri la nacia ekonomia plano por 1960	95
*Ĉiuj por elektroenergio	101
*Lokaj fervojoj	101
Ŝanhajo sub ŝtormo de renovigo kaj revolucio teknikaj	117
*Rapida teknika revolucio	119
*Fervojo sur Sud-okcidenta Altebenajo	119
Nova alttajo de akvoutiliga konstruado	152
*Tutlanda subteno al agrikulturo	185
*Artefarita pluvo de la Popola Aeroarmeo	185
La movado por teknika renovigo en Ĉinio	190
Mirinda replantilo	193
Senlime bona la urba popola komunumo	195

*Kampanjo de teknika renovigo en la kamparo	201
Daŭra antaŭensalto de la ĉina nacia ekonomio en 1960	236
Ĉina kamparo survoje al mekanikigo	240
Vizito al akvoriĉa regiono	244

KULTURO, EDUKADO:

Brilaj atingoj de kulturo kaj artoj en Ĉinio	10
*Eldono de “Ĉinaj Vegetaĵoj”	30
Nova disvolviĝo de kulturo kaj edukado en Tibeto	35
*Esploro de glaciriveroj	42
*Sciencaj esploroj en popolkomunumoj	42
Kreskas la ĉina laborista intelektularo	99
*Gazeto pri vejki-o	101
Paŝosignoj de progresado	102
Entrudiĝinte la pordon de natura scienco	104
Mia dekjara lernado	106
La kultura disvolviĝo de ĉinaj nacimalplimultoj	159
*Kongreso de herooj en eduka kaj kultura kampoj	171
*Trejnado de altgradaj agrikulturaj teknikistoj rapidigata	189
Sur la ĝusta vojo	202
Revolucio en medicino	255
*Novaj laboristaj kaj kamparanaj membroj de la Scienca Akademio	263

LITERATURO, ARTO:

*Filmo-projekcia reto tra la tuta lando	30
Vojperdo (<i>novelo</i>)	36
Plej bonas regado de mem la popol’ (<i>popol- kanto</i>)	40
Laŭ la fluo naĝas fiŝo (<i>popol-kanto</i>)	41
Patrinan domon iras novedzino (<i>popol-kanto</i>)	41
La fiŝista kanto ĉe Erhaj	42
Al popola Ĉinio (<i>poemo</i>)	45
Iom pri la enhavo de Ĉina Antologio	48
Rememoroj pri mia iro al kamparo	76
Hejmon revenis arto	77
Bona onjo (<i>popol-kanto</i>)	79
Ĉe la putto (<i>popol-kanto</i>)	79
La plej bona verso (<i>poemo</i>)	80
Oriente de l’ vilaĝo (<i>popol-kanto</i>)	80
Lotusaj folioj (<i>popol-kanto</i>)	81
Malpura ĉiuj ŝin rigardas (<i>popol-kanto</i>)	81
Survoje al malgrandaj altfornoj	82

La nigran drakon mi al la karuloj kontribuas (<i>popol-kanto</i>)	108
Kantantoj pri socialismo	109
Printempo jam venas (<i>novelo</i>)	110
Fratinoj lernas en konkur' sen laco (<i>popol-kanto</i>)	112
Kante l' ruĝan sunon vekas (<i>popol-kanto</i>) . . .	113
Unu korbo (<i>popol-kanto</i>)	114
Gaje ĉirpas hirundoj tondil-vostaj (<i>popol-kanto</i>)	116
Kiam la ĉielo falis (<i>popola rakonto</i>)	116
*Filmo-industrio en Ĉinio	119
La ultima salida (<i>poemo</i>)	146
La virina transporta brigado (<i>popol-kanto</i>) . . .	163
Kvin Orfloroj	164
Erlang kaj la sep sunoj (<i>popola rakonto</i>) . . .	166
La katoj deziras ŝanĝi sian profesion (<i>popol- kanto</i>)	166
Navade kuras sur rivero fiŝ-boatoj (<i>popol-kanto</i>)	166
Fari kukurblaŭbon (<i>popol-kanto</i>)	167
Salutparolado al la Tria Tutlanda Kongreso de Literaturaj kaj Artaj Laborantoj de kama- rado Lu Dingji en la nomo de la Centra Komitato de la Ĉina Komunista Partio kaj la Ŝtata Konsilo	181
Vojo de socialismaj literaturo kaj arto	186
La nomo de la nepeto (<i>novelo</i>)	207
Nova puto (<i>popol-kanto</i>)	210
La popolkomunumo—pontego el oro (<i>popolkanto</i>)	210
La nordo ĝuas la sudlandan belon (<i>popolkanto</i>)	210
Floroj de antaŭensalto de belartaj filmoj . . .	211
La ses ĉevaloj de Ĝaŭling	212
Nova fizionomio de la ĉina pentrarto	249
Tra la tuta lando iras la Prezidanto (<i>popolkanto</i>)	231
Kuraciro en neĝblova nokto (<i>popolkanto</i>) . . .	263
Plendeklive floras feliĉego (<i>popolkanto</i>)	267
Reflorado en zefiro kaj sunvarmo	261
“Tria franjo Liu” —dancopero de Guanghi—	264
*Senprecedenca prospero de ĉina literatura kreado	260
*Amatora muzika aktivado de la amaso	263
Antaŭ la Popola Halo en Pekino (<i>poemo</i>) . . .	261

POPOLA VIVO:

La granda familio de revenintaj elmigrintoj . . .	74
Tibeta popolo impetas al demokratio kaj so- cialismo	120
La suno ekbrilas ankaŭ por la familio de Konĉokĝolma	121
*Sur la plej altan montpinton de la mondo . . .	139
Kresko de ŝparajo —pliboniĝo de la vivo . . .	155
Hazardludejo transformiĝis en kulturan centron	157

*Amasa naĝado	189
Nova vivo, nova energio	199
Printempo en Lhasa	205
Triumfo de kolektivismo	215
Por la socialisma konstruado de la patrolando .	258

AMIKECO, PACO

Tradicia amikeco inter ĉinaj elmigrintoj kaj la popolo de Indonezio	31
La brilo de ĉinio-birma amikeco	72
Protesto (kontraŭ Internacia Astronomia Asocio)	88
Eterna amikeco (korespondo el Hindio)	125
Leteralvoko al esperantistoj-pacamantoj en la mondo	127
Prezidanto Maŭ Zedong parolis kun gastoj el Azio, Afriko kaj Latinameriko	135
Nuklean armilon kondamnas dekomence la ĉina popolo	179
Alvoko de V.P.E.A	218
Amiko konatiĝinta sur Elbo-rivero	266
Nova stadio de la amikeco inter ĉina kaj gvinea popoloj	268
Diplomatia rilato inter Ĉinio kaj Kubo stariĝas	270
Por la justa batalo de la konga popolo	269
Subskribo de Landlima Traktato inter Ĉinio kaj Birmo	271

ESPERANTO, K. A.

Zamenhofa jubileo	44
Esperanto marŝas	47, 86, 128, 170, 219, 272
Sur nia librobreto	49, 87, 127, 172, 220
Korespondi deziras 50, 89, 123, 130, 173, 214, 220, 274	
Finredaktinte	90, 130, 174
*La unuaj malsovaĝigitaj or-simioj	139
Problemoj de traduka laboro Esperanten	168
Interparolado pri la internacia lingvo	168
Rolo de Esperanto	272



Ses Kolektoj de Elĉerpaĵoj el Verkoj kaj Paroladoj de Lenin

Por memori la 90-an datrevenon de la naskiĝo de Lenin kaj vaste konigi leninisman, la Fremd-lingva Eldonejo de Ĉinio eldonis lastatempe ses kolektojn de elĉerpaĵoj el verkoj kaj paroladoj de Lenin pri jenaj temoj:

1. Lenin pri Imperiismo, la Antaŭvespero de Proletara Socia Revolucio
2. Lenin pri Proletara Revolucio kaj Proletara Diktaturo
3. Lenin pri Naciliberiga Movado
4. Lenin pri Milito kaj Paco
5. Lenin pri la Lukto kontraŭ Reviziismo
6. Lenin pri Revolucia Proletara Partio de Nova Tipo

Leninismo estas marksismo de la epoko de imperiismo kaj proletara socialisma revolucio. Sub novaj historiaj kondiĉoj, Lenin ne nur restarigis la revolucion enhavon de marksismo kastritan de la reviziistoj de la Dua Internacio, sed plue disvolvis la revolucion spiriton de marksismo, kaj tiel antaŭenpuŝis marksismon al nova etapo, montrante al la ekspluatataj klasoj kaj subpremataj popoloj helan vojon por vere forskui kapitalisma-imperiisman sklavecon kaj mizerecon kaj iri al socialismo.

En la nuna granda nova epoko, kiam imperiismo putriĝas tagon post tago kaj socialismo ĉiam pli kaj pli prosperas, en la akra lukto decideme kontraŭbatali imperiismon, precipe la usonan, kaj la modernan reviziismon, la tuta grandioza instruo de Marks kaj Lenin ankoraŭ havas fundamentan gvidan signifon. Legante la verkojn de Lenin hodiaŭ, oni trovas ilin ankoraŭ tiel ĝustaj, tiel vivecaj kaj tiel aktualaj, kvazaŭ ili estus ĵus skribitaj hieraŭ. Leninismo estas ĉiam vera kaj vivfreŝa.

Tiuj ses kolektoj de elĉerpaĵoj el verkoj kaj paroladoj de Lenin plene esprimas lian revolucion spiriton, precipe lian malamon kontraŭ imperiismo kaj ĉiuj reakciuloj kaj lian senkompromisan kaj ĝisfundan batalspiriton kontraŭ ili.



Ili instruas, ke oni devas plene koni la naturon de imperiismo, ĉiam konservi viglan revolucion singardemon, havi nenian iluzion pri imperiismo kaj batali kontraŭ ĝi ĝis la fino.

Ili ankaŭ instruas, ke oni devas ligi la lukton kontraŭ imperiismo kun tiu kontraŭ reviziismo, alie, la proletara socialisma revolucio ja ne povos progresi.

Jam aperis la rusa, angla kaj japana eldonoj; baldaŭ aperos la germana, franca kaj hispana eldonoj.

La rusa kaj angla eldonoj estas ankaŭ livereblaj en bindo, kaj la ceteraj nur en broŝuro.

Eldonataj de Fremdlingva Eldonejo, *Pai Wan Chuang*, Pekino 37, Ĉinio
Riceveblaj ĉe *Guozi Shudian*, P.O. Box 399, Pekino, Ĉinio



1. Miloj kaj miloj da vapormotoroj kaj gasmotoroj instaligis en la ĉina kamparo. Jen vapormotore de Laŭĉeng-a Popol-komunumo de Jansi-gubernio, Henan-provinco, pumpas akvon por irigacio.
2. La bediga masino inventita de Gang Juking, membro de Kiĝou-a Popol-komunumo, estas tre taŭga ilo por ĝardeniga kulturado.
3. Kombajnoj de Liukju-a Popol-komunumo de Tongĉuan, Ŝenhi-provinco en intensa laborado.
4. Nancajĝuang-a Popol-komunumo draŝas per maŝinoj.
5. Ankaŭ la terkulturistoj de Duvej-a Popol-komunumo de Hianjoŭ-gubernio, Fugian-provinco, aplikas la lertajn rizo-transplantilojn.

小龍
秋下
一角
雁客以水石為壽
梅雨台對此為畫
福

